

eLIBRO

H. G. Wells

La tempo- maŝino



INKO

H. G. Wells
LA TEMPO-MAŝINO

El la angla tradukis

E. W. Amos

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-077-5

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

FEBRUARO 2001

Ĉapitro I

La tempo-vojaĝanto (ĉar estos oportune tiel nomi lin) klarigadis profundan temon al ni. Liaj grizaj okuloj briletis kaj lia kutime pala vizaĝo, estis ruĝeta kaj vigla. La fajro brulis hele, kaj la milda brilo de la ardaĵ lampoj en la arĝentaj lilioj trafis la veziketojn, kiuj fulmetis kaj dancis en niaj glasoj. Niaj seĝoj, estante liaj patentajoj, pli ĝuste ol toleri nian sursidandon, kvazaŭ ĉirkaŭbrakis kaj karesis nin, kaj regis tiu luksa postmanĝa atmosfero kiam pensoj fluas gracie liberaj de la malhelpoj de precizeco. Kaj tiel li klarigis ĝin al ni — markante la punktojn per maldika montrofingro — dum ni sidis kaj malzorge admiris lian sinceron pri tiu ĉi nova paradokso (kiel ni opiniis ĝin) kaj lian inventemon.

”Vi devas zorge atenti min. Mi devos kontesti unu-du ideojn, kiujn preskaŭ universale oni akceptas. La geometrio, ekzemple, kiun oni instruis al vi en la lernejo baziĝas sur miskompreno.”

”Ĉu tio ne estas iom granda afero, por esperi, ke tie ni komencu?” diris Filby, argumentema viro kun ruĝa hararo.

”Mi ne intencas peti, ke vi akceptu ion ajn sen racia kialo. Vi baldaŭ konfesos tiom, kiom mi bezonas de vi. Vi scias, kompreneble, ke matematika linio, linio de dikeco nulo, ne havas realan ekziston. Ĉu oni instruis al vi tion? Ankaŭ ne havas ĝin matematika ebena. Tiuj aferoj estas nur abstraktaĵoj.”

”Konsenteble”, diris la psikologo.

”Ankaŭ kubo, havante nur longon, larĝon kaj alton, ne povas havi realan ekziston.”

”Tie mi kontraŭstaras”, diris Filby. ”Estas evidente, ke solidiĝo povas ja ekzisti. Ĉiuj realaj aĵoj — ”

”Tiel opinias la plej multaj homoj. Sed atendu momenton. Ĉu *maldaŭra* kubo povas ekzisti?”

”Mi ne komprenas vin”, diris Filby.

”Ĉu kubo, kiu daŭras dum neniom da tempo, povas havi realan ekziston?”

Filby fariĝis pensema. ”Klare”, daŭrigis la tempo-vojaĝanto, ”ia reala aĵo devas etendi sin en kvar direktoj: ĝi devas havi longon, larĝon, alton kaj — daŭron. Sed pro natura difekto de la korpo, kiun mi klarigos al vi post momento, ni emas preterlasi tiun faktan. Estas vere kvar dimensioj, tri el ili kiujn ni nomas la tri ebenaĵoj de spaco kaj la kvara, tempo. Ni emas, tamen, fari nerealan distingon inter la unuaj tri dimensioj kaj la lasta, ĉar okazas, ke nia konscio moviĝas intermite en unu direkto laŭ la lasta, de la komenco ĝis la fino de nia vivo.”

”Tio”, diris tre juna viro, spasme klopodante rebruligi sian cigaron per la lampo; ”tio ... treege klara.”

”Nu, estas tre rimarkinde, ke tio estas tiom neatentata”, daŭrigis la tempo-vojaĝanto, kun eta ekgajiĝo. ”Efektive, tio estas la signifo de la kvara dimensio, kvankam kelkaj homoj, kiuj priparolas la kvaran dimension ne scias, ke ĝi signifas tion. Ĝi estas nur alia aspekto de tempo. *Estas neniam diferenco inter tempo kaj iuj el la tri dimensioj de spaco, krom tio, ke nia konscio laŭiras ĝin.* Sed kelkaj stultuloj miskomprenas tiun ideon. Vi ĉiuj aŭdis, kion ili diras pri tiu ĉi kvara dimensio?”

”Mi ne”, diris la urbestro.

”Nur tion ĉi. Ke spaco, laŭ niaj matematikistoj, havas tri dimensiojn, kiujn oni povas nomi longo, larĝo kaj alto, kaj ĝi estas ĉiam difinebla per aludo al tri ebenaĵoj, ĉiu rektangule al la aliaj. Sed kelkaj filozofiuloj demandadas, kial ĝuste tri dimensioj — kial ne estu plia direkto rektangule al la alia tri? — kaj eĉ klopodas konstrui kvar-dimensian geometrion. Profesoro Simon Newcomb antaŭ unu monato asertis tion al la Matematika Societo de New York. Vi scias, kiel sur ebenaĵo, kiu havas nur du dimensiojn, ni povas prezenti figuron de tri-dimensia solidaĵo, kaj simile, ili opinias, ke per modeloj el tri dimensioj ili povus prezenti ion el kvar dimensioj — se ili povus estri la perspektivon de la afero. Ĉu vi komprenas?”

”Mi kredas, ke jes”, murmuris la urbestro; kaj kuntirante la brovojn, li fariĝis introspektema, kaj liaj lipoj moviĝis kvazaŭ li ripetus magiajn vortojn. ”Jes, mi kredas, ke mi komprenas nun”, li diris post iom da tempo, vigliĝante laŭ tute nedaŭra maniero.

”Nu, mi povas sciigi al vi, ke mi prilaboris tiun kvar-dimensian geometrion de post ioma tempo. Kelkaj el miaj rezultoj estas strangaj. Ekzemple, jen bildo de viro kiam li havis ok jarojn, alia kiam li havis dek kvin, alia je dek sep, alia je dudek tri, kaj tiel plu. Ĉiuj ĉi evidente estas kvazaŭ sekcioj. Tri-dimensiaj reprezentaĵoj de lia kvar-dimensia ekzisto, kiu estas fiksita kaj nealiigebla estaĵo.”

”Scienculoj”, daŭrigis la tempo-vojaĝanto, paŭzinte por ke ni ĝuste ensorbu tion, ”scias tre bone, ke tempo estas nur speco de spaco. Jen populara scienca figuraĵo, vetera kroniko. La linio, kiun mi sekvas per mia fingro, montras la moviĝon de la barometro. Hieraŭ ĝi estis tiom alta, lastan nokton ĝi falis, hodiaŭ matene ĝi releviĝis, kaj tiel laŭgrade supren ĝis tie.

Certe la hidrargo ne desegnis tiun linion en iu el la direktoj de spaco, kiujn ni ĝenerale konas. Sed certe ĝi faris tian linion, kaj tiu linio, ni devas konkludi, laŭiris la tempo-dimension.”

”Sed”, diris la medicinisto, fikse rigardante karberon en la fajro, ”se tempo vere estas nur kvara dimensio de spaco, kial ĝi estas, kaj kial ĝi ĉiam estis konsiderata kiel io malsama? Kaj kial ni ne povas moviĝi en tempo kiel ni iradas en la aliaj dimensioj de spaco?”

La tempo-vojaĝanto ridetis. ”Ĉu vi estas certa, ke ni povas libere moviĝi en spaco? Dekstren kaj maldekstren ni povas iri, tien kaj reen sufiĉe libere, kaj homoj ĉiam povis. Mi konfesas, ke ni moviĝas libere en du dimensioj. Sed kio pri supren kaj malsupren? La pezoforto limigas nin tie.”

”Ne tute”, diris la medicinisto. ”Ekzistas balonoj.”

”Sed antaŭ la balonoj, krom spasma saltado kaj la neegalajoj de la tersupraĵo, la homoj havis nenian liberon rilate al vertikala moviĝo.”

”Tamen, ili povis iri iomete supren kaj malsupren”, diris la medicinisto.

”Pli facile, multe pli facile malsupren ol supren.”

”Kaj estas neniel eble moviĝi en tempo, estas neeble forlasi la nunan momenton.”

”Amiko mia, jen kie vi malpravas. Jen kie la tuta mondo eraras. Ni ĉiam forlasas la nunan momenton. Nia mensa estado, kiu estas nemateriala kaj posedas neniajn dimensiojn, laŭiras la tempo-dimension je konstanta rapido de la lulilo ĝis la tombo. Ĝuste tiel, kiel ni veturus malsupren, se ni komencus nian ekziston cent kilometrojn super la tersupraĵo.”

”Sed la granda malfacilaĵo estas tio ĉi”, interrompis la psi-

kologo. "Oni povas moviĝi ĉien en spaco, sed estas neeble moviĝi en tempo."

"Jen la ĝermo de mia granda eltrovo. Sed vi malpravas, dirante ke ni ne povas moviĝi en tempo. Ekzemple, se mi rememoras iun okazintaĵon tre klare, mi reiras al la momento de ĝia estiĝo; mi fariĝas distrita, kiel vi diras. Mi saltas reen. Kompreneble, ni havas nenian rimedon por resti tie en la pasinto dum ia tempodaŭro, simile kiel sovaĝulo aŭ besto ne povas resti du metrojn super la tero. Sed civilizulo tiurilate estas pli kapabla ol sovaĝulo. Li povas supreniri en balono kontraŭ la pezoforton, kaj kial li ne esperu, ke fine li povos haltigi aŭ plirapidigi sian vagadon laŭ la tempo-dimensio, aŭ eĉ turniĝi kaj veturi malantaŭen?"

"Ho, *tio*", komencis Filby, "estas tute ..."

"Kial ne?" diris la tempo-vojaĝanto.

"Ĝi kontraŭas racion", diris Filby.

"Kian racion?" demandis la tempo-vojaĝanto.

"Vi povas montri per argumentado, ke nigro estas blanko", diris Filby, "sed vi neniam konvinkos min. "

"Eble ne", diris la tempo-vojaĝanto. "Sed nun vi komencas vidi la celon de miaj esploroj pri la geometrio de kvar dimensioj. Antaŭ longe mi havis malklaran ideon pri maŝino — "

"Por vojaĝi trans tempon!" kriis la tre juna viro.

"Kiu vojaĝos indiferece en kiu ajn direkto de spaco kaj tempo, laŭ la volo de la veturiganto."

Filby nur ridis.

"Sed mi havas eksperimentan pruvon", diris la tempo-vojaĝanto.

"Estus tre utile al la historiisto", sugestis la psikologo. "Oni

povus, ekzemple , reen veturi por prui la akceptitan rakonton pri la batalo de Hastings!”

”Ĉu vi ne opinias, ke vi estus iom elstara?” diris la medicinisto. ”Niaj praavoj ne tre toleris anakronismojn.”

”Oni povus aŭdi la grekan lingvon rekte de la lipoj de Homero kaj Plato”, opiniis la tre juna viro.

”Tiuokaze vi certe malsukcesus, se ili ekzamenus vin. La germanaj kleruloj tiom plibonigis la lingvon.”

”Ankaŭ estas la estonto”, diris la tre juna viro. ”Pensu do! Oni povus investi sian tutan monon, lasi ĝin por procente amasiĝi kaj rapidi antaŭen!”

”Por eltrovi socion”, mi asertis, ”konstruitan sur severe komunisma bazo.”

”El ĉiuj malmoderegaj teorioj — !” komencis la psikologo.

”Jes, ŝajnis tiel ankaŭ al mi, kaj tial mi neniam preparolis ĝin ĝis — ”

”Eksperimenta pruvo!” mi kriis. ”Vi intencas prui *tion*?”

”La eksperimento!” kriis Filby, kies menso ekenuis.

”Almenaŭ ni vidu vian eksperimenton”, diris la psikologo, ”kvankam la tuta afero estas blago, laŭ mi. ”

La tempo-vojaĝanto ridetis al ni. Tiam, ankoraŭ ridetante, kun la manoj profunde en la pantalonpoŝoj, li malrapide eliris el la ĉambro kaj ni aŭdis liajn pantoflojn susuri en la longa koridoro al lia laborejo.

La psikologo rigardis nin. ”Kion li povas havi?”

”Ĵonglaĵon aŭ ion similan”, diris la medicinisto, kaj Filby provis rakonti al ni pri ĵonglaĵo kiun li vidis en Burslem; sed antaŭ ol li finis sian antaŭklarigon, la tempo-vojaĝanto revenis kaj la anekdoto de Filby subite ĉesis.

La afero, kiun mane tenis la tempo-vojaĝanto, estis brilan-

ta kadraĵo el metalo, apenaŭ pli granda ol horloĝeto kaj tre delikate farita. Estis eburo en ĝi kaj ia travidebla kristalaĵo. Kaj nun mi devas esti preciza, ĉar tio, kio sekvas — escepte se lia klarigo estas akceptata — estas absolute nekomprenebla. Li prenis iun el la malgrandaj okangulaj tabloj dismetitaj en la ĉambro kaj starigis ĝin antaŭ la fajro, kun du kruroj sur la mato. Sur tiun ĉi tablon li metis la maŝineton. Tiam li altiris seĝon kaj sidiĝis. La sola alia aĵo sur la tablo estis malgranda ŝirmita lampo, kies brila lumo falis klare sur la modelon. Estis ankaŭ eble dekduo da kandeloj, du en latunaj ingoj sur la kamenbreto kaj la aliaj ĉirkaŭ la ĉambro, kiu estis, pro tio, brilege lumigata. Mi sidis en malalta brakseĝo, plej proksime al la fajro kaj mi antaŭentiris ĝin por ke mi estu preskaŭ inter la tempo-vojaĝanto kaj la fajrejo. Filby sidis malantaŭ li, supervidante lian ŝultron. La medicinisto kaj la urbestro rigardis lian profilon de dekstre, la psikologo de maldekstre. La tre juna viro staris malantaŭ la psikologo. Ni ĉiuj estis viglegaj. Ŝajnas al mi nekredeble, ke en tiuj kondiĉoj ia trompaĵo povus superruzi nin, kiel ajn subtile aranĝita kaj lerte farita ĝi estu.

La tempo-vojaĝanto rigardis unue nin kaj poste la aparaton. "Nu?" diris la psikologo.

"Tiu ĉi afereto", diris la tempo-vojaĝanto, apogante siajn kubutojn sur la tablon kaj kunpremante la manojn super la aparato, "estas nur modelo. Ĝi estas mia projekto por maŝino, kiu veturos trans tempon. Vi rimarkos, ke ĝi aspektas kurioze malrekta kaj ke estas stranga brileta aspekto pri tiu aĵeto kvazaŭ ĝi iel estus nereala." Li fingromontris la parton. "Plue, jen unu blanka stangeto kaj jen alia."

La medicinisto leviĝis de sia seĝo kaj atente rigardis la aparaton. "Bele farita ĝi estas", li diris.

"Ĝia farado bezonis du jarojn", asertis la tempo-vojaĝanto. Poste, kiam ni ĉiuj estis imitintaj la agon de la medicinisto, li diris: "Nu, vi devas klare kompreni, ke tiu ĉi stangeto, kiam ĝi estas movita, kaŭzas ke la maŝino flugu en la estonton, kaj la alia maligas la direkton de la veturado. Tiu ĉi selo reprezentas la sidejon de tempo-vojaĝanto. Mi baldaŭ tuŝos la stangeton, kaj la maŝino ekforiros. Ĝi pasos en estontan tempon kaj malaperos. Zorge rigardu ĝin. Rigardu ankaŭ la tablon kaj certigu, ke estas nenia trompaĵo. Mi ne volas perdi tiun modelon kaj tiam esti nomata ĉarlatano."

Estis paŭzo, eble unuminuta. La psikologo ŝajne volis diri ion al mi, sed ŝangis la intencon. Tiam la tempo-vojaĝanto almetis sian fingron al la stangeto. "Ne", li subite diris. "Donu al mi vian manon." Kaj turniĝante al la psikologo, li prenis ties manon en la sian kaj petis, ke li elmetu la montrofingron. Tiel do, estis la psikologo mem, kiu ekveturigis la modelan tempo-maŝinon sur ĝia senfina vojaĝo. Ni ĉiuj vidis la moviĝon de la stangeto. Mi estas tute certa, ke okazis nenia trompaĵo. Estis venteto kaj la lampoflamo saltis. Unu el la kandeloj estingiĝis kaj la maŝineto ekturnis sin, malklariĝis, aspektis fantoma eble dum unu sekundo, kiel kirlaĵo de malhele briletantaj latuno kaj eburo; kaj ĝi estis formalaperinta! Krom la lampo, nenio restis sur la tablo.

Dum unu minuto ĉiu silentis. Tiam Filby blasfemis.

La psikologo ekvekiĝis el sia letargio kaj subite rigardis sub la tablon. Pro tio la tempo-vojaĝanto gaje ridis. "Nu?" li diris, memorante la antaŭan ekkcion de la psikologo. Tiam li

leviĝis, iris al la tabakujo sur la kamenbreto kaj, kun la dorso turnita al ni, li plenigis sian pipon.

Ni rigardis unuj la aliajn. "Aŭskultu do", diris la medicinisto, "ĉu vi estas sincera pri tio ĉi? Ĉu vi serioze opinias, ke la maŝino ekiris en tempon?"

"Certe", diris la tempo-vojaĝanto, kliniĝante al la fajro por bruligi paperpecon. Tiam li turnis sin, bruligis sian pipon kaj rigardis la vizaĝon de la psikologo. (La psikologo, por montri, ke li ne estas nerva prenis cigaron kaj provis bruligi ĝin netranĉita.) "Plue, mi havas grandan maŝinon preskaŭ finitan tie" — li indikis la laborejon" kaj kiam tio estos muntita mi intencas mem fari vojaĝon."

"Vi volas diri, ke tiu maŝino veturis en la estonton?" diris Filby.

"En la estonton aŭ la pasinton — mi ne tute scias."

Post paŭzo la psikologo ekhavis inspiron. "Ĝi certe iris en la pasinton, se ĝi ja iris ien", li diris.

"Kial?" demandis la tempo-vojaĝanto.

"Ĉar supozeble ĝi ne moviĝis en spaco, kaj se ĝi veturis en la estonton ĝi ankoraŭ nun estus tie ĉi, pro tio, ke ĝi estus devinta travojaĝi la nunan tempon."

"Sed", mi diris, "se ĝi veturis en la pasinton, ni estus vidintaj ĝin kiam ni unue eniris tiun ĉi ĉambron; kaj lastan ĵaŭdon kiam ni estis tie ĉi, kaj la antaŭan ĵaŭdon, kaj tiel plu!"

"Gravaj argumentoj", senpartie diris la urbestro, turnante sin al la tempo-vojaĝanto.

"Tute ne", diris la tempo-vojaĝanto kaj, al la psikologo: "Vi pensu. Vi povas klarigi tion. Ĝia malsupera prezento, vi sci-as, diluita prezento."

"Kompreneble", diris la psikologo kaj recertigis al ni. "Tio

estas simpla punkto de psikologio. Mi estus devinta pripensi ĝin. Ĝi estas sufiĉe klara kaj bonege helpas al la paradokso. Ni povas nek vidi nek konstati tiun ĉi maŝinon, ĝuste kiel ni ne povas vidi la radion de rapide turniĝanta rado, aŭ kugleton flugantan en spaco. Se ĝi travojaĝas tempon kvindekoble aŭ centoble pli rapide ol ni, se ĝi trapasas minuton dum ni trapasas sekundon, la impresoj, kiujn ĝi kreas, estas kompreneble nur kvindekono aŭ centono de tiu, kiujn ĝi faras, se ĝi ne veturus en tempo. Tio estas tute klara." Li pasigis la manon tra la spaco, kie antaŭe staris la maŝino. "Ĉu vi vidas?" li diris ridante.

Ni sidis kaj fikse rigardis la malplenan tablon dum unu minuto. Tiam la tempo-vojaĝanto demandis nin, kion ni pensas pri la afero.

"Ŝajnas sufiĉe kredeble hodiaŭ vespere", diris la medicinisto, "sed atendu ĝis morgaŭ. Atendu la prudenton de la mateno."

"Ĉu vi ŝatus vidi la tempo-maŝinon mem?" la tempo-vojaĝanto demandis. Kaj je tio, prenante la lampon en la manon, li kondukis nin laŭ la longa trablovata koridoro al sia laborejo. Mi memoras la ekbrilantan lumon, la silueton de lia stranga larĝa kapo, la dancadon de la ombroj, la manieron laŭ kiu ni ĉiuj sekvis lin, scivoleme sed nekredeme, kaj kiel tie en la laborejo ni rigardis pli grandan faraĵon dela maŝineto kiun ni jam vidis malaperi de antaŭ niaj okuloj. Partoj estis el nikelo, partoj el eburo, partoj certe estis fajlitaj aŭ segitaj el rokkristalo. La afero ĝenerale estis kompleta, sed la torditaj kristalaĵoj kuŝis nefinitaj sur la labortablo apud kelkaj desegnoj, kaj mi prenis iun por pli bone rigardi ĝin. Kvarco ĝi ŝajnis esti.

"Nu do", diris la medicinisto, "ĉu vi estas absolute serioza?"

Aŭ ĉu tio ĉi estas blufado — simile al tiu fantomo, kiun vi montris al ni lastan Kristnaskon?”

”Sur tiu maŝino”, diris la tempo-vojaĝanto, alte tenante la lampon, ”mi intencas esplori tempon. Ĉu tio estas klara? Neniam mi estis pli serioza dum mia tuta vivo.”

Neniu el ni plene sciis kiel akcepti tion.

Mi trafis la okulon de Filby super la ŝultro de la medicinisto, kaj solene li palpebrumis al mi.

Ĉapitro II

Mi opinias, ke je tiu tempo neniu el ni tute kredis je la tempo-maŝino. Fakte, la tempo-vojaĝanto estis unu el tiuj homoj kiuj estas tro lertaj por esti kredataj: oni neniam sentis, ke oni povus kredi lin, oni ĉiam suspektis ian subtilan rezervon, ian lertecon kaŝitan malantaŭ lia klara sincereco. Se Filby estus montrinta la modelon kaj klariginta la aferon en la vortoj de la tempo-vojaĝanto, ni estus montrintaj al li multe malpli da dubo. Ĉar ni vidus liajn motivojn: eĉ porkbuĉisto povus kompreni Filby. Sed la tempo-vojaĝanto havis iom da kaprico inter siaj ecoj, kaj ni malfidis lin. Aferoj, kiuj bonfamigus malpli lertan homon, ŝajnis ĉe li kiel ĵonglaĵoj. Estas eraro tro facile fari aferojn. La seriozuloj, kiuj rigardis lin serioze, neniam estis tute certaj pri lia sintenado: ili iel konstatis, ke fidi al li siajn reputaciojn pri juĝo estis kvazaŭ ekipi infanejon per ovoŝela porcelano. Mi kredas tial, ke neniu el ni multon diris pri tempo-vojaĝado dum la periodo inter tiu ĵaŭdo kaj la posta, kvankam ĝiaj strangaj eventualaĵoj estis sendube en la mensoj de la plej multaj el ni: ĝia verŝajno, tio estas ĝia praktika nekredablo, la strangaj ebloj de anakronismo kaj de la plena konfuzo kiun tio sugestis. Miaflanke, mi aparte pripensis la malaperigon de la modelo. Mi memoras, ke mi diskutis tion kun la medicinisto, kiun mi renkontis vendredon en la Linnæa Klubo. Li diris, ke li vidis similan aferon en Tü-

bingen kaj li tre akcentis la estingon de la kandelo. Sed kiamaniere la trompaĵo estis farata, li ne povis klarigi.

La postan ĵaŭdon mi ree iris al Richmond — supozeble mi estis unu el la plej oftaj gastoj de la tempo-vojaĝanto — kaj alvenante malfrue, trovis kvar aŭ kvin virojn jam en lia salono. La medicinisto staris antaŭ la fajro kun paperfolio en unu mano kaj poŝhorloĝo en la alia. Mi ĉirkaŭserĉis la tempo-vojaĝanton, kaj — ”Estas jam la sepa kaj duono”, diris la medicinisto, ”eble ni komencu la vespermanĝon?”

”Kie estas — ?” mi diris, nomante nian gastiganton.

”Ĉu vi ĵus venis? Estas iom strange. Li estas neeviteble detenata. Li petas en tiu ĉi noto, ke mi komencigu la vespermanĝon je la sepa, se li ankoraŭ ne revenis. Li diras, ke li klarigos, kiam li venos.”

”Estus domaĝe, se la manĝaĵo malboniĝus”, diris la redaktoro de bone konata tagĵurnalo; kaj je tio la kuracisto sonorigis.

La psikologo estis la sola homo, krom la kuracisto kaj mi, kiu ĉeestis la antaŭan vespermanĝon. La aliaj viroj estis la menciita redaktoro, iu ĵurnalisto kaj alia — kvieta, timema viro kun barbo — kiun mi ne konis, kaj kiu, laŭ mia observado, dum la tuta vespero neniam malfermis la buŝon. Estis iom da konjektado ĉe la manĝotablo pri la foresto de la tempo-vojaĝanto, kaj duonŝerce mi sugestis tempo-vojaĝadon. La redaktoro petis klarigon pri tio, kaj la psikologo volonte donis lignecan raporton pri la ”lerta paradokso kaj trompaĵo”, kiujn ni vidis antaŭ precize unu semajno. Li estis meze de sia klarigo, kiam la koridora pordo malfermiĝis malrapide kaj senbrue. Mi frontis al la pordo kaj estis la unua kiu vidis ĝin. ”Halo!” mi diris. ”Finfine!” Kaj la pordo pli larĝe malfermiĝis

kaj la tempo-vojaĝanto staris antaŭ ni. Mi pro surprizo ekkriis. "Ĉielo! Kio okazis?" kriis la medicinisto, kiu poste vidis lin. Kaj la tuta aro ĉe la tablo turniĝis al la pordo.

Li estis en mirige aĉa stato. Lia jako estis polvokovrita kaj malpura, kaj ŝmirita verde sur la manikoj; lia hararo estis malordigita kaj, ŝajnis al mi, pli griza — aŭ pro polvo kaj malpuraĵo, aŭ ĉar la koloro efektive malheliĝis. Lia vizaĝo estis fantome pala; lia mentono havis brunan tranĉvundon, vundon duone resaniĝintan; lia mieno estis sovaĝa kaj kuntirita, kvazaŭ pro suferego. Dum momento li hezitis ĉe la pordo, kvazaŭ la lumo blindigus lin. Tiam li eniris la ĉambron. Li marŝis kun ĝuste tia lameco, kian mi vidis ĉe piedlaciaj vaguloj. Ni rigardegis lin silente, atendente ke li parolu.

Li diris neniun vorton, sed venis dolore al la tablo, kaj faris ekmovon al la vino. La redaktoro plenigis glason de ĉampano kaj alpuŝis ĝin al li. Li trinkegis ĝin kaj ŝajne ĝi plibonigis lin; ĉar li rigardis ĉirkaŭ la tablon kaj fantomo de lia antaŭa rideto ekbrilis sur lia vizaĝo. "Pro ĉielo, kion vi faris?" diris la kuracisto. La tempo-vojaĝanto ŝajne ne aŭdis. "Mi ne ĝenu vin", li diris laŭ ia balbuta parolmaniero, "mi fartas tute bone." Li ĉesis, eltenis sian glason por pli, kaj ĉiom trinkegis. "Tio bona", li diris. Liaj okuloj pliheliĝis kaj eta koloro aperis sur la vangoj. Lia rigardo ektrafis niajn vizaĝojn kun ia malvigla aprobo kaj tiam ĉirkaŭvagis la varman kaj komfortan ĉambron. Tiam li ree parolis, ankoraŭ kvazaŭ pene trovanta la vortojn. "Mi lavos kaj alivestos min, kaj tiam mi revenos por klarigi la aferon... Konservu por mi iom de tiu ŝafaĵo. Mi avidegas pecon da viando."

Li rigardis al la redaktoro, kiu estis malofta vizitanto, kaj esperis, ke tiu estas bonsana. La redaktoro komencis deman-

don. "Diros al vi baldaŭ", diris la tempo-vojaĝanto. "Mi estas — stranga! Estos pli bone tuj."

Li remetis sian glason kaj marŝis al la ŝtupara pordo. Denove mi rimarkis lian lamecon kaj la mallaŭtan susuradon de liaj piedfrapetoj, kaj ekstarante mi vidis liajn piedojn dum li eliris. Li portis sur ili nenion krom paro de ŝiritaj sangomakulitaj ŝtrumpetoj. Tiam la pordo fermiĝis malantaŭ li. Mi preskaŭ decidis sekvi lin, ĝis mi memoris, kiel li malŝatas ĉian zorgadon pri si mem. Dum eble unu minuto miaj pensoj vagis. Tiam, pensante (laŭ sia profesio) en ĉeftitoloj, la redaktoro diris, "Rimarkinda Konduto de Eminentia Sciencisto!" Kaj tio ĉi redirektis mian atenton al la brila manĝotablo.

"Kion li ludaĉas?" diris la ĵurnalisto. "Ĉu li provis la almazarton? Mi ne komprenas." Mi trafis la rigardon de la psikologo kaj legis mian propran klarigon sur lia vizaĝo. Mi pensis pri la tempo-vojaĝanto dolore lamanta supren. Mi kredas, ke neniu alia estis rimarkinta lian lamecon.

La unua, kiu ekperdis sian surprizon, estis la medicinisto, kiu sonorigis por varma telero — la tempo-vojaĝanto malŝatis, ke servistoj atendadu ĉe la tablo. Je tio la redaktoro kun ekgrunto turnis sian forkon, kaj la silentulo imitis lin. La manĝo rekomenciĝis. Dum iom da tempo la konversacio konsistis el krietoj, kun paŭzoj de miro; kaj tiam la redaktoro fervoriĝis en sia scivolemo. "Ĉu nia amiko pligrandigas siajn modestajn enspezojn per stratbalaado? aŭ ĉu li foje imitas Nabukodonosoron?" li demandis. "Mi estas certa, ke temas pri tiu ĉi afero de la tempo-maŝino", mi diris, kaj daŭrigis la rakonton de la psikologo pri nia antaŭa kunveno. La novaj gastoj ne kaŝis sian nekredemon. La redaktoro starigis protestojn. "Kio estas tiu ĉi tempo-vojaĝado; viro ne povus kovri sin

per polvo ruliĝante en paradokso, ĉu?” Kaj kiam la ideo iĝis pli familiara, li karikaturis. ”Ĉu oni ne havas vestobrosojn en la estonto?” La ĵurnalisto ankaŭ rifuzis kredi, kaj helpis la redaktoron en facila tasko, nome, la ridindigo de la tuta afero. Ili ambaŭ estis el la nova speco de ĵurnalisto — tre gajaj, malpiaj junuloj. ”Nia Speciala Korespondanto en la Raporto por la Tago post Morgaŭ”, la ĵurnalisto estis diranta — aŭ pli ĝuste krieganta — kiam revenis la tempo-vojaĝanto. Li surportis ordinaran vespervestaron, kaj krom lia sufereca mieno, nenio restis de la ŝanĝiĝo kiu antaŭe surprizegis min.

”Jen do”, gajege diris la redaktoro, ”tiuj ĉi uloj diras, ke vi ĵus vojaĝis en la mezon de la venonta semajno! Diru al ni pri eta Rosebery, ĉu? Kiom vi volas por la tuta rakonto?”

La tempo-vojaĝanto iris senvorte al la loko por li rezervita. Li ridetis laŭ sia antaŭa maniero. ”Kie estas mia ŝafaĵo?” li diris. ”Kia ĝojo denove piki forkon en viandon!”

”Rakonton!” kriis la redaktoro.

”Malbenu la rakonton!” diris la tempo-vojaĝanto. ”Mi volas manĝi. Mi ne diros unu vorton ĝis mi havos iom da pepino en miajn vejnojn. Dankon, kaj la salon.”

”Unu vorton”, mi diris. ”Ĉu vi tempo-vojaĝis?”

”Jes”, plenbuŝe diris la tempo-vojaĝanto, skuante sian kapon.

”Mi donus unu ŝilingon por ĉiu linio de laŭvorta raporto”, diris la redaktoro. La tempo-vojaĝanto puŝis sian glason al la silentulo kaj tintigis ĝin per la fingrongo; pro kio la silentulo, kiu estis fikse rigardinta lian vizaĝon, ektemis kaj enverŝis por li iom da vino. La cetera parto de la manĝo estis malkomforta. Miaflanke, subitaj demandoj venadis al miaj lipoj, kaj sendube estis same ĉe la aliaj. La ĵurnalisto penis plifaciligi la

streĉitan atmosferon per rakontoj pri Hettie Potter. La tempo-vojaĝanto dediĉis sian atenton al sia manĝo kaj montris la apetiton de vagisto. La medicinisto fumis cigaredon kaj rigardis la tempo-vojaĝanton tra siaj okulharoj. La silentulo aspektis eĉ pli mallerta ol kutime kaj trinkis ĉampanon regule kaj decide pro nervemo. Fine la tempo-vojaĝanto forpuŝis sian teleron kaj rigardis al ni. "Supozeble mi devas peti vian pardonon", li diris. "Mi malsategis. Mi ĵus havis treege mirigan sperton." Li etendis la manon por cigaro kaj tranĉis la finaĵon. "Sed venu en la fumsalonon. Ĝi estas tro longa rakonto por dirado super grasaj teleroj." Kaj sonoriginte, li kondukis nin en la apudan ĉambron.

"Ĉu vi sciigis ilin pri la maŝino?" li diris al mi, kliniĝante komforte en sia seĝo kaj nomante la tri novajn gastojn.

"Sed la afero estas nura paradokso", diris la redaktoro.

"Mi ne povas argumenti hodiaŭ vespere. Mi volonte diros al vi la rakonton, sed mi ne povos argumenti. Mi rakontos al vi", li daŭrigis, "pri tio, kio okazis al mi, se vi volas, sed vi devos ne interrompi. Mi volas rakonti ĝin. Treege. La plimulto el ĝi ŝajnos kvazaŭ mi mensogas. Nu! Ĝi estas tamen vera — ĉiu vorto. Mi estis en mia laborejo je la kvara, kaj de tiam ... mi travivis ok tagojn ... tiajn tagojn, kiajn neniu homo antaŭe travivis. Mi estas preskaŭ ellacigita, sed mi ne povos dormi ĝis mi diris tiun ĉi aferon al vi. Tiam mi enlitiĝos. Sed neniam interrompoj! Ĉu konsentite?"

"Konsentite", diris la redaktoro, kaj ni aliaj eĥis "Konsentite." Kaj je tio la tempo-vojaĝanto komencis sian rakonton, kiel mi skribos ĝin. Li klinis sin malantaŭen en la seĝo unue kaj parolis kiel laculo. Poste li fariĝis pli vigla. Skribante ĝin mi sentegas la netaŭgecon de plumo kaj inko — kaj super ĉio

mian propran netaŭgecon — por esprimi la kvaliton. Vi legos, mi supozas, sufiĉe atente, sed vi ne povas vidi la blankan, sinceran vizaĝon de la parolanto en la brila cirklo de la lampeto, nek aŭdi la tonon de lia voĉo. Vi ne povas scii, kiel lia akcento sekvis la punktojn de la rakonto! La plimulto el ni aŭdantoj estis en la ombro, ĉar oni ne estis bruliginta la kandelojn en la fumsalono, kaj estis videblaj nur la vizaĝo de la ĵurnalisto kaj la kruroj de la silentulo de la genuoj malsupren. Komence ni foje ekrigardis unuj la aliajn. Post iom da tempo ni ĉesis fari tion, kaj rigardis nur la vizaĝon de la tempo-vojaĝanto.

Ĉapitro III

Mi diris al kelkaj el vi lastan jaŭdon pri la principoj de la tempo-maŝino, kaj montris al vi la aferon mem, nefinitan en la laborejo. Tie ĝi estas nun, iom vojaĝlaca, estas vere; kaj unu el la eburaj stangetoj estas fendita kaj latuna relo kurbita; sed la cetero estas tute bonorda. Mi esperis fin-konstrui ĝin vendredon; sed je vendredo, kiam la muntado estis preskaŭ finita, mi trovis, ke unu el la nikelaj stangetoj estas precize du centimetrojn tro mallonga, kaj tion mi devis ripari; tial la afero ne estis kompleta ĝis hodiaŭ matene. Estis je la deka hodiaŭ, kiam la unua el ĉiuj tempo-maŝinoj komencis sian karieron. Mi donis al ĝi finan frapeton, reprovigis ĉiujn ŝraŭbojn, metis unu guton da oleo sur la kvarcpeceton kaj sidiĝis sur la selon. Mi supozas, ke sinmortigonto, kiu tenas pistolon ĉe sia kranio, sentas iom similan sciemon pri tio, kio sekvos, kiel mi tiam sentis. Mi tenis la funkciigilon per unu mano kaj la haltigilon per la alia, premis la unuan kaj preskaŭ tuj la duan. Mi ŝajnis ŝanceliĝi; mi sentis inkuban sensacion de falado; kaj, ĉirkaŭrigardante, mi vidis la laborejon precize kia ĝi estis antaŭe. Ĉu io estis okazinta? Dum momento mi suspektis, ke mia intelekto trompis min. Tiam mi rimarkis la horloĝon. Momenton antaŭe, kiel ŝajnis, ĝi indikis unu-du minutojn post la deka; nun estis preskaŭ la tria kaj duono.

”Mi enspiris, kunpremis la dentojn, prenis la funkciigilon

per ambaŭ manoj, kaj ekiris kun brueto. La laborejo fariĝis malhela kaj poste tute malluma. Sinjorino Watchett eniris kaj marŝis, ŝajne nevidante min, al la ĝardeno pordo. Supozeble ŝi bezonis unu minuton por transiri la lokon, sed al mi ŝi ŝajnis flugi trans la ĉambron kiel raketo. Mi puŝis la ilon ĝis la pleja eblo. La nokto venis kiel la estingo de lampo kaj post plia momento venis la morgaŭo. La laborejo fariĝis nebulece malklara kaj tiam pli kaj pli malluma. La posta nokto nigre venis, tiam tago, nokto, tago ree, ĉiam pli rapide. Kirliĝanta murmurado plenigis miajn orelojn, kaj ia stranga, muta konfuzo eniris mian menson.

”Mi bedaŭras, ke mi ne povas klarigi la apartajn sensaciojn de tempo-vojaĝado. Ili estas treege malagrablaj. Estas sento ĝuste simila al tio, kion oni havas sur tiuj groteskaj fervojoj en la amuzejoj, kiuj krutege iras supren kaj malsupren, sento de nekontrolebla rapidega moviĝo! Mi sentis ankaŭ la saman teruran antaŭtimon pri proksimega frakasiĝo. Dum mi ankoraŭ pli rapidis, nokto sekvis tagon kiel la batado de ia nigra birdoflugilo. La malklara konturo de la laborejo baldaŭ ŝajnis forfali de mi, kaj mi vidis la sunon rapidanta trans la ĉielon, supersaltanta ĝin ĉiumomente, kaj ĉiu minuto indikis unu tagon. Mi supozis, ke la laborejo detruigis kaj ke mi eliris en la plenaeron. Mi havis malklaran impreson pri trabaro, sed mi jam iris tro rapide por konscii pri moviĝantaj aĵoj. La plej malrapida limako, kiu iam rampis, preterkuris tro rapide por mi. La ekbrila serio de nigro kaj lumo estis treege doloriga al la okuloj. Tiam, en la intermita mallumo mi vidis la lunon turniĝi rapide tra siaj fazoj, de nova ĝis plena, kaj ekvidis la rondirantajn stelojn. Baldaŭ, dum mi pluiris ankoraŭ pli kaj pli rapide, la alternado de nokto kaj tago fariĝis daŭra

grizo; la ĉielo ricevis mirigan bluecon, belegan lumigan koloron, kiel tiu de frua krepusko; la saltanta suno fariĝis strio el fajro, brilanta arko en spaco; la luno fariĝis pli malklara, ŝanĝiĝanta rubando; kaj mi tute ne povis vidi la stelojn, krom de tempo al tempo pli hela cirklo briletanta en la bluo.

”La pejzaĝo estis nebuleta kaj malhela. Mi estis ankoraŭ sur la monteto, sur kiu nun staras tiu ĉi domo, kaj griza kaj malluma la supro superklinis min. Mi vidis arbojn kreski kaj ŝanĝiĝi kiel vapornuboj, jen brunaj, jen verdaj; ili kreskis, etendiĝis, tremis kaj forpasis. Mi vidis grandegajn konstruaĵojn leviĝi neklaraj kaj belaj kaj preterpasi kiel songoj. La tuta supraĵo de la tero aspektis ŝanĝita — fluidiĝanta kaj fluanta sub miaj okuloj. La etaj indikiloj sur la ciferplatoj, kiuj registris mian rapidon, rondkuris ĉiam pli rapide. Baldaŭ mi rimarkis, ke la sunstrio svingiĝis supren kaj malsupren, de solstico al solstico dum unu minuto aŭ eĉ malpli, kaj ke, sekve, mia rapido estis pli ol unu jaro ĉi minute; kaj minuton post minuto la blanka neĝo brilegis trans la mondon kaj malaperis, kaj sekvis ĝin la hela, mallonga verdo de la printempo.

”La malagrablaj sentoj de la komenco nun estis malpli pikaj. Ili kunfandiĝis fine en ia histeria ĝojego. Mi efektive rimarkis malgracian balanciĝon de la maŝino, kiun mi ne komprenis. Sed mia menso estis tro konfuzita por atenti tion, tial, kun ia frenezeco superreganta min, mi ĵetis min en la estonton. Komence mi apenaŭ pripensis halton, apenaŭ pripensis ion ajn krom tiuj ĉi novaj sentoj. Sed baldaŭ nova serio da impresoj kreskis en mia menso — ia scivolemo, kaj kun tio ia timo — ĝis fine ili tute posedis min. Kiaj strangaj evoluoj de la homaro, kiaj mirigaj progresoj de nia primitiva civilizo, mi

pensis, eble aperos kiam mi pli proksime rigardos en la nekularan neprecizan mondon, kiu rapidegas preter miaj okuloj! Mi vidis ekesti ĉirkaŭ mi grandiozajn kaj belajn arkitekturaĵojn, pli grandajn ol iuj ajn konstruaĵoj de nia epoko, kaj tamen, kiel ŝajnis, faritajn el brileco kaj nebuleco. Mi vidis pli riĉan verdon suprenflui la monteton kaj resti tie sen ia vintra intermito. Eĉ tra la vualo de mia konfuzo la tero aspektis tre bela. Kaj tiel mia menso turniĝis al la problemo de mia halto.

”La neordinara risko troviĝis en la fakto, ke eble mi trovos ian substancon en la spaco, kiun okupas mi aŭ la maŝino. Kondiĉe ke mi veturis trans tempon je granda rapido, tio apenaŭ gravis; mi estis kvazaŭ maldikigita — mi traglitis kiel vaporo la interspacojn de barantaj substancoj! Sed ekhalti signifis, ke mi ĵetegas min, molekulon post molekulo, en kion ajn baras mian vojon; signifis, ke miaj atomoj venos en tiel intiman kontakton kun tiuj de la substanco, ke ia profunda kemia reago — eble terura eksplodo — rezultos, kaj disblovegos min kaj mian aparaton ekster ĉiujn dimensiojn — en la nekonaton. Tiun ĉi eblon mi pripensis fojon post fojo dum mi fabrikis la maŝinon; sed tiam mi gaje akceptis ĝin kiel neeviteblan riskon — iun el la riskoj, kiujn homoj devas toleri! Sed kiam la risko estis aktuala, mi ne plu tiel gaje rigardis ĝin. Efektive, senkonscie, la absoluta strangeco de ĉio, la naŭzaj ekskuoj kaj ŝanceliĝoj de la maŝino, super ĉio la sento de daŭra falado, estis tute renversintaj miajn nervojn. Mi diris al mi, ke mi neniam povos halti, kaj kun kolereta sento mi decidis jam nun halti. Kiel senpacienca stultulo, mi ŝovis la haltigilon, kaj tuj la maŝino tremegis kaj ĵetis min en la aeron.

”En miaj oreloj estis la sono de tondro. Eble dum momento mi estis senkonscia. Senkompata hajlo siblis ĉirkaŭ mi, kaj

mi trovis, ke mi sidas sur malseka herbaĵo antaŭ la renversita maŝino. Ĉio ankoraŭ ŝajnis griza, sed baldaŭ mi rimarkis, ke la konfuzo en miaj oreloj jam ĉesis. Mi ĉirkaŭrigardis. Mi estis sur kio verŝajne estis malgranda herbejo en ĝardeno, borderita de rododendroj, kaj mi rimarkis, ke iliaj malvaj kaj purpuraj floroj disfalis pro la batado de la hajlo. La saltantaj, dancantaj hajleroj pendis nube super la maŝino, kaj vagis sur la tero kiel vaporo. Post momento mi estis malsekega. 'Bela bonvenigo', mi diris, 'al viro. kiu veturis nekalkuleblajn jarojn por vidi vin.'

"Baldaŭ mi pensis, ke estas stulte malsekiĝi. Mi ekstaris kaj ĉirkaŭrigardis. Preter la rododendroj kaj tra la nebuleca hajlado aperis kolosa figuro, ŝajne skulptita el ia blanka ŝtono. Sed la cetera ĉirkaŭaĵo estis nevidebla.

"Miaj sentoj estus malfacile klarigeblaj. Kiam la kolonoj de hajlo maldensiĝis, mi vidis pli klare la blankan figuron. Ĝi estis tre granda, ĉar betularbo tuŝis ĝian ŝultron. Ĝi estis el blanka marmoro, laŭ formo iel simila al flugilhava sfinkso, sed anstataŭ kuŝi vertikale ĉe la flankoj, la flugiloj etendigis tiel ke ĝi ŝajnis ŝvebi. Okazis, ke la vizaĝo estis turnita al mi; la senvidaj okuloj ŝajnis rigardi min; sur la lipoj estis eta rido. Ĝi estis tre vetertuŝita, kaj tio kaŭzis malagrablan senton pri malsano. Mi rigardis ĝin dum iom da tempo — duonminuton eble, aŭ duonhoron. Fine dum momento mi fortiris de ĝi mian rigardon, kaj mi vidis, ke la hajlo preskaŭ ĉesis kaj ke la ĉielo pliheliĝas pro la aperonta suno.

"Mi reregardis la kaŭrantan blankan formon, kaj mi subite konsciiĝis pri la plena malprudento de mia vojaĝo. Kio povos aperi kiam tiu nebuleca hajlokurteno estos tute fortirita? Kio povas esti okazinta al la homaro? Supozu, ke krueleco

fariĝis ordinara pasio? Supozu, ke dum la intertempo la raso perdis sian virecon kaj evoluis al io nehoma, nesimpatia kaj superpotenca? Eble mi aspektos kiel ia primitiva sovaĝbesto, des pli terura kaj abomena pro nia komuna simileco — naŭza estaĵo, kiun oni tuj mortigos.

”Jam mi vidis aliajn vastajn formojn — grandegajn konstruaĵojn kun komplikaj parapetoj kaj altaj kolonoj, kun arbokovrita monteto kiu aperis al mi tra la ĉesanta ŝtormo. Subite mi timegis. Mi turniĝis freneze al la tempo-maŝino kaj forte klopodis reĝustigi ĝin. Samtempe la sunradioj tratrafis la ŝtormon. La griza hajlado estis forpuŝata kaj malaperis kiel la trenantaj vestoj de fantomo. Super mi, en la intensa bluo de la somera ĉielo, kelkaj brunetaj strioj de nubo kirliĝis al nenieco. La grandiozaj konstruaĵoj ĉirkaŭ mi elstaris klaraj kaj distingeblaj, respegalantaj pro la malseko de la ŝtormo, kaj blanke makulita de la ankoraŭ ne akviĝintaj hajleroj, kiuj kelkloke amasiĝis. Mi sentis min nuda en ĉi fremda mondo. Tio estas, kiel birdo eble sentas sin en la klara aero, sciante ke la akcipitro supre estas tuj alflugonta. Mia timo fariĝis frenezeco. Mi paŭzis por enspiri, kunpremis la dentojn, kaj denove luktis furioze, mane kaj genue, kun la maŝino. Ĝi cedis pro mia freneza atako, kaj renversiĝis. Ĝi forte frapis mian mentonon. Kun unu mano sur la selo, kaj la alia sur la funkciigilo, mi staris spiregante, preta por suriĝi.

”Sed kun tiu rericivo de mia rimedo por tuja foriro, mia kuraĝo revenis. Mi rigardis tiun ĉi mondon de la malproksima estonto pli scivoleme kaj malpli timeme. En ronda truo, alte en la muro de iu el la apudaj domoj, mi vidis grupon de figuroj en riĉaj, molaj vestoj. Ili jam vidis min, kaj iliaj vizaĝoj estis turnitaj al mi.

”Tiam mi aŭdis alproksimiĝantajn voĉojn. Venantaj tra la arbustoj ĉe la blanka sfinkso estis la kapoj kaj ŝultroj de viroj kurantaj. Unu el tiuj eliris sur vojeton, kiu kondukis rekte al la herbejeto, kie mi staris kun mia maŝino. Li estis malgranda estaĵo — eble alta je 120 cm — vestita per purpura tuniko kun leda zono ĉe la talio. Sandaloj aŭ kotornoj — mi ne povis klare distingi — estis sur liaj piedoj; liaj kruroj estis nudaj ĝis la genuoj kaj li ne portis ĉapelon. Vidante tion, mi je la unua fojo rimarkis, kiel varma estas la aero.

”Li impresis min kiel tre bela kaj gracia estaĵo, sed neimageble nefortika. Lia ruĝeta vizaĝo memorigis al mi la pli belan specon de ftizulo — tia febra beleco, pri kiu ni antaŭe ofte aŭdis. Vidante lin, mi subite retrovis konfidon. Mi prenis miajn manojn de sur la maŝino.”

Ĉapitro IV

Post momento ni staris vizaĝon kontraŭ vizaĝo, mi kaj tiu ĉi malforta estaĵo el la estonto. Li venis rekte al mi kaj ridis en miajn okulojn. La manko de ia timo en lia mieno trafis min tuj. Tiam li turnis sin al la du aliaj, kiuj sekvis lin, kaj parolis al ili per stranga kaj tre dolĉa kaj flua lingvo.

”Aliaj venis, kaj baldaŭ ĉirkaŭis min malgranda grupo de eble ok aŭ dek el tiuj ĉi elegantaj hometoj. Unu el ili alparolis min. Estas strange, ke venis al mi la penso, ke mia voĉo estas tro raŭka kaj basa por ili. Mi tial skuis la kapon, kaj, indikante miajn orelojn, reskuis ĝin. Li antaŭenpaŝis, hezitis, kaj tiam palpis mian manon. Tiam mi sentis aliajn molajn fingretojn sur miaj dorso kaj ŝultroj. Ili volis certigi, ke mi estas reala. En tio estis nenio timiga. Efektive, estis io pri tiuj ĉi belaj hometoj, kio inspiris konfidon — gracia ĝentileco, ia infana naiveco. Plue, ili aspektis tiel malfortikaj, ke supozeble mi povus disĵeti la tutan dekduon kiel keglojn. Sed mi faris subitan movon por averti ilin, kiam mi vidis iliajn rozkolorajn manetojn palpi la tempo-maŝinon. Feliĉe, tiam, kiam ne estis tro malfrue, mi pensis pri danĝero, kiun mi antaŭe forgesis, kaj klinante min super la relojn de la maŝino, mi malŝraŭbis la ilojn, kiuj funkciigas ĝin, kaj metis ilin en mian poŝon. Tiam mi turniĝis ree por eltrovi, kio estas farebla rilate al komunikado.

”Kaj tiam, rigardante pli zorge iliajn trajtojn, mi vidis pli-

ajn strangaĵojn en ilia Dresden-porcelana beleco. Ilia hararo, kiu estis regule bukla, subite finiĝis ĉe la kolo kaj la vango; estis nenia signo de ĝi sur la vizaĝo, kaj la oreloj estis neordinare etaj. La buŝo estis malgranda, kun helruĝaj, iom maldikaj lipoj kaj la mentoneto finiĝis en pinto. La okuloj estis grandaj kaj mildaj; kaj — eble ŝajnas egoisme — mi imagis eĉ tiam, ke estas ia manko de la intereso, kiun mi atendis trovi ĉe ili.

”Ĉar ili ne klopodis interkomuniki kun mi, sed nur staris ĉirkaŭ mi ridetante kaj parolante inter si en mallaŭtaj, dolĉaj sonoj, mi komencis la konversacion. Mi fingre montris la tempo-maŝinon kaj poste min. Tiam, pripensante momenton, kiel esprimi la tempon, mi indikis la sunon. Tuj iu beleta malgrandulo purpure kaj blanke vestita sekvis mian geston kaj tiam mirigis min imitante la bruon de tondro.

”Dum momento trafis min surprizego, kvankam la signifo de lia gesto estis sufiĉe klara. La demando abrupte venis en mian menson: ĉu tiuj ĉi homoj estas stultuloj? Vi povas apenaŭ kompreni, kiel tio impresis min. Mi ja ĉiam supozis, ke la homoj de la jaro okcent dumil estos nekredeble pli lertaj ol ni rilate al scio, arto, ĉio. Tiam unu el ili subite faris al mi demandon, kiu montris, ke li estas sur la intelekta nivelo de unu el niaj kvinjaraj infanoj — demandis al mi, fakte, ĉu mi venis de la suno dum fulmotondro! Ĝi liberigis la juĝon, kiun mi estis prokrastinta, pri iliaj vestaĵoj, iliaj malfortaj, nepezaj membroj kaj kadukaj trajtoj. Ekfluo de senluziigo trarapidis mian menson. Dum momento mi opiniis, ke vane mi konstruis la tempo-maŝinon.

”Mi kapjesis, indikis la sunon, kaj donis al ili tiom realan imiton de tondro, ke ili ektimis. Ili ĉiuj faris paŝon malan-

taŭen kaj riverencis. Tiam unu venis ridetante al mi, portante ĉenon el belaj floroj tute novaj al mi, kaj metis ĝin ĉirkaŭ mian kolon. Ili akceptis la geston kun melodia aplaŭdo; kaj baldaŭ ili ĉiuj kuradis tien kaj reen por kolekti florojn, kiujn ili ridetante ĵetis sur min, ĝis mi estis preskaŭ florkovrita. Vi, kiuj neniam vidis similajn, apenaŭ povas kompreni, kiajn delikatajn kaj mirigajn florojn jarmiloj da kulturo estis kreintaj. Tiam iu sugestis, ke ilia ludilo estu elmontrata en la plej proksima konstruaĵo, kaj sekve oni kondukis min preter la sfinkso el blanka marmoro, kiu ŝajne rigardis min la tutan tempon kun rideto pri mia miro, — al vasta griza konstruaĵo el ĉizita ŝtono. Irante kun ili, mi kun nerezistebla amuzo memoris miajn memfidajn esperojn pri profunde serioza kaj intelekta posteularo.

”La konstruaĵo havis grandegan enirejon, kaj entute estis el kolosaj dimensioj. Mi kompreneble plej atentis la kreskantan amason da hometoj kaj la grandajn malfermitajn pordojn, kiuj staris antaŭ mi ombraj kaj misteraj. Mia ĝenerala konstato pri la mondo, kiun mi vidis super iliaj kapoj, estis kiel konfuza amaso da belaj arbustoj kaj floroj, kiel ĝardeno longe malzorgita, tamen sen herbaĉoj. Mi vidis multajn altajn spikojn de strangaj blankaj floroj, larĝaj eble je 30 cm trans la etendiĝo de la vaksosimilaj petaloj. Ili dise kreskis, kvazaŭ sovaĝe, inter la diverskoloraj arbustoj, sed, kiel mi diras, mi ne atente ekzamenis ilin je tiu tempo. La tempo-maŝino estis lasita sola sur la herbejo inter la rododendroj.

”La arkaĵo super la pordoj estis riĉe skulptita, sed kompreneble mi ne observis tre zorge la skulptaĵon, kvankam mi pensis, ke mi vidis sugestojn de malnovaj fenicaj ornamaĵoj, dum mi trapasis, kaj ŝajnis al mi, ke ili estas tre rompitaĵ kaj

vetertuŝitaj. Kelkaj aliaj brile vestitaj homoj renkontis min ĉe la pordoj, kaj tiel ni eniris, mi, vestita per malhelaj deknaŭjarcentaj vestaĵoj, iom groteska pro la floro-girlandoj, kaj ĉirkaŭata de vigla amaso da helaj delikatkoloraj roboj kaj brilantaj blankaj membroj, en melodia bruo de ridado kaj rida parolado.

”La grandaj pordoj kondukis al relative granda salono brune ornamita. La plafono estis en la ombro, kaj la fenestroj, parte el kolora vitro kaj parte senvitraj, enlasis miksitajn lumojn. La planko konsistis el grandaj blokoj de ia tre malmodula blanka metalo, ne platoj aŭ tabuloj, — blokoj, kaj ĝi estis tiel eluzita, supozeble pro la irado de pasintaj generacioj, ke ĝi estis profunde sulkigita ĉe la pli ofte surpaŝitaj lokoj. Trans la salono estis granda nombro da tabloj el polurita ŝtono. aranĝitaj eble 30 cm super la planko, kaj sur tiuj ĉi estis amasoj da fruktoj. Kelkajn mi rekonis kiel specon de supernutritaj framboj kaj oranĝoj, sed plejparte ili estis nekonataj.

”Inter la tabloj troviĝis granda nombro da kusenoj. Sur tiujn miajn kondukantojn sidiĝis, indikante, ke mi faru same. Sen ia ceremonio ili komencis manĝi la fruktojn per siaj manoj, ĵetante ŝelojn, trunketojn kaj tiel plu en la rondajn truojn en la flankoj de la tabloj. Mi ne hezitis sekvi ilin, ĉar mi estis soifa kaj malsata. Manĝante mi senpene ekzamenis la salonon.

”Kaj eble tio, kio plej trafis min, estis ĝia kaduka aspekto. La koloritaj fenestroj, kiuj montris nur geometrian formon, estis multloke rompigitaj, kaj la kurtenoj kiuj pendis trans la ekstremaĵo de la salono estis polvoplenaj. Kaj mi rimarkis rompiĝon ĉe la angulo de la marmora tablo apud mi. Tamen, la ĝenerala impresio estis treege riĉa kaj pitoreska. Estis eble ducento da manĝantoj en la salono, kaj la plej multaj el ili,

sidante kiel eble plej proksime al mi, rigardis min kun intereso, kaj iliaj etaj okuloj brilis dum ili manĝis la fruktojn. Ĉiuj estis vestitaj per la sama mola, sed forta, silkeca materialo.

”Efektive ili manĝis nur fruktojn. Tiuj homoj de la malproksima estonto estis severaj vegetaranoj, kaj dum mi estis kun ili, malgraŭ viandaj avidoj, mi ankaŭ devis esti frukto-manĝa. Fakte mi trovis poste, ke ĉevaloj, brutoj, ŝafoj, hundoj jam formortis kiel la iĥtiosaŭro. Sed la fruktoj estis ravaj; unu precipe, kiu ŝajne estis manĝebla dum mia tuta restado tie — ia faruneca aĵo kun triflanka ŝelo — estis aparte bongusta, kaj ĝi fariĝis mia ĉefa manĝaĵo. Unue tiuj ĉi strangaj fruktoj estis enigmo al mi, tiel same kiel la kuriozaj floroj, kiujn mi vidis, sed poste mi komencis kompreni ilin.

”Tamen, mi rakontas al vi pri mia fruktomanĝo en la malproksimega estonto, ĉu ne? Tuj kiam mia apetito estis iomete pli sata, mi decidis fari firman klopodon por lerni la lingvon de tiuj ĉi novaj homoj miaj. Evidente tio devos esti mia venonta ago. Ŝajnis al mi, ke la fruktoj estas taŭga bazo, kaj tenante iun el tiu mi komencis serion da demandaj sonoj kaj gestoj. Estis iom malfacile komuniki mian intencon. Unue miaj klopodoj kaŭzis surprizajn rigardojn aŭ neestingeblan ridadon, sed baldaŭ, iu helhara hometo ŝajnis ekkompreni mian geston kaj ripetis ian nomon. Ili devis babili kaj klarigi iom longe la aferon inter si, kaj miaj unuaj provoj fari la ravajn sonojn de ilia lingvo kaŭzis multege da amuzo. Tamen, mi sentis min kvazaŭ instruisto inter infanoj; mi persistis, kaj baldaŭ mi komprenis dudekon da substantivoj; kaj poste mi lernis kelkajn adjektivojn kaj eĉ la verbon ’manĝi’. Sed estis malrapida tasko, kaj la malgranduloj baldaŭ tediĝis kaj volis eviti mian demandadon. Pro tio mi decidis, iom devige, lasi

ilin doni siajn lecionojn en malgrandaj porcioj, kiam ili mem volis. Kaj tre malgrandaj porcioj ili ja estis; mi neniam konis homojn pli malenergiajn aŭ pli facile lacigeblajn.

”Unu strangan econ mi baldaŭ rimarkis pri miaj malgrandaj gastigantoj; tio estas la manko de intereso, kiun ili montris. Ili venis al mi kun entuziasmaj krioj de miro, kiel infanoj, sed kiel infanoj ili baldaŭ ĉesis ekzameni min kaj forvadis al iu nova ludilo. Kiam la manĝo kaj miaj konversaciaj provoj finiĝis, mi por la unua fojo rimarkis, ke jam foriris ĉiuj, kiuj ĉirkaŭis min komence. Estas strange ankaŭ, kiel rapide mi komencis ignori tiujn ĉi hometojn. Mi eliris tra la pordoj denove en la sunbrilan mondon tuj kiam mia manĝemo estis kontentigita. Mi konstante renkontis pli de tiuj ĉi homoj de la estonto, kiuj sekvis min iome, babilis kaj ŝercis pri mi, tiam, ridetinte kaj gestinte laŭ amika maniero, ili ne plu atentis min.

”La vespera trankvilo jam alvenis, kiam mi eliris el la granda salono, kaj la scenon lumigis la varma brileto de la subiranta suno. Unue estis tre konfuze. Ĉio estis tute malsama ol la mondo, kiun mi konis, eĉ la floroj. La granda konstruaĵo, kiun mi ĵus forlasis, staris sur deklivo de larĝa rivervalo, sed la Tamizo estis moviĝinta pli ol unu kilometron de sia nuna pozicio. Mi decidis supreniri monteton, kiu staras eble du kilometrojn for, de sur kiu mi povus ricevi pli larĝan vidon de tiu ĉi planedo nia en la jaro okcent dumil sepcent unu p.K. Ĉar tio, mi devus klarigi, estas la dato, kiun montris la indikilo sur mia maŝino.

”Dum mi marŝis mi estis observema por ĉiu impresio, kiu povus helpi iel klarigi la staton de ruina beleco, en kiu mi trovis la mondon — ĉar ruina ĝi ja estis. En unu loko, ekzemple,

kuŝis granda kvanto da granito, kunligita de amaso da aluminio, vasta labirinto de krutaj muroj kaj rompiĝintaj amasoj, inter kiuj estis dikaj aroj de tre belaj pagodo-similaj kreskaĵoj — eble urtikoj — sed mirinde koloritaj brune sur la folioj, kaj nepikaj. Evidente estis la ruinoj de ia vasta konstruaĵo, sed por kio ĝi originale servis, mi ne povis imagi. Tie mi devis poste havi tre strangan sperton — la unua signo de eĉ pli stranga eltrovo — sed pri tio mi parolos ĝustatempe.

”Ĉirkaŭrigardante kun subita penso, de ia teraso sur kiu mi iomete ripozis, mi konstatis, ke ne estas videblaj iuj malgrandaj domoj. Diversloke inter la verdaĵo staris palaco-similaj konstruaĵoj, sed malaperis la domoj kaj dometoj, kiuj formas karakterizajn partojn de nia propra angla pejzaĝo.

” ’Komunismo’, mi diris al mi.

”Kaj tuj post tio venis plia penso. Mi rigardis la seson da malgrandaj figuroj, kiuj sekvis min. Tiam mi ekrimarkis, ke ĉiu havas la saman specon de kostumo, la saman molan senharan vizaĝon, kaj la saman knabinan rondecon ĉe la membroj. Povas esti strange, ke mi ne rimarkis tion antaŭe. Sed ĉio estis stranga. Nun mi vidis la fakton tute klare. Laŭ kostumo, kaj laŭ ĉiu diferenco de strukturo kaj mieno, kiu nun distingis la seksojn, tiuj ĉi homoj de la estonto estis identaj. Kaj la infanoj ŝajnis al miaj okuloj nur miniaturoj de siaj gepatroj. Mi juĝis tiam, ke la infanoj de tiu tempo estas treege frumaturaj — fizike almenaŭ — kaj mi trovis poste abundan pruvon de mia opinio.

”Vidante la facilecon kaj sekurecon en kiuj vivas tiuj homoj, mi opiniis, ke tiu ĉi intima simileco de la seksoj estas natura, ĉar la forteco de viro kaj la moleco de virino, la insti-

tucio de la familio kaj la dificrenco rilate al okupoj, estas necesajoj nur de la epoko de fizika forto.

”Kie la nombro de la loĝantaro estas egaligita kaj abunda, multaj naskoj fariĝas malbono al la ŝtato anstataŭ bono; kie perforto okazas malofte, kaj idoj estas sekuraj, estas malpli da neceso — efektive, estas neniom da neceso — por bone funkcia familio, kaj malaperas la specialiĝo de la seksoj rilate al la bezonoj de siaj idoj. Ni vidas iajn komenciĝojn de tio eĉ en nia epoko, kaj en tiu ĉi epoko de la estonto ĝi estis komplete. Tio, mi devas memori al vi, estis mia supozo je la tempo. Poste mi konstatis, kiom malproksime estis mia teorio de la realaĵo.

”Dum mi meditis tiujn ĉi aferojn, trafis mian atenton beleta konstruaĵeto, kiel puto sub kupolo. Mi ekpensis, kiel strange estas, ke putoj ankoraŭ ekzistas, kaj daŭrigis ree mian meditado. Neniuj grandaj konstruaĵoj troviĝis ĉirkaŭ la supro de la monteto, kaj ĉar mia marŝpovo estis evidente mirakla, mi baldaŭ je la unua fojo estis tute sola. Kun stranga sento de libereco kaj aventuremo, mi pluiris ĝis la supro.

”Tie mi trovis benkon el ia flava metalo, kiun mi ne rekonis, kelkloke difektita de ia ruĝeta rusto, kaj duonkovrita de mola musko, kun la brakoj skulptitaj en la formo de grifkajpoj. Mi sidiĝis sur ĝin, kaj rigardis la larĝan vidaĵon de nia malnova mondo sub la sunsubiro de tiu longa tago. Ĝi estis tia beleta kaj klara vidaĵo, kian neniam mi antaŭe vidis. La suno jam subiris la horizonton kaj la okcidento estis flamanta oro, strekita de kelkaj horizontalaj rubandoj el purpuro kaj punco. Malsupre estis la valo de la Tamizo, en kiu kuŝis la rivero kiel strio el polurita ŝtalo. Mi jam parolis pri la grandiozaj palacoj dislokitaĵ inter la multnuanca verdaĵo, iuj ruini-

ĝintaj kaj iuj ankoraŭ enloĝataj. Jen kaj jen vidiĝis blanka aŭ arĝenta figuro sur la nezorgata ĝardeno de la tero, diversloke estis la akra vertikala konturo de iu kupolo aŭ obelisko. Mi vidis neniajn barilojn, neniajn signojn de privateco, de agrikulturo; la tuta tero fariĝis ĝardeno.

”Tiel esplorante, mi komencis trovi mian propran klarigon de la aferoj, kiujn mi estis vidinta, kaj kiel ĝi formis sin tiun vesperon, mia klarigo estis jena. (Poste mi trovis, ke mi divenis nur duonveron — aŭ ekvidis nur unu faceton de la vero.)

”Ŝajnis al mi, ke mi vidas la malprogreson de la homaro. La ruĝeta sunsubiro pensigis min pri la krepusko de la homaro. Por la unua fojo mi komencis konstati strangan rezulton de la sociaj klopodoj, pri kiuj ni nuntempe okupas nin. Tamen, ĝi ja estas sufiĉe logika sekvo. Forto rezultas el bezono; sekuro kreas malfortiĝon. La plibonigado de la vivkondiĉoj — la vera civilizacia procedo, kiu pli kaj pli sekurigas la vivon — persiste daŭris ĝis la klimakso. Triumfo sekvis triumfon de la unuigita homaro super la naturon. Aferoj kiuj nun estas nuraj revoj, fariĝis projektoj planitaj kaj poste efektivigitaj. Kaj la rikolto estis tio, kion mi vidis!

”Efektive la nuntempaj higieno kaj agrikulturo ankoraŭ estas je la komenca stadio. La scienco de nia epoko estas atakinta nur malgrandan parton de la kampo de homaj malsanoj, sed, malgraŭe, ĝi etendas sian agadon tre firme kaj persiste. Niaj agrikulturo kaj ĝardenkulturo detruas foje unu herbaĉon kaj kreskigas eble dudekon da sanaj plantaĵoj, lasante la plej multajn mem interbatali por trovi la bilancon. Ni plibonigas niajn preferatajn kreskaĵojn kaj bestojn — kaj kiom malmultaj tiuj ja estas — iom post iom per elelekta bredado; jen nova kaj pli bona persiko, jen sengrajna vinbero, jen pli

granda kaj pli dolĉa floro, jen pli taŭga brutospeco. Ni plibonigas ilin grade, ĉar niaj idealoj estas malklaraj kaj provemaj, kaj nia scio estas tre limigita; ĉar la naturo ankaŭ estas timema kaj malrapida en niaj mallertaj manoj. Iam ĉio ĉi estos pli bone organizata, kaj ankoraŭ pli bone. Tiel marŝas la progreso, malgraŭ la okazaj malhelpoj. La tuta mondo estos inteligenta, klera kaj kunlaborema; aferoj moviĝos ĉiam pli rapide al la supervenko de la naturo. Fine ni saĝe kaj zorge alĝustigos la bilancon de la besta kaj vegeta regnoj al niaj propraj bezonoj.

”Tiu ĉi alĝustigo, — mi diras al vi, ŝajne estis farita, kaj farita bone; farita efektive por eterna tempo, dum la tempospaco, kiun mia maŝino transsaltis. La aero estis sen kuloj, la tero sen herbaĉoj aŭ fungoj; ĉie estis fruktoj kaj dolĉaj kaj ravaj floroj; brilaj papilioj flugis tien kaj reen. La idealo de evitaj medikamentoj estis atingita. Malsanoj tute malaperis. Mi ne vidis eĉ unu signon de ia infekta malsano dum mia restado tie. Kaj mi devos poste diri al vi, ke eĉ la procedoj de putriĝo kaj kadukiĝo estis tre influitaj de tiuj ĉi ŝanĝiĝoj.

”Oni faris ankaŭ sociajn triumfojn. Mi vidis la homojn loĝantaj en bonegaj ŝirmejoj, mi vidis ilin bele vestitaj, kaj, almenaŭ ĝis tiam, mi ne vidis ilin okupi sin pri ia laboro. Estis neniam signoj de luktado, nek socia, nek ekonomia luktado. La vendejo, la reklamo, trafiko, tiu komerco, kiu konsistigas la korpon de nia mondo, ĉiuj estis malaperintaj. Estis nature, je tiu ora vespero, ke mi ekprenu la ideon de socia paradizo. La problemo de kreskanta loĝantaro solviĝis, mi supozis, kaj la loĝantaro ĉesis plimultiĝi.

”Sed kun tia ŝanĝiĝo ĉiam venas adaptoj al la ŝanĝiĝo. Kio, se la biologia scienco ne estas amaso da eraroj, estas la kaŭ-

zo de homaj inteligenteco kaj vigleco? Malfacilaĵoj kaj libereco: kondiĉoj sub kiuj la agemaj, fortaj, kaj subtilaj eltenas kaj la pli malfortaj suferas; kondiĉoj kiuj premiigas la lojalan interligon de kapablaj homoj, memdetenemon, paciencon kaj decidemon. Kaj la institucio de la familio, kaj la emocioj kiujn tio naskas, la furioza ĵaluzo, la sentemo por la idoj, gepatra sindonemo, ĉiuj trovis pravigon kaj subtenon en la danĝeroj, kiuj ĉiam minacis la idojn. Nun, kie estas tiuj minacaj danĝeroj? Vidiĝas sentimento, kaj ĝi kreskos, kontraŭ edzeca ĵaluzo, kontraŭ furioza patrineco, kontraŭ ĉiaj pasioj; necesaj aferoj nun, kaj aferoj kiuj embarasas nin, sovaĝaj postrestaĵoj, malakordoj en rafinita kaj agrabla vivo.

”Mi pripensis la fizikan malforton de la homoj, ilian mankon de inteligento, kaj tiujn grandajn multnombrajn ruinojn, kaj tio plifortigis mian kredon pri perfekta venko super la naturon. Ĉar post la batalo venas trankvilo. La homaro antaŭe estis forta, vigla kaj inteligenta, kaj estis uzinta ĉiom de sia energio por ŝanĝi siajn vivkondiĉojn. Kaj nun venis la kontraŭago de la ŝanĝitaj kondiĉoj.

”En la novaj kondiĉoj de perfektaj komforto kaj sekuro, tia senripoza energio, kia ĉe ni estas forto, fariĝus malforto. Eĉ en nia epoko, kelkaj tendencoj kaj deziroj, antaŭe necesaj por ekzistado, estas konstanta kaŭzo de malsukceso. Fizika kuraĝo kaj batalamo, ekzemple, ne multe helpas — povas eĉ malhelpi — al civilizita viro. Kaj en kondiĉoj de fizikaj egalo kaj sekuro, intelekta kaj fizika potenco estus senutila. Dum multegaj jaroj, mi supozis, estis nenia danĝero de milito aŭ persona perforto, nenia danĝero de sovaĝbestoj, nenia velkiga malsano, kiu necesigus korpan fortikon, nenia bezono labori. Por tia vivo, tiuj, kiujn ni nomus la malfortaj estas tiel bone

ekipitaj, kiel la fortaj, ili estas efektive ne plu malfortaj. Ja pli bone ekipitaj ili estas, ĉar la fortaj ĉagreniĝus pro sia neuzebla energio. Sendube la rava beleco de la konstruaĵoj, kiujn mi vidis, reprezentis la lastajn ondojn de la nun sencela energio de la homaro, antaŭ ol ĝi perfekte harmoniis kun la kondiĉoj sub kiuj ĝi vivas — la fanfaron de tia triumfo, kia komencis la lastan grandan pacon. Tio ĉi ĉiam estas la sorto de energio en sekuro; ĝi turnas sin al arto kaj erotikeco; kaj tiam venas ekvelko kaj kadukiĝo.

”Eĉ tiu arta instigo finfine formortus — efektive ĝi preskaŭ malaperis je la tempo, kiun mi vidis. Ornami sin per floroj, danci, kanti en la sunlumo; tiom restis de la arta spirito, kaj nur tiom. Eĉ tio fine forvelkus ĝis kontenta malvigleco. Nin sagacigas la akriĝilo de doloro kaj neceso, kaj jen tiu malŝatata akriĝilo estis fine rompita!

”Starante tie en la kreskanta mallumo, mi opiniis, ke per tiu ĉi simpla klarigo mi solvis la problemon de la tuta mondo — solvis la tutan sekreton de tiuj ravaj hometoj. Eble tro sukcesis la rimedoj, kiujn ili elpensis kontraŭ la plimultiĝo de la loĝantaro, kaj la nombro ne staris senŝanĝa, sed eĉ malpliigis. Tio klarigus la forlasitajn ruinojn. Tre simpla estis mia teorio, kaj sufiĉe verŝajna — kiaj estas la plej multaj malĝustaj teorioj!

Ĉapitro V

Dum mi staris tie meditante tiun ĉi tro perfektan triumfon de la homaro, la plena luno, flava kaj ĝiba, aperis el superversô de arĝenta lumo en la nordoriento. La helaj figurotoj ĉesis moviĝadi malsupre, senbrua strigo preterflugis, kaj mi tremetis pro la malvarmo de la vespero. Mi decidis malsupreniri por trovi, kie mi povos dormi.

”Mi serĉis la konstruaĵon, kiun mi konis. Tiam miaj okuloj trafis la figuron de la blanka sfinkso sur la bronza piedestalo, kiu fariĝis pli kaj pli klara pro la lumo de la leviĝanta luno. Mi povis vidi la betularbon. Jen la ĝangalo de rododendroj, nigraj en la pala lumo, kaj jen la malgranda herbejo. Mi rigardis denove la herbaĵon. Stranga dubo frostigis mian trankvilon. ‘Ne’, mi kuraĝige diris al mi, ‘tio ne estas la herbejo.’

”Sed ĝi ja estis. Ĉar la blanka lepra vizaĝo de la sfinkso frontis al ĝi. Ĉu vi povas imagi miajn sentojn, dum la konvinko plifirmiĝis en mia menso? Sed vi ne povas. La tempo-maŝino malaperis!

”Tuj, kiel frapo sur la vizaĝo, venis al mi la timo, ke eble mi perdos mian propran epokon, ke mi estos lasita senpova en tiu ĉi stranga mondo. La nura ekpenso estis vera fizika sensacio. Ĝi tenis mian gorĝon kaj ĉesigis mian spiradon. Post plia momento mi sentis timegon kaj per grandaj saltpaŝoj mi malsuprenkuris la deklivon. Unufoje mi falegis kaj tranĉis la vizaĝon; mi perdis neniom da tempo atentante la sangoflu-

on, sed relevis min kaj daŭrigis la kuradon, kun varma fluetto ĉe miaj vango kaj mentono. Dum mi kuris, mi diradis al mi, 'Ili iomete movis ĝin, ŝovis ĝin sub la arbustojn for de la vojo.' Mi tamen kuregis laŭ mia plena povo. La tutan tempon, kun tia maldubo, kia kelkfoje akompanas timegon, mi sciis, ke tiaj certigoj estas stultaj, sciis instinkte, ke la maŝino estis movita ekster mia atingo. Mi spiris dolore. Supozeble mi kuris la tutan distancon de la monteta supro ĝis la malgranda herbejo, eble tri kilometrojn, dum dek minutoj. Kaj mi ne estas junulo. Kurante mi laŭte malbenis la konfidan malsaĝon, kiu kaŭzis, ke mi lasu sola la maŝinon. Mi kriegis, kaj neniu respondis. Ŝajne nenia estaĵo movetiĝis en tiu lunluma mondo.

"Kiam mi atingis la herbejon, efektiviĝis miaj plej pesimismaj antaŭtimoj. Eĉ ne unu signo de la maŝino estis videbla. Mi sentis min svenema kaj malvarma, kiam mi rigardis la malplenan spacon inter la nigraj arbitaĵoj. Furioze mi ĉirkaŭkuris ilin, kvazaŭ la afero eble estus kaŝita en angulo, kaj tiam mi abrupte haltis, kun miaj manoj tenantaj la hararon. Super mi alte staris la sfinkso sur la bronza piedestalo, blanka, brilanta, lepra, en la lumo de la leviĝanta luno. Ĝi ŝajnis mokridi mian konsternon.

"Mi estus povinta konsoli min, imagante ke la malgranduloj metis la maŝinon en ian ŝirmejon por mi, se mi ne estus certa pri ilia fizika kaj intelekta sentaŭgeco. Ĝuste tio konsternis min: la sento pri ia ĝistiame nesuspektita potenco, pro kies interveno mia inventaĵo malaperis. Tamen, pri unu afero mi estis certa; escepte se iu alia epoko estus kreinta ĝian ĝustan duplikaton, la maŝino ne povus moviĝi en tempo. La alfikso de la funkciigiloj — mi montros al vi la metodon poste

— malhelpis, ke iu tiel prituŝu ĝin kiam ili estis forprenitaj. Ĝi moviĝis, kaj estas kaŝita nur en spaco. Sed kie ĝi estas?

”Mi kredas, ke mi preskau freneziĝis. Mi memoras, ke mi kuris furioze inter la lunlumaj arbustoj ĉirkaŭ la sfinkso, kaj timigis ian blankan beston, kiu en la mallumo aspektis kiel juna cervo. Mi memoras, ankaŭ, ke malfrue tiun nokton mi batis la arbustojn per miaj pugnoj ĝis la fingroostoj ŝiriĝis kaj sangis pro la rompitaĵoj trunketoj. Tiam, plorĝemante kaj delirante pro mia angoro, mi malsupreniris al la vasta konstruaĵo el ŝtono. La granda salono estis malluma, silenta kaj malplena. Mi ekglitis sur la malebena planko kaj falis sur iun el la malakitaj tabloj, preskaŭ rompante mian kruron. Mi bruligis alumeton kaj pretermarŝis la polvkovritajn kurtenojn pri kiuj mi jam parolis.

”Tie mi trovis plian salonegon plenan de kusenoj sur kiuj dormis dudeko el la malgranduloj. Mi ne dubas, ke ili trovis mian duan aperon sufiĉe stranga, kiam mi venis subite el la silenta mallumo kun neklaraj bruoj kaj la ekbrulo de alumeto. ’Kie estas mia tempo-maŝino?’ mi komencis kriegi, kiel kolera infano, metante miajn manojn sur ilin kaj forte skuanante ilin. Certe estis tre strange al ili. Iuj ridis, la plej multaj aspektis tre timigitaj. Kiam mi vidis ilin ĉirkaŭ mi, mi subite konstatis, kiel stulte mi agas, laŭ la cirkonstancoj, provante renaski ĉe ili la senton de timo. Ĉar, pro ilia dumtaga konduto mi opiniis, ke certe ili jam forgesis pri timo.

”Abrupte mi forĵetis la alumeton, kaj, faligante iun el la ĉeestantoj, mi mallerte kuris denove trans la grandan salonon, eksteren en la lunlumon. Mi aŭdis terurkriojn kaj iliajn piedetojn kurantaj kaj ŝanceliĝantaj tien kaj reen. Mi ne memoras ĉion, kion mi faris dum la luno suprengrimpis la ĉie-

lon. Supozeble estis la neatenditeco de mia perdo, kio frenezigis min. Mi sentis min senespere izolita de mia propra speco — stranga besto en nekonata mondo. Ŝajne mi furiozis tien kaj reen, kriegante kaj vokante al Dio kaj destino. Mi memoras pri la terura laciĝo, kiun mi spertis dum la forpasado de tiu longa nokto de malespero; pri la serĉado jen en unu nebula loko, jen en alia; pri palpado inter lunlumaj ruinoj kaj tuŝado de strangaj estaĵoj en la nigraj ombroj; finfine pri mia kuŝado sur la tero apud la sfinkso, kiam mi ploris pro absoluta mizero. Restis al mi nenio, krom mizero. Tiam mi dormis, kaj kiam mi vekigis estis jam plena tago, kaj du paseroj saltetis ĉirkaŭ mi sur la herbaĵo, atingeblaj de mia brako.

”Mi ĉirkaŭrigardis en la freŝo de la mateno, penante memori kiel mi alvenis tie, kaj kial mi havas profundan senton de forlasiteco kaj malespero. Tiam aferoj venis klare en mian menson. En la klara racia taglumo mi povis sentime rigardi miajn cirkonstancojn. Mi konstatis la sovaĝan stultecon de mia lastnokta frenezo kaj mi povis rezoni kun mi. ’Supozu ke okazis la plej malbona?’ mi diris. ’Supozu ke la maŝino estas tute perdita — eble detruita? Estas necese, ke mi estu trankvila kaj pacienca, ke mi lernu la vivmanieron de la popolo, ricevante klaran ideon pri la metodo de mia perdo, kaj la maniero havigi al mi materialojn kaj ilojn; por ke fine eble mi faru alian.’ Tio estis mia sola espero, ne granda espero, povas esti, sed pli bona ol malespero. Kaj malgraŭ ĉio, ĝi estis bela kaj kurioza mondo.

”Sed eble oni nur forprenis la maŝinon. Nu, mi decidis esti trankvila kaj pacienca, trovi ĝian kaŝejon kaj rehavigi ĝin al mi per forto aŭ ruzo. Kaj je tio mi stariĝis kaj rigardis ĉirkaŭ mi, scivolante kie mi povos baniĝi. Mi sentis min laca, rigida

kaj malpura. La matena freŝeco estigis en mi deziron al ega la freŝeco. Mi estis eluzinta mian emocion. Efektive mi komencis miri pri mia ega ekscitiĝo de la pasinta nokto. Mi zorge esploris la teron ĉirkaŭ la malgranda herbejo. Mi malŝparis iom da tempo per vanaj demandoj, farataj kiel eble plej bone, al tiuj hometoj kiuj preterpasis. Ĉiu el ili malsukcesis kompreni miajn gestojn; iuj estis nur indiferentaj, aliaj opiniis la aferon ŝerco kaj priridis min. Estis treege malfacile kontraŭbatali mian emon meti miajn manojn sur iliajn beletajn ridantajn vizaĝojn. Estis malsaĝa impulso, sed la diablo naskita de timo kaj blinda kolero estis malbone bridita kaj ankoraŭ avidis profiti de mia konfuzo. La herbaĵo estis pli helpa. Mi trovis sulkon faritan en ĝi, proksimume meze inter la piedestalo de la sfinkso kaj la signoj de miaj piedoj, kie post mia alveno, mi baraktis kun la renversita maŝino. Ankaŭ estis aliaj pruvoj pri ia movado, kun strangaj mallarĝaj piedsignoj, kiaj tiuj kiujn, laŭ mia imago, farus bradipo*. Tio direktis mian pli zorgan atenton al la piedestalo. Kiel mi jam diris, ĉu ne, ĝi estis el bronzo. Ĝi ne estis nura bloko, sed ambaŭflanke estis tre ornamita per profunde ĉizitaj paneloj. Mi aliris kaj frapis tiujn. La piedestalo estis kava. Zorge ekzamenante la panelojn, mi trovis, ke ili estas apartaj de siaj kadroj. Ne estis ansoj aŭ ŝlosiltruoj, sed eble la paneloj malfermiĝis de interne, se ili ja estis pordoj, kiel mi supozis. Unu afero estis sufiĉe klara, laŭ mia opinio. Ne necesis multe da menso-streĉo por konkludi, ke mia maŝino estas interne de tiu piedestalo. Sed kiel ĝi iris tien estis alia problemo.

”Mi vidis la kapojn de du oranĝe vestitaj homoj venantaj

* Tropika amerika besto, kiu moviĝas malrapide kaj malgracie.
[Latina: *bradypus*.]

en mia direkto de inter la arbustoj kaj sub iuj florkovritaj pomarboj. Mi turnis min ridante al ili kaj mangeste vokis ilin al mi. Ili venis, kaj tiam, indikante la bronzan piedestalon, mi provis komprenigi, ke mi volas malfermi ĝin. Sed je mia unua gesto tiucele, ili kondukis tre strange. Mi ne scias kiel klarigi al vi ilian mienon. Supozu, ke vi farus terure maldecan geston al delikata virino — jen ĝuste la mieno, kiun ŝi havus. Ili formarĝis kvazaŭ ili ricevis la plej grandan insulton. Poste mi provis dolĉaspektan blanke vestitan etulon, kun precize la sama rezulto. Lia mieno ial hontigis min. Sed, kiel vi scias, mi deziris la tempo-maŝinon, kaj mi provis denove. Kiam li turnis sin for, kiel la aliaj, mia kolero ekregis min. Per tri paŝoj mi atingis lin, tenis lin ĉe la malfirma parto de lia robo ĉirkaŭ la kolo, kaj komencis treni lin al la sfinkso. Tiam mi vidis la teruron kaj abomenon sur lia vizaĝo kaj subite mi liberigis lin.

”Sed mi ankoraŭ ne estis venkita. Mi frapis per mia pugno la bronzajn panelojn. Mi pensis, ke mi aŭdis ion moviĝi interne — efektive mi pensis aŭdi sonon kia ridado — sed devas esti, ke mi eraris. Tiam mi havigis grandan ŝtonon el la rivero kaj venis kaj frapis ĝis mi premis rondon en la ornamaĵo kaj la verdigro disfalis en pulvoraj flokoj. La delikataj malgranduloj certe aŭdis mian spasman marteladon du kilometrojn for ambaŭflanke, sed ĝi havis nenian rezulton. Mi vidis amason da ili sur la deklivoj kaŝeme rigardadi min. Fine, varma kaj laca, mi sidiĝis por observi la lokon. Sed mi estis tro maltrankvila por longe rigardi; mi estas tro okcidenta por longa observado. Problemon mi povus prilabori dum jaroj, sed atendi senmove dudek kvar horojn — tio estas alia afero.

”Mi stariĝis post iom da tempo kaj komencis sencele marŝi inter la arbustoj al la monteto. ’Paciencon’, mi diris al mi. ’Se

vi deziras rehavi vian maŝinon vi devas lasi tiun sfinkson. Se ili intencas forporti vian maŝinon, ne multe utilas, rompi iliajn bronzajn panelojn, kaj se ili ne intencas tion, vi ree havos ĝin tuj kiam vi povos peti ĝin. Sidado inter tiuj nekonataj aferoj, antaŭ tia enigmo estas nur senespera. Tiel vi atingos monomanion. Rigardu tiun ĉi mondon en la vizaĝon. Lernu ĝiajn kutimojn; observu ĝin, zorgu kontraŭ tro rapidaj divenoj pri ĝia signifo. Fine vi trovos helpsignojn al la solvo de la tuta problemo.' Tiam subite mi konstatis, kiel amuza estas la situacio; mi pensis pri la jaroj, kiujn mi pasigis en studado kaj laboro por eniri la estontan epokon, kaj nun mi pasie deziris forlasi ĝin. Mi estis farinta por mi la plej malsimplan kaj la plej senesperan kaptilon, kiun iam elpensis homo. Kvankam estis mi, kiu suferas, mi ne povis ne fari ĝin. Mi laŭte ridis.

”Trairante la grandan palacon, mi ricevis la impreson, ke la malgranduloj evitas min. Eble estis mia imago, aŭ eble estis pro mia frapegado sur la bronzajn panelojn. Ĉiuokaze, mi estis preskaŭ certa pri la evitado. Mi zorgis, tamen, montri nenian atenton, kaj mi tute ne persekutis ilin, kaj post unu tagoj la afero statis kiel antaŭe. Mi laŭeble progresis en la lingvo, kaj plue mi etendis miajn esplorojn tien kaj tien ĉi. Aŭ mi maltrafis ian subtilan punkton, aŭ ilia lingvo estis treege simpla, — preskaŭ tute el konkretaj substantivoj kaj verboj. Ŝajne estis malmultaj, eĉ neniuj abstraktaj nomoj kaj malofta uzado de figuraj paroloj. Iliaj frazoj kutime estis simplaj kaj el du vortoj, kaj mi sukcesis komprenigi aŭ kompreni nur la plej simplajn ideojn. Mi decidis forgesi kiel eble plej efike pri mia tempo-maŝino kaj la mistero de la bronzaj pordo sub la sfinkso, ĝis mia kreskanta scio rekondukos min al ili laŭ natura maniero. Tamen eble vi komprenos, ke ia sento tenis min

interne de cirklo kelkajn kilometrojn ĉirkaŭ la loko de mia alveno.

”Laŭ tio, kion mi povis vidi, la tuta mondo montris la saman superfluan riĉon kiel la valo de la rivero Tamizo. De sur ĉiu monteto, kiun mi grimpis, mi vidis la saman abundon de belegaj konstruaĵoj, senfine variaj laŭ materialo kaj stilo, la samajn amasiĝintajn verdaĵojn, la samajn florkovritajn arbojn kaj arbofilikojn. Jen kaj jen brilis akvo kiel arĝento, kaj pretere la tero leviĝis en bluaj ondformaj montetoj, kaj tiel malaperis en la serenon de la ĉielo. Strangaĵo, kiu baldaŭ trafis mian atenton, estis la ekzisto de iaj rondaj putoj, kelkaj el kiuj, ŝajnis al mi, estis tre profundaj. Unu troviĝis ĉe la vojo sur la monteto, kiun mi sekvis dum mia unua promeno. Simile al la aliaj, ĝi havis randon el bronzo, strange faritan kaj ŝirmitan kontraŭ la pluvo per malgranda kupolo. Sidante ĉe tiuj ĉi putoj, kaj rigardante en la mallumon, mi povis nek vidi la brilon de akvo, nek kaŭzi ian reflekon per bruligita alumeto. Sed en ĉiu el ili mi aŭdis ian bruon: bat’ — bat’ — bat’, kiel la batado de ia granda maŝino; kaj mi eltrovis, per la ekbrulo de miaj alumetoj, ke regula aerblovo suĉiĝis en la puton. Plue, mi ĵetis en iun el ili peceton da papero, kaj anstataŭ flugfaleti malrapide, ĝi estis tuj forsuĉita ekster mian vidon.

”Plue, mi poste komencis kunigi en mia menso tiujn ĉi putojn kaj tiujn altajn turojn, kiuj staris diversloke sur la deklivoj; ĉar super ili ofte estis ĝuste tia ekvibro, kian oni vidas je varma tago super sunbruligata marbordo. Pripensante tiujn aferojn, mi ricevis fortan impreson pri ampleksa sistemo de subtera ventumado, kies vera signifo estis malfacile imagebla. Unue mi emis rilatigi ĝin kun la higiena aparataro de tiuj ĉi

homoj. Tio estis verŝajna konkludo, sed ĝi estis absolute malĝusta.

”Kaj tie ĉi mi devas konfesi, ke mi lernis malmulte pri drenaloroj kaj transportrimedoj kaj tiaj uzaĵoj dum mia restado en tiu ĉi reala estonto. En unu el tiuj vizioj pri utopiuoj kaj venontaj epokoj, kiujn mi legis, estas vasta amaso da detaloj pri konstruado kaj sociaj aranĝoj kaj tiel plu. Sed kvankam tiaj detaloj estas sufiĉe facile haveblaj, kiam la tuta mondo estas en la imago, ili estas tute nehaveblaj de vojaĝanto inter tiaj realaĵoj, kiajn mi trovis tie. Imagu la rakonton pri Londono, kiun negro el Mezafriko reportus al sia gento! Kion sci-us li pri fervojkompanioj, pri sociaj movadoj, pri telefonaj kaj telegrafaj dratoj, pri la Kompanio por la Liverado de Pakaĵoj, kaj poŝtmandatoj kaj tiel plu? Tamen, ni almenaŭ, volonte klarigus tiajn aferojn al li. Kaj eĉ el tio, kion li lernus, kiom li povus aŭ komprenigi, aŭ kredigi al sia nevojaĝinta amiko? Nu, pripensu kiom malgranda estas la diferenco inter nigrulo kaj blankulo de nia epoko, kaj kiom larĝa la tempospaco inter mi kaj tiuj de la Ora epoko! Mi sentis multon, kio estis nevidebla kaj kio helpis al mia komforto; sed krom ĝenerala impresado de aŭtomata organizo, mi timas, ke mi povas komprenigi al vi malmulte de la diferenco.

”Ekzemple, rilate al enterigo, mi povis vidi nenian signojn de kremaciejoj, nenian sugeston de tomboj. Sed ŝajnis al mi, ke eble estas tombejoj (aŭ kremaciejoj) ie preter la limo de miaj esploroj. Tio, denove, estas demando, kiun mi penseme faris al mi, kaj komence mia scivolemo pri la punkto estis tute venkita. La afero estis enigmo al mi, kaj mi rimarkis plian aferon, kiu estis eĉ pli granda enigmo: ke estis neniu maljunuloj aŭ kadukuloj inter ĉi tiuj homoj.

”Mi devas konfesi, ke mia kontento pri miaj unuaj teorioj pri aŭtomata civilizado kaj degenera homaro ne daŭris longe. Tamen, mi ne povis pripensi alian. Mi prezentu miajn malfacilaĵojn. La kelkaj grandaj palacoj, kiujn mi esploris, estis nuraj loĝejoj, grandaj manĝsalonoj kaj dormoĉambroj. Mi povis trovi nenian maŝinojn, nenan ilaron. Tamen, tiuj ĉi homoj portis vestojn el plaĉaj ŝtofoj, kiuj devas foje bezoni renovigon, kaj iliaj sandaloj, kvankam ornamitaj, estis iom malsimplaj specimenoj de la metalarto. Iel oni devas fabriki tiajn aĵojn. Kaj la malgranduloj montris nenan kreemon. Estis neniuj vendejoj, neniuj laborejoj, neniuj signoj de importadoj inter ili. Ili pasigis sian tutan tempon dolĉe ludante, banante sin en la rivero, amante laŭ duonluda maniero, manĝante fruktojn kaj dormante. Mi ne povis vidi kiel oni funkciigis la socian organizon.

”Plue, pri la tempo-maŝino: io, mi ne sciis kio, prenis ĝin en la kavan piedestalon de la blanka sfinkso. *Kial?* Neniel mi povis imagi tion. Tiuj senakvaj putoj ankaŭ, tiuj flagretantaj kolonoj. Mi sentis, ke mankas al mi iu grava indikilo. Mi sentis — kiel mi diru ĝin? Supozu, ke vi trovus skribaĵon kun frazoj jen kaj jen en perfekta klara angla lingvo, kaj intermiksitaj kun tiuj, aliaj frazoj konsistantaj el vortoj, eĉ literoj, tute nekonataj de vi? Nu, je la tria tago de mia vizito, jen kiel prezentis sin al mi la mondo de la jaro okcent dumil sepcent unu!

”Tiun tagon, ankaŭ, mi trovis amikinson. Okazis, ke dum mi rigardis kelkajn el la hometoj, kiuj banis sin en malprofunda parto de la rivero, iu el ili ekhavis rigidiĝon ĉe la kruroj kaj komencis forflasi. La ĉefa fluo iris iom rapide, sed ne tro forte eĉ por ordinara naĝanto. Vi ricevos impreson, do, pri la stran-

ga manko en tiuj ĉi homoj, kiam mi diros al vi, ke neniu faris ajnan provon savi la nefortan plorantan etulinon, kiu dro-nus antaŭ iliaj okuloj. Kiam mi konstatis tion, mi rapide for-ŝovis miajn vestojn, kaj enmarŝante ĉe loko pli malproksime, mi kaptis la kompatindulinon kaj portis ŝin sendifekta albor-den. Iom da frotado sur la membroj baldaŭ revivigis ŝin, kaj mi havis la kontenton vidi, ke ŝi estas en ordo antaŭ ol mi forlasis ŝin. Mi atingis jam tiel malaltan estimon pri ŝia raso, ke mi ne atendis ian dankemon ĉe ŝi. Tiurilate, tamen, mi malpravis.

”Tio ĉi okazis matene. Posttagmeze mi renkontis mian vi-rineton, kia mi kredis ŝin, kiam mi reiris al mia centro post iu esplorado, kaj ŝi akceptis min kun ravokrioj kaj donacis al mi grandan florgirlandon evidente faritan por mi, kaj mi sole. La okazaĵo trafis mian imagon. Tre eble mi sentis min soleca. Ĉiuokaze, mi kiel eble plej bone montris mian ŝaton pro la donaco. Ni baldaŭ sidis kune en malgranda ŝtona laŭbo kaj konversaciis, ĉefe per ridetoj. La amikeco de la etulino kor-tuŝis min ĝuste kiel povus tiu de infano. Ni interŝanĝis florojn kaj ŝi kisis miajn manojn. Mi faris same al ŝiaj. Tiam mi pro-vis paroladon kaj trovis ke ŝia nomo estas Uina, kiu, kvankam mi ne scias la signifon, ial ŝajnis tute taŭga. Tio estis la kom-enco de stranga amikeco, kiu daŭris unu semajnon kaj finiĝis — kiel mi diros al vi!

”Ŝi estis ĝuste kia infano. Ŝi volis esti ĉiam kun mi. Ŝi pro-vis sekvi min ĉien kaj je mia sekvanta ĉirkaŭesploro, tre kor-tuŝis min kiam ŝi laciĝis kaj mi fine devis forlasi ŝin, lacega kaj plendete krianta al mi. Sed mi devis venki la problemojn de la mondo. Mi ne venis en la estonton, mi diris al mi, por am-indumi. Tamen, ŝia mizero, kiam mi lasis ŝin, estis tre gran-

da, ŝiaj protestoj pro la disiĝo estis foje frenezemaj, kaj mi opinias, ke entute mi havis tiom da ĝeno, kiom da konsolo pro ŝia amikeco. Iel, tamen, ŝi estis granda konsolo. Mi opiniis, ke estas nur infaneca amemo, kiu ligis ŝin al mi. Ĝis estis tro malfrue, mi ne klare komprenis, kion ŝi signifis al mi. Ĉar, nur pro tio, ke ŝi ŝajnis ŝati min kaj montris ameton al mi laŭ sia malforta vana maniero, la puposimila etulino baldaŭ donis al mia reveno al la ĉirkaŭaĵo de la blanka sfinkso preskaŭ la senton de hejmeniro, kaj mi serĉis ŝian etan figuron el blanko kaj oro tuj kiam mi atingis la supron de la monteto.

”Plue, de ŝi mi lernis, ke timo ankoraŭ ne forlasis la mondon. Ŝi estis tute sentima dum la taglumo, kaj ŝi havis strangan konfidon al mi; ĉar unufoje, dum malsaĝa momento, mi faris minacajn grimacojn al ŝi, kaj ŝi nur priridis ilin. Sed ŝi timegis la mallumon, timegis ombrojn, timegis nigraĵojn. Mallumo estis al ŝi la unusola timiga afero. Ĝi estis neordinare pasia emocio kaj ĝi igis min pensi kaj observi. Mi eltrovis tiam, inter aliaj aferoj, ke tiuj ĉi hometoj kuniĝis en la grandegajn domojn post noktiĝo kaj are dormis. Eniri sen lumo tute timigis ilin. Mi neniam trovis iun ekstere, aŭ iun dormanta sola interne post noktiĝo. Mi estis, tamen, ankoraŭ tiel stulta, ke mi ne lernis la lecionon de tiu timo, kaj malgraŭ la malĝojo de Uina mi insistis mem dormi for de tiuj ĉi dormantaj homamasoj.

”Tio tre maltrankviligis ŝin, sed fine triumfis ŝia stranga amo al mi kaj dum kvin el la noktoj de nia kunesto ŝi dormis kun la kapo ripozanta sur mia brako. Sed mia rakonto forvagas dum mi preparolas ŝin. Ŝajne estis la nokto antaŭ ŝia saviĝo kiam mi vekigis ĉirkaŭ tagiĝo. Mi dum la dormo estis mal-

kvieta. Mi sonĝis tre malagrabla, ke mi dronis kaj ke maranemonoj tuŝas mian vizaĝon per siaj molaj palpiloj. Mi vekigis subite, kun stranga sento, ke ia griza besto ĵus elkuris el la ĉambro. Mi penis ree endormiĝi, sed mi sentis min malt-rankvila kaj nekomforta. Estis tiu malhela griza horo, kiam objektoj komencas reapari el la mallumo, kiam ĉio estas senkolora kaj klara sed nereala. Mi leviĝis kaj malsupreniris en la salonegon kaj tiel eksteren sur la pavimon antaŭ la palaco. Mi decidis fari virton el neceso, kaj vidi la aperon de la suno.

”La luno malleviĝis kaj la mortanta lunlumo miksiĝis kun la unua paleco de tagiĝo en duonlumo fantoma. La arbustoj estis nigregaj, la tero estis malgaje griza, la ĉielo estis senkolora kaj mizera. Kaj sur la monteto mi kredis vidi fantomojn. Tri fojojn dum mi rigardis serĉe la deklivon, mi vidis blankajn figurojn. Dufoje mi kredis, ke mi vidis solan blankan simiecan beston suprenkuri iom rapide la monteton, kaj unu fojon apud la ruinoj mi vidis trion da ili portantan ian malhelan aĵon. Ili moviĝis rapide. Mi ne vidis kien ili iris. Ŝajnis, ke ili malaperis inter la arbustojn. La tagiĝo, vi devas kompreni, ankoraŭ estis neklara. Mi havis tiun malvarmetan, necertan, frumatenan senton, kiun eble vi konas. Mi dubis la ateston de miaj okuloj.

”Dum la orienta ĉielo fariĝis pli hela kaj la taglumo aperis, kaj ties brilaj koloroj revenis denove en la mondon, mi serĉe rigardis la vidaĵon. Sed mi vidis nenian signon de miaj blankaj figuroj. Ili estis nuraj estaĵoj de la duonlumo. ‘Ili certe estis fantomoj’, mi diris; ‘mi scivolas, de kiu epoko ili venas.’ Ĉar stranga ideo de Grant Allen venis en mian menson kaj amuzis min. Se ĉiu generacio mortas kaj postlasas fantomojn, li argumentis, la mondo finfine estos superplena de ili. Laŭ tiu

teorio, ili estus fariĝintaj sennombraj post okcent mil jaroj, kaj estus neniel mirige vidi kvar kune. Sed la ŝerco ne estis kontentiga kaj la tutan matenon mi pensadis pri tiuj ĉi figuroj, ĝis la savo de Uina forigis ilin el mia menso. Mi kunigis ilin laŭ ia nedifinita maniero kun la blanka besto, kiun mi ektimigis dum mia unua pasia serĉado por la tempo-maŝino. Sed Uina estis agrabla anstataŭaĵo. Tamen, malgraŭ tio, ili estis destinitaj baldaŭ multe pli urĝe okupi mian menson.

”Mi kredas, ke mi jam diris, kiom pli varma ol la nia estis la vetero de tiu ĉi Ora epoko. Mi ne povas klarigi tion. Povas esti, ke la suno estis pli varma, aŭ ke la tero estis pli proksime al la suno. Estas kutime supozi, ke la suno estonte pli kaj pli varmigo. Sed homoj, kiuj ne konas tiajn konjektojn, kiaj tiuj de la pli juna Darwin, forgesas, ke la planedoj fine devas refali unu post la alia en la patrinan astron. Dum la okazo de ĉi tiuj katastrofoj, la suno brulegos kun renovigita energio; kaj povas esti, ke ia interna planedo suferis tian sorton. Kio ajn estis la kaŭzo, la fakto restas, ke la suno estis multe pli varma ol ĝi estas nun.

”Nu, iun tre varman matenon — kredeble mia kvara — dum mi serĉis ŝirmon kontraŭ la varmo kaj brilego en kolosa ruino proksime al la domo, kie mi dormis kaj manĝis, okazis tiu ĉi strangaĵo: grimpante inter la amasoj da masonaĵo, mi trovis mallarĝan galerion kies finajn kaj flankajn fenestrojn blokis falintaj ŝtonamasoj. Kontraste kun la ekstera brilo, unue ŝajnis al mi nepenetreble mallume. Mi eniris ĝin blinde palpante, ĉar la ŝanĝiĝo de lumo al nigro dancigis antaŭ miaj okuloj kolorajn punktojn. Subite mi haltis surprizegite. El la mallumo rigardis min paro da okuloj, brilaj pro reflektado kontraŭ la ekstera taglumo.

”La antikva instinkta timego al sovaĝbestoj trafis min. Mi pugnigis la manon kaj firme rigardis en la brilantajn okulojn. Mi timis turni min. Tiam venis en mian menson la penso pri la absoluta sekuro, en kiu ŝajnas vivi la homaro. Kaj tiam mi memoris tiun strangan timon al la mallumo. Venkante iom mian timon, mi faris antaŭenpaŝon kaj parolis. Mi konfesas, ke mia voĉo estis raŭka kaj malbone regata. Mi etendis mian manon kaj palpis ion molan. Tuj la okuloj ekmoviĝis flanken kaj ia blankaĵo preterkuris min. Terurigite mi turniĝis kaj vidis strangan simiecan figureton kun ĝia kapo klinata laŭ kurioza maniero, kurantan trans la sunluman spacon malantaŭ mi. Ĝi frapis kontraŭ granitblokon, fuŝpaŝis flanken kaj post momento estis kaŝita en nigra ombro sub alia amaso da rui-nigita masonaĵo.

”Mia impresio pri ĝi estas, kompreneble, malperfekta; sed mi scias, ke ĝi estis malhele blanka kaj havis strangajn grandajn grize ruĝajn okulojn; ankaŭ, ke estis blondaj haroj sur ĝiaj kapo kaj dorso. Sed, ĝi iris tro rapide por ke mi vidu klare. Mi eĉ ne povas diri, ĉu ĝi kuris per la kvar membroj aŭ nur kun la antaŭaj membroj tenataj malsupren. Post momenta paŭzo mi sekvis ĝin en la duan amason da masonaĵo. Mi unue ne povis trovi ĝin; sed post iom da tempo, en la profunda mallumo mi venis al unu el tiuj rondaj puto-similaj truoj, pri kiuj mi jam parolis, duonfermita de falinta kolono. Subita penso venis al mi. Ĉu tiu ĉi estaĵo povus malaperi en la puton? Mi bruligis alumeton, kaj, enrigardante, mi vidis malgrandan, blankan moviĝantan estaĵon kun grandaj brilaj okuloj kiuj fikse rigardis min dum ĝi foriris. Ĝi igis min tremeti. Ĝi tiom similis al homa araneo! Ĝi grimpegis malsupren kaj tiam je la unua fojo mi vidis nombron da metalaj man- kaj

pied-apogiloj, kiuj formis specon de ŝtuparo en la puto, Tiam la alumeto bruligis miajn fingrojn, falis de mia mano kaj estingiĝis, kaj kiam mi bruligis alian, la eta monstro jam malaperis.

”Mi ne scias, kiom longe mi sidis serĉe rigardante en tiun puton. Mi ne sukcesis kredigi al mi, ke la estaĵo kiun mi vidis estas homa, ĝis iom poste. Sed, iom post iom la vero trafis min; ke la homaro ne estis restinta unu speco, sed diferenciĝis en du apartajn bestojn: ke miaj graciaj infanoj de la surtera mondo ne estis la solaj posteuloj de nia generacio, sed ke tiu ĉi palega, naŭza, nokta fibesto, kiu ekaperis antaŭ mi, ankaŭ estis heredanto de ĉiuj epokoj.

”Mi pripensis la flagretantajn kolonojn, kaj mian teorion pri subtera ventumado. Mi komencis suspekti ties veran signifon. Kaj kion, mi demandis al mi, faras tiu ĉi lemuro en mia sistemo de perfekte balancata organizo? Kian rilaton ĝi havas al la mallaborema sereno de la belaj surteruloj? Kaj kio estas kaŝita tie ĉe la malsupro de tiu ŝakto? Mi sidis sur la rando de la puto, dirante al mi, ke almenaŭ estas nenio timinda kaj ke mi devas malsupreniri tien por la solvo de miaj malfacilaĵoj. Kaj tamen, mi absolute timis iri! Dum mia hezitado, du el la belaj surteruloj alkuris en sia amsporto trans la lumon en la ombreon. La viro postkuris la virinon, ĵetante al ŝi florojn.

”Kiam ili vidis min rigardi en la puton, kun mia brako kontraŭ la renversita kolono, ili aspektis ĉagrenitaj. Ŝajne, estis konsiderate maldece rimarki ĉi tiujn truojn; ĉar kiam mi indikis tion ĉi, kaj penis fari demandon en ilia lingvo, ili estis eĉ pli videble maltrankvilaj kaj fortunis sin. Sed ilin interesis miaj alumetoj, kaj mi bruligis kelkajn por amuzi ilin. Mi provis ilin ree pri la puto, kaj denove malsukcesis. Baldaŭ, do, mi

lasis ilin, intencante reiri al Uina por eltrovi, kion mi povos lerni de ŝi. Sed jam okazis revolucio en mia menso; miaj divenoj kaj impresoj glitadis al nova alĝustigo. Mi nun havis helpsignon al la signifo de tiuj ĉi putoj, al la vento-turoj, al la mistero de la fantomoj, kaj ankaŭ mi havis ideon pri la signifo de la bronzaĵoj kaj la sorto de la tempo-maŝino! Kaj tre malklare venis sugesto pri la solvo de la ekonomia problemo, kiu antaŭe estis enigmo al mi.

”Jen la nova opinio. Evidente, tiu ĉi dua homspeco vivas subtere. Estis precipe tri cirkonstancoj, kiuj kredigis al mi, ke ĝia malofta eliro surteren estas la rezulto de longdaŭra subtera alkutimiĝo. Unue, estis la ege pala aspekto, ordinara ĉe la plej multaj bestoj kiuj multe vivas en la mallumo, ekzemple, la blankaj fiŝoj de la kaverno de Kentucky. Ankaŭ tiaj grandaj okuloj kun la povo speguli lumon, estas ordinaraj trajtoj ĉe noktaj estaĵoj — pripensu strigojn kaj katojn. Kaj fine, tiu videbla konfuzo en la sunlumo, tiu rapida sed palpa kaj mallerta forkuro al nigra ombro, kaj tiu stranga teno de la kapo dum estas lume — ĉio plifortigis la teorion pri ege delikata retino.

”Sub miaj piedoj, do, la tero devas esti treege tunelita, kaj tiu tunelaro estas la loĝloko de la nova raso. La ekzisto de ventoltuboj kaj putoj sur la deklivoj — efektive ĉie krom ĉe la rivervalo — montris kiel universala estas ĝia disvastiĝo. Kio, do, estus pli nature ol supozi, ke en tiu ĉi artefarita subtera mondo oni faras tiun laboron, kiu estas necesa al la komforto de la tagluma raso? La ideo estis tiel verŝajna, ke mi tuj akceptis ĝin, kaj tiam faris konkludon pri la kielo de tiu disbranĉiĝo de la homa raso. Kredeble vi povas jam imagi la for-

mon de mia teorio; kvankam mi baldaŭ opiniis, ke ĝi tute ne estas la plena vero.

”Komence, iranta de la problemoj de nia propra epoko, ŝajnis tute klare al mi, ke la iom-post-oma plilarĝigo de la nuntempa nur provizora kaj socia diferenco inter la kapitalisto kaj la laboristo, estas la ŝlosilo al la tuta problemo. Sendube ŝajnos groteske al vi — kaj ege nekredeble! — tamen eĉ nun ekzistas cirkonstancoj kiuj servas kiel antaŭsignoj. Estas tendenco utiligi subteran spacon por la malpli ornamaj bezonoj de la civilizado; troviĝas, ekzemple, la subtera fervojo en Londono, la novaj elektraj fervojoj, la substrataj tuneloj, la subteraj laborejoj kaj restoracioj, kaj ili plimultiĝas. Evidente, mi pensis, tiu tendenco kreskis ĝis la industrio iom post iom perdis sian naskrajton en la ĉielo. Mi volas diri, ke ĝi iris pli kaj pli profunden en ĉiam pli grandajn subterajn fabrikojn, kaj pasigis tie pli kaj pli de sia tempo, ĝis, finfine — —! Eĉ nun, ĉu ne vivas orientlondona laboristo sub tiel artefaritaj kondiĉoj, ke li estas preskaŭ apartigita de la natura tersupraĵo?

”Plue, la ekskluziveco de la pli riĉaj homoj, sendube pro la kreskanta rafineco de ilia edukado, kaj la plilarĝiĝanta fendo inter ili kaj la krudeco de la malriĉuloj — jam rezultas en la fermado, en ilia intereso, de grandaj partoj de la tersupraĵo. Ĉirkaŭ Londono, ekzemple, eble duono de la pli bela kamparo estas fermita kontraŭ entrudiĝo. Kaj tiu sama plilarĝiĝanta fendo — kiu rezultas el la grandaj kosto kaj daŭro de la altklasa edukado, kaj pli multaj ebloj por, kaj tentoj al rafinitaj kutimoj flanke de la riĉularo — pli kaj pli maloftigas tiun interŝanĝon inter unu klaso kaj la alia, tiun antaŭeniĝon per interedziĝo, kiuj nuntempe malhelpas la disfendiĝon de la

homaro laŭ sociaj tavoloj. Tial, fine, sur la tero devos ekzisti la havantoj, ĝuante plezuron kaj komforton kaj belon, kaj sub la tero la nehavantoj, la laboristoj daŭre al kutimiĝante al siaj laborkondiĉoj. Ekestante tie, ili sendube devus pagi luprezon, kaj ne malaltan, por la ventolado de siaj kavernoj, kaj se ili rifuzus, ili mortmalsatus aŭ estus sufokitaj pro pagprokrasto. Tiuj inter ili, kiuj estus tiel formitaj, ke ili estus mizeraj kaj ribelemaj, certe mortus kaj fine, se la ekvilibro daŭre restus, la postvivantoj fariĝus tiel bone adaptitaj al la kondiĉoj de subtera ekzistado, kaj tiel feliĉaj siamaniere, kiel la surteruloj fariĝus al la siaj. Kiel ŝajnis al mi, la delikata beleco kaj la paleco pro lumomanko sekvis tute nature.

”La granda triumfo de la homaro, pri kiu mi sonĝis, prenis novan formon en mia menso. Ĝi ne estis tia triumfo de morala eduko kaj ĝenerala kunagado, kian mi imagis. Anstataŭe mi vidis realan aristokrataron, armitan per perfektigita scienco kaj funkciigantan la hodiaŭan industrian sistemon al logika fino. Ĝia triumfo ne estis nura triumfo super la naturon, sed triumfo super la naturon kaj la kunhomon. Tio, mi devas averti vin, estis mia teorio je tiu tempo. Mi ne havis oportunan gvidlibron en la formo de la utopiaj verkoj. Mia klarigo povas esti absolute malĝusta. Mi ankoraŭ opinias ĝin la plej verŝajna. Sed eĉ laŭ tiu ĉi supozo, la perfekta civilizado, kiu estis fine atingita, ŝajne antaŭ longe preterpasis sian zeniton, kaj jam falis al kadukiĝo. La superperfekta sekuro de la surteruloj kondukis ilin al malrapida degenerado, al ĝenerala malgrandiĝo de staturo, forto, kaj inteligento. Tion mi jam povis vidi tute klare. Kio okazis al la subteruloj, tion mi ankoraŭ ne suspektis; sed pro tio, kion mi vidis pri la morlokoj — tio, cetere, estis la nomo de tiuj ĉi estaĵoj — mi povis

imagi ke la evoluo de la homa speco estis eĉ multe pli profunda ol ĉe la eloj, la bela raso, kiun mi jam konas,

”Tiam venis ĝenaj duboj. Kial la morlokoj forprenis mian maŝinon? Ĉar mi estis certa, ke estas ili, kiuj prenis ĝin. Ankaŭ, se la eloj estas mastroj, kial ili ne povas rehavigi ĝin al mi? Kaj kial ili terure timas la mallumon? Poste, kiel mi diris, mi demandis al Uina pri tiu ĉi subtero, sed denove mi ne kontentiĝis. Unue ŝi ne volis kompreni miajn demandojn kaj poste ŝi rifuzis respondi ilin. Ŝi tremetis, kvazaŭ la temo estus netolerebla. Kaj kiam mi instigis ŝin, eble iomete tro severe, ŝi ekploris. Tiuj estas la solaj larmoj, krom la miaj, kiujn mi vidis en tiu Ora epoko. Kiam mi vidis ilin, mi subite ĉesis ĝeni min pri la morlokoj, kaj nur zorgis forigi de la okuloj de Uina tiujn signojn de la homa heredaĵo. Kaj baldaŭ ŝi ridetis kaj kunfrapis la manojn, dum mi solene bruligis alumeton.

Ĉapitro VI

Eble ŝajnos strange al vi, sed pasis du tagoj antaŭ ol mi povis sekvi la nove trovitan helpsignon laŭ kiu evidente estis la ĝusta maniero. Mi sentis kuriozan abomenon kontraŭ tiuj palaj korpoj. Ili havis ĝuste la blankecan koloron de la vermoj kaj similaj estaĵoj, kiujn oni vidas konservitaj en alkoholo en zoologia muzeo. Kaj ili estis malvarmaĉaj. Eble mia abomeno estis plejparte pro la simpatia influo de la eloj, kies naŭzegan pri la morlokoj mi nun komencis kompreni.

”La sekvintan nokton mi ne bone dormis. Eble mia sanstato ne estis tute bona. Unu du fojojn mi sentis timegon, sed pro kio, mi povis pripensi nenian certan kaŭzon. Mi memoras, ke mi senbrue enŝteliĝis en la ĉambregon, kie la malgranduloj estis dormantaj en la lunlumo — tiun nokton Uina estis inter ili — kaj ke min retrankviligis ilia ĉeesto. Trafis min eĉ tiam la penso, ke post kelkaj tagoj la luno estos en sia lasta fazo kaj la noktoj fariĝos nigre mallumaj, kiam eble estos pli multnombraj la aperoj de tiuj ĉi malagrablaj estaĵoj de malsupre, tiuj ĉi blankaj lemuroj, tiuj ĉi novaj fibestoj kiuj anstataŭis la antaŭajn. Kaj dum ambaŭ el tiuj tagoj mi havis la malkvietan senton de iu, kiu evitas fine neeviteblan devon. Mi estis certa, ke la tempo-maŝino estos rehavebla nur per kuraĝa penetrado en tiujn ĉi subterajn misterojn. Tamen, mi ne povis renkonti la misteron. Se mi havus nur kunulon, estus malsame. Sed mi estis terure sola, kaj la penso malsupren-

grimpi en la mallumon de la puto konsternegis min. Mi ne scias, ĉu vi komprenas mian senton, sed mi neniam sentis min tute sekura malantaŭ mia dorso.

”Eble estis ĉi tiu malkvieto, ĉi tiu malsekuro, kiuj pelis min plu kaj plu en miaj esploroj. Irante sudokcidenten al la monteta kamparo, kiu nun nomigas Combe Wood, mi rimarkis malproksime, en la direkto de deknaŭjarcenta Banstead, vastan verdan konstruaĵon, malsimilan al ĉio, kion mi ĝis tiam vidis. Ĝi estis pli granda ol la plej grandaj el la palacoj aŭ ruinoj, kiujn mi jam konas, kaj la fasado havis orientan aspekton: la fronto de ĝi havis la brilon kaj ankaŭ la verdetan tonon, ian bluverdon, de unu speco de ĉina porcelano. Ĉi tiu diferenco laŭ aspekto sugestis diferencon laŭ uzado, kaj mi emis pluiri por esplori. Sed la horo fariĝis malfrua, kaj mi ekvidis la konstruaĵon post longa kaj laciga ĉirkaŭmarŝo; kaj tial mi decidis prokrasti la aventuron ĝis la sekvanta tago, kaj reiris al la bonvenigo kaj karesoj de eta Uina. Sed la postan matenon mi komprenis tute bone, ke mia scivolemo pri la Palaco el verda porcelano estis speco de memtrompo por ebligi al mi eviti, je unu tago pli, sperton kiun mi timegis. Mi firme decidis malsupreniri sen plia prokrasto, kaj ekiris frumatene al puto proksime al la ruinoj el granito kaj aluminio.

”Eta Uina kuris kun mi. Ŝi dancis apud mi ĝis mi atingis la puton, sed kiam ŝi vidis min kliniĝi super la truo kaj rigardi malsupren ŝi ŝajnis strange konfuzita. ’Adiaŭ, eta Uina’, mi diris, kisante ŝin. Tiam mi restarigis ŝin kaj komencis palpserĉi la grimphokojn interne de la rando. Iom rapide, mi devas konfesi, ĉar mi timis ke mia kuraĝo eble perdiĝos! Komence ŝi rigardis min mirege. Tiam ŝi faris tre kompatigan krion, kaj komencis tiri min per siaj manetoj. Kredeble ŝia kontraŭemo

pli instigis min pluir. Mi forskuis ŝin, eble iom malĝentile, kaj post momento mi estis en la buŝo de la puto. Mi vidis ŝian doloregan vizaĝon super la rando kaj mi ridetis por trankviligi ŝin. Tiam mi devis atenti pri la malfirmaj hokoj al kiuj mi kroĉis min.

”Mi devis grimpi ŝakton de eble ducent metroj. Mi faris la malsupreniron pere de metalaj pecetoj, kiuj elstaris de la muroj de la puto, kaj ĉar tiuj estis intencitaj por estaĵo multe pli malgranda kaj malpeza ol mi, mi rapide fariĝis rigida kaj laca pro la grimrado. Kaj ne nur laca! Unu el la hokoj kurbiĝis subite pro mia pezo kaj preskaŭ ĵetegis min en la mallumon sube. Dum momento mi tenis min nur per unu mano, kaj post tiu sperto mi ne riskis denove ekripoz. Kvankam miaj brakoj kaj dorso baldaŭ treege doloris, mi daŭre grimpis malsupren kiel eble plej rapide. Ekrigardante supren, mi vidis la truon, en kiu estis videbla unu stelo, kaj la kapo de eta Uina aspektis kiel ronda nigra elstarajo. La bruado de maŝino sube fariĝis pli laŭta kaj prema. Ĉio krom tiu malgranda disko supre estis ege malluma, kaj kiam ree mi rigardis supren Uina jam malaperis.

”Mi estis en turmenta malkomforto. Mi pensis peni resupreniri la ŝakton kaj ne plu ĝeni min pri la subtera mondo. Sed eĉ dum mi meditis tion, mi daŭre pluiris. Fine, kun granda ĝojo, mi vidis alproksimiĝi, iomete dekstre, malgrandan niĉon en la muro. Ensvinginte min, mi trovis, ke ĝi estas la buŝo de mallarĝa horizontala tunelo, en kiu mi povos kuŝigi min por ripozi. Ne estis tro frue. Miaj brakoj doloris, mia dorso estis rigidiĝinta, kaj mi tremis pro la longdaŭra timego ke mi falos. Krom tio, la absoluta mallumo suferigis miajn oku-

lojn. La aero vibris pro la pulsado kaj zumego de maŝinoj kiuj pumpis aeron en la ŝakton.

”Mi ne scias, kiom longe mi kuŝis. Vekis min mola mano kiu tuŝis mian vizaĝon. Tuj leviĝante en la mallumo, mi ekprenis miajn alumetojn kaj rapide bruligis iun. Mi vidis forkuri de la lumo tri kliniĝantajn blankajn estaĵojn, similajn al tiu, kiun mi vidis supre en la ruino. Ĉar ili vivis en tio, kio ŝajnis al mi nepenetrebla mallumo, la okuloj estis nenormale grandaj kaj sentemaj, ĝuste kiel la pupiloj de la abismaj fiŝoj, kaj ili reflektis la lumon laŭ la sama maniero. Mi ne dubas, ke ili povis vidi min en tiu senradia mallumo, kaj ili ŝajne havis nenian timon pri mi, escepte pro la lumo. Sed tuj kiam mi bruligis alumeton por vidi ilin, ili forkuris sammomente, kaj malaperis en mallumajn fluejojn kaj tunelojn, de kie iliaj okuloj rigardis min tre strange.

”Mi penis alvoki ilin, sed ilia lingvo evidente estis malsama ol tiu de la surteruloj; tial mi devis senhelpe dependi de miaj propraj klopodoj, kaj la penso pri forkuro, anstataŭ esploro, estis ankoraŭ en mia menso. Sed mi diris al mi, ’Nun io ja okazos’, kaj palpserĉante la vojon laŭ la tunelo, mi trovis, ke la bruo de maŝinoj fariĝas pli laŭta. Baldaŭ la muroj flankeniris kaj mi venis en grandan spacon. Mi bruligis novan alumeton kaj vidis, ke mi eniris vastan arkforman kavernon, kiu etendiĝas en plenan mallumon preter la limo de mia flameto. Mi vidis tiom, kiom oni povus vidi per la brulado de unu alumeto.

”Mia memoro necese estas malklara. Grandaj formoj, kiaj maŝinegoj, leviĝis el la malhelo, kaj ĵetis groteskajn nigrajn ombrojn, en kiuj apenaŭ videblaj fantomecaj morlokoj ŝirmis sin kontraŭ la brilo. La loko, cetere, estis tre sufoka kaj pre-

ma kaj la haladzeto de freŝa sango estis en la aero. Antaŭ mi, ie meze, staris malgranda tablo el blanka metalo, sur kiu ŝajnis esti manĝaĵo. La morlokoj, almenaŭ, estis viandomanĝaj! Mi memoras, ke eĉ je tiu momento mi demandis al mi, kia granda besto povas ankoraŭ tiam ekzisti por provizi la ruĝan viandopecon kiun mi vidis. Ĉio estis malklara: la obtuzaodoro, la grandaj sensignifaj formoj, la figuraĵoj kiuj kaŭris en la ombroj kaj nur atendis la mallumon por reataki min! Tiam la alumeto finbrulis kaj pikis miajn fingrojn, kaj falis kiel tur-niĝanta ruĝaĵo en la mallumo.

”Mi pripensis poste, kiel treege misarmita mi estis por tia aventuro. Kiam mi komencis konstrui la tempo-maŝinon mi absurde supozis, ke la homoj de la estonto certe estos neimageble pli progresintaj ol ni rilate al sia tuta ilaro. Mi venis sen armiloj, sen kuracaĵo, sen io fumebla — foje mi sentegis la mankon de tabako — eĉ sen sufiĉe da alumetoj. Se mi nur estus pensinta pri fotografilo! En unu sekundo mi povus ekregistri tiun vidon de la subtero, kaj poste povus ekzameni ĝin laŭvole. Sed, efektive mi staris tie kun nur la armiloj kaj la povoj kiujn donis al mi la naturo — manoj, piedoj, dentoj; ĉi tiuj kaj la kvar alumetoj, kiuj ankoraŭ restis al mi.

”Mi timis ŝovi min en la mallumo inter tiun maŝinaron, kaj nur per la lasta brileto de mia alumeto mi eltrovis, ke mia provizo preskaŭ finiĝis. Neniam mi pensis ĝis tiu momento, ke estas necese uzi ilin ekonomie, kaj mi malŝparis preskaŭ la duonon por mirigi la surterulojn, al kiuj fajro estis novaĵo. Nu, kiel mi diris, restis al mi kvar kaj dum mi staris en la mallumo, ies mano tuŝis min, maldikaj fingroj pripalpis mian vizaĝon, kaj mi sentis kuriozan malagrablan odoron. Mi kredis aŭdi la spiradon de amaso de tiuj aĉaj estaĵetoj ĉirkaŭ mi. Mi

sentis, ke ili zorge prenis la alumetujon el mia mano, kaj aliaj malantaŭ mi pinĉis miajn vestojn. La sento de tiuj nevidataj estaĵoj ekzamenantaj min estis nedireble naŭza. La subita konstato de mia nescio pri iliaj pens- kaj ag-manieroj ekvenis al mi tre trafe en la mallumo. Mi kriegis al ili kiel eble plej laŭte. Ili ekkuris for, kaj tiam mi sentis, ke ili revenas al mi. Ili tenis min pli kuraĝe, frustrante strangajn sonojn inter si. Mi tremegis kaj denove kriis — iom malakorde. Ĉi tiun fojon ili ne tiom timis, kaj kurioze ridaĉis, dum ili revenis al mi. Mi konfesas, ke mi terure timis. Mi decidis bruligi plian alumeton kaj forkuri sub la ŝirmo de ties brilo. Tion mi faris, kaj plilongigante la daŭron de la flameto per paperpeco el mia poŝo, mi sukcese reiris al la mallarĝa tunelo. Sed apenaŭ mi eniris ĝin kiam mia lumo estingiĝis, kaj en la mallumo mi povis aŭdi la morlokojn susuri kiel la vento inter arbofolioj, kaj frapeti kiel la pluvo, dum ili postkuregis min.

”Post momento tenaĉis min multaj manoj kaj estis nenia dubo, ke ili klopodas retreni min. Mi flamigis plian alumeton kaj flirtigis ĝin en iliajn kvazaŭblindajn vizaĝojn. Vi apenaŭ povas imagi kiel naŭze malhomaj ili aspektis — tiuj palaj, sentimentonaj vizaĝoj kaj senpalpebraj okulegoj! — dum ili rigardegis en siaj blindeco kaj konfuzo.

”Sed mi ne restis por rigardi, mi certigas al vi: mi denove kuris returne kaj kiam mia dua alumeto finiĝis mi bruligis mian trian. Ĝi preskaŭ jam finbrulis, kiam mi atingis la traron en la ŝakto. Mi ekkuŝiĝis ĉe la rando, ĉar turnis mian kapon la bruado de la pumpilego malsupre. Tiam mi palpserĉis flanke la elstarantajn hokojn kaj samtempe iu malantaŭ mi ekprenis miajn piedojn kaj tiregis min. Mi bruligis mian lastan alumeton kaj tuj ĝi estingiĝis. Sed nun mi havis miajn

manojn sur la grimphokojn, kaj furioze piedŝovante, mi liberigis min el la ungoj de la morlokoj kaj rapide grimpegis supren la ŝakton dum ili restis kaj konfuze rigardis min; ĉiuj krom unu aĉuleto, kiu sekvis min iom kaj preskaŭ ricevis mian boton kiel memoraĵon.

”Tiu grimpado ŝajnis al mi senfina. Je la lastaj ses aŭ ok metroj terura naŭzo ekatakis min. Estis treege malfacile ne perdi mian tenadon. La lastaj kelkaj metroj konsistis el timiga baraktado kontraŭ tiu ĉi svenemo. Multfoje mia kapo turniĝis kaj mi sentis ĉiajn sensaciojn de falado. Fine, tamen, mi grimpis el la puto kaj ŝanceliĝis ekster la ruinon en la blindigan sunlumon. Mi falis sur mian vizaĝon. Eĉ la tero odoris dolĉa kaj pura. Mi memoras tiam Uinan kisanta miajn manojn kaj orelojn kaj la voĉojn de aliaj eloj. Poste dum iom da tempo mi estis senkonscia.

Ĉapitro VII

Nun efektive mi ŝajnis en pli malbonaj cirkonstancoj ol antaŭe. Ĝis tiam, krom dum mia tutnokta angoro pro la perdo de la tempo-maŝino, mi havis subtenan esperon pri fina saviĝo, sed tiun esperon krevigis tiuj ĉi novaj eltrovoj. Ĝis tiam mi nur konsideris min malhelpata de la infana naiveco de la malgranduloj, kaj de iaj nekonataj potencoj, kiujn mi devos nur kompreni por venki; sed estis tute nova elemento en la naŭzeco de la morlokoj — io malhoma kaj malica. Instinkte mi abomenegis ilin. Antaŭe mi sentis min kiel viro, kiu falis en kavon: mia zorgo rilatis al la kavo kaj kiel eliri ĝin. Nun mi sentis min kiel besto en kaptilo, kies malamiko baldaŭ alvenos.

”La malamiko, kiun mi antaŭtimis, eble surprizos vin. Temis pri la mallumo de la nova luno. Estis Uina, kiu unue metis tion en mian menson per iuj komence nekompreneblaj diroj pri la mallumaj noktoj. Nun ne estis tre malfacila problemo diveni la signifon de la alproksimiĝantaj mallumaj noktoj. La luno daŭre malkreskis; ĉiun nokton la mallumo plilongiĝis. Kaj nun mi iom komprenis almenaŭ la kaŭzon de la timo de la malgrandaj surteruloj pro la mallumo. Mi nek-lare scivolis, kia povus esti la pekaĉo, kiun faras la morlokoj sub la novluno. Mi nun estis preskaŭ certa, ke mia dua supozo estas tute malĝusta. Povas esti, ke la surteruloj iam estis la favorata aristokrataro, kaj la morlokoj iliaj mekanikaj ser-

vistoj; sed tio jam antaŭ longe forpasis. La du specoj, kiuj rezultis el la evoluo de la homaro, glitegas al, aŭ jam atingis, tute novan interrilaton. La eloj, simile al la Karlaj reĝoj,* estis degenerintaj al nura bela vaneco. Ili ankaŭ, tolerate de la morlokoj, posedis la teron: pro tio ke la morlokoj, loĝinte subtere dum nekalkuleblaj generacioj, finfine trovis la tagluman tersupraĵon netolerebla. Kaj, mi konkludis, la morlokoj faras iliajn vestojn kaj provizas ilin per iliaj kutimaj bezonaĵoj, eble pro la postresto de malnova servemo. Ili faris tion kiel staranta ĉevalo frapas per sia piedo aŭ kiel viro ĝuas en sporto la mortigon de bestoj: ĉar antikvaj kaj forpasintaj necesoj impresis ĝin sur la organismon. Sed, klare, la malnova aranĝo jam parte renversiĝis. La venko de la morlokoj alproksimiĝis. Antaŭ miloj da generacioj la homo ŝovis sian frathomon ekster la komforton kaj sunlumon. Kaj nun tiu frato revenas — ŝanĝita! Jam la eloj komencis relerni unu antaŭan lecionon. Ili konatiĝas kun timo. Kaj subite venis en mian menson memoro pri la viando, kiun mi vidis en la subtero. Ŝajnis kurioze, kiel tio flosis en mian menson: ne kvazaŭ ekŝovite de la fluo de mia meditado, sed preskaŭ kiel demando de ekstere. Mi penis memori ĝian formon. Mi havis malklaran impreson de io konata, sed je tiu tempo mi ne povis decidi, kio ĝi estas.

”Tamen, kiom ajn senpovaj estu la malgranduloj en la ĉesto de sia mistera timo, mi estis malsame formita. Mi venis el tiu ĉi epoko nia, tiu ĉi matura printempo de la homa raso, kiam timo ne paralizas kaj mistero jam perdis sian terurigon. Mi, almenaŭ, defendos min. Sen plia prokrasto mi decidis fari al mi armilojn kaj fortikaĵon, kie mi povos dormi. Kun tiu rifuĝejo kiel centro, mi povos alrigardi tiun ĉi strangan mon-

* Dinastio de frankaj reĝoj, nomitaj laŭ Karlo la Granda (742 — 814)

don kun iom de tiu konfido, kiun mi perdis, kiam mi konstatis, kiaj estaĵoj ĉirkaŭas min ĉiunokte. Mi sentis, ke mi neniam ree povos dormi, ĝis mia lito estos sekura kontraŭ ili. Mi tremis pro teruro, kiam mi pensis kiel ili certe jam ekzamenis min.

”Mi vagis dum la posttagmezo laŭ la valo de la Tamizo, sed trovis nenion, kio rekomendis sin kiel neatingebla. Ĉiuj konstruaĵoj kaj arboj aspektis facile grimpeblaj al tiaj lertaj grimpantoj, kiaj ŝajnis esti — pro siaj putoj — la morlokoj. Tiam revenis al mia memoro la altaj pintoj de la Palaco el verda porcelano kaj la polurita brilo de ties muroj; kaj la vesperon, portante Uinan kiel infanon sur mia ŝultro, mi supreniris la montetojn en la sudorienta direkto. La distancon mi jam taksis kiel 12 – 14 kilometrojn, sed verŝajne ĝi estis preskaŭ 30. Mi unue estis vidinta la lokon je tia malseka posttagmezo, kiu trompe malgrandigas distancojn. Plue, la kalkanumo de unu el miaj ŝuoj estis malfirma, kaj najlo komencis trapuŝi sin tra la plandumo — ili estis komfortaj malnovaj ŝuoj, kiujn mi portis hejme — tial mi estis lama. Kaj estis jam longe post noktomezo, kiam mi ekvidis la Palacon siluetatan nigra kontraŭ la flaveto de la ĉielo.

”Kiam mi komencis porti ŝin, Uina raviĝis, sed post iom da tempo ŝi volis, ke mi remetu ŝin sur la teron, kaj kuris apude de mi. Foje ŝi ekiris flanken por kolekti florojn, kiujn ŝi metis en miajn poŝojn. Miaj poŝoj ĉiam estis enigmo al Uina, sed fine ŝi konkludis ke ili estas fantazia speco de vazo por flora ornamado. Almenaŭ, ŝi utiligis ilin tiucele. Kaj tio memorigas al mi! Ŝanĝante mian jakon mi trovis ...”

La tempo-vojaĝanto paŭzis, metis sian manon en la poŝon, kaj silente elmetis sur la tableton du velkintajn florojn, ne malsimi-

lajn al tre grandaj blankaj malvoj. Tiam li daŭrigis sian rakonton.

”Dum transrampis la mondon la vespera silento, kaj ni pluiris super la monteton en la direkto al Wimbledon, Uina fariĝis laca kaj volis reiri al la domo el griza ŝtono. Sed mi indikis al ŝi la malproksimajn pintojn de la Palaco el verda porcelano, kaj klopodis komprenigi al ŝi, ke ni serĉus tie rifuĝejon for de ŝia timo. Vi konas tiun grandan paŭzon, kiu trafas la mondon antaŭ noktiĝo? Eĉ ĉesas la venteto en la arboj. Al mi, ĉiam estas atmosfero de atendado dum tiu vespera silento. La ĉielo estis klara, malproksima kaj malplena, krom kelkaj horizontalaj strioj ĉe la subiranta suno. Nu, tiun nokton la atendado ekhavis la karakteron de miaj timoj. En tiu malluma kvieto miaj sentoj ŝajnis supernature akritigitaj. Mi eĉ pensis, ke mi povas senti la kavecon de la tero sub miaj piedoj; povas, efektive, preskaŭ vidi tra ĝi la morlokojn en ilia formikejo irantaj tien kaj reen kaj atendantaj la nokton. En mia ekscitiĝo, mi pensis, ke ili ricevos kiel militdeklaron mian entrudon en siajn tunelojn. Kaj kial ili prenis mian tempo-maŝinon?

”Tiel ni pluiris en la kvieto, kaj la krepusko fariĝis nokto. Velkis la klara bluo de la malproksimo kaj unu post la aliaj aperis la steloj. La tero fariĝis neklara kaj la arboj nigriĝis. Plifortigis ĉe Uina ŝiaj timoj kaj laco. Mi prenis ŝin en miajn brakojn kaj parolis al ŝi kaj karesis ŝin. Tiam, dum nigriĝis la mallumo, ŝi metis siajn brakojn ĉirkaŭ mian kolon, fermis la okulojn, kaj firme premis sian vizaĝon sur mian ŝultron. Tiel ni malsupreniris longan deklivon en valon, kaj tie en la malhelo mi preskaŭ marŝis en rivereton. Tion ĉi mi travadis. Mi supreniris la kontraŭan flankon de la valo, preterpasis nom-

bron da dormdomoj, kaj venis al statuo — Faŭno, aŭ ia simila figuro, sen la kapo. Tie ĉi estis ankaŭ akacioj. Ĝis tiam mi vidis nenian signon de la morlokoj, sed estis ankoraŭ frue en la nokto, kaj ankoraŭ ne venis la pli nigraj horoj antaŭ la leviĝo de la malnova luno.

”De sur la supro de monteto mi vidis densan arbaron, kiu etendiĝis larĝa kaj nigra antaŭ mi. Mi hezitis je tio. Mi povis vidi neniun finon al ĝi, aŭ dekstre, aŭ maldekstre. Ĉar mi sentis min laca — precipe miaj piedoj estis tre doloraj — mi demetis Uinan de mia ŝultro kaj sidiĝis sur la herbaĵon. Mi ne plu povis vidi la Palacon el verda porcelano, kaj mi dubis pri ties direkto. Mi rigardis en la densecon de la arbaro kaj pensis pri tio, kion ĝi povas kaŝi. Sub la dika konfuzo de branĉoj oni ne povus vidi la stelojn. Eĉ se estus nenia alia insida danĝero — danĝero pri kiu mi ne kuraĝis formi imagon — tamen ekzistus la danĝero, ke mi falos pro la radikoj kaj frapos min kontraŭ la arbotrunkoj.

”Plue, mi estis tre laca pro la ekscitoj de la tago; tial mi decidis ne entrepreni ĝin, sed pasigi la nokton sur la neŝirmata monteto.

”Uina, kiel mi kontente konstatis, profunde dormis. Mi zorge volvis ĉirkaŭ ŝin mian jakon kaj sidiĝis ĉe ŝi por atendi la leviĝon de la luno. La deklivo estis kvieta kaj soleca, sed el la nigro de la arbaro venis foje la moviĝo de vivaĵoj. Super mi brilis la steloj, ĉar la nokto estis tre klara. Mi sentis ian amikan komforton pro ilia briletado. Ĉiu el la antaŭaj stelaroj tamen jam malaperis de la ĉielo. Tiu malrapida moviĝo, kiu estas neperceptebla dum cent homaj vivdaŭroj, jam antaŭ longe rearanĝis ilin en nekonatajn grupojn. Sed la Lakta vojo, ŝajnis al mi, ankoraŭ estis la sama ĉifona strio de steleroj, kia

ĝi antaŭe estis. Sude (laŭ mia takso) estis tre brila ruĝa stelo kiu estis nova al mi; ĝi estis eĉ pli grandioza ol nia propra verda Siriuso. Kaj, inter ĉiuj ĉi briletantaj lumpintoj, unu hela planedo brilis afable kaj firme, kiel la vizaĝo de malnova amiko.

”Mia rigardado al tiuj ĉi steloj subite malgrandigis miajn proprajn ĝenojn kaj ĉiujn gravaĵojn de la tera vivo. Mi pripensis ilian netakseblan distancon for, kaj la malrapidan neeviteblan glitadon de ilia moviĝo el la nekonata pasinto en la nekonatan estonton. Mi pensis pri la grandega ekvinoksa ciklo, kiun faras la tera akso. Tiu silenta rotacio okazis nur kvardek fojojn dum la tempospacego kiun mi transveturis. Kaj dum tiuj malmultaj rotacioj estis forŝovitaj de la mondo ĉia agado, ĉiuj tradicioj, la kompleksaj organizaĵoj, la nacioj, lingvoj, literaturo, aspiroj, eĉ la nura memoro pri la homaro kiel mi konis ĝin. Ekzistis anstataŭe tiuj ĉi malfortuloj, kiuj forĝis siajn prapatrojn, kaj la blankaĵoj, pro kiuj mi vivis en teruro. Tiam mi pensis pri la timego, kiu staras inter la du specoj, kaj je la unua fojo, kun subita tremeto, venis klara scio pri tio, kio povas esti la viando, kiun mi vidis. Tamen, estis tro terure! Mi ekrigardis etan Uinan, kiu dormis ĉe mia flanko, ŝia vizaĝo blanka kaj steleca sub la steloj, kaj mi tuj forigis la penson.

”Dum tiu longa nokto mi kiel eble plej efike penis ne pripensi la morlokojn kaj pasigis la tempon provante imagi, ke mi povas trovi signojn de la malnovaj stelgrupoj en la nova konfuzo. La ĉielo restis tre klara, escepte de unu-du nebulecaj nuboj. Sendube mi foje dormetis. Tiam, dum daŭris mia gardado, nuanciĝis la orienta ĉielo kiel la reflekto de ia senkolora fajro, kaj la malnova luno leviĝis, maldika kaj pinta kaj

blanka. Kaj tuj poste atingis ĝin kaj superfluis ĝin la krepusko, unue pala, kaj poste ruĝeta kaj varma. Neniu morloko estis veninta al ni. Efektive, mi vidis neniun sur la monteto tiun nokton. Kaj en la konfido de la nova tago preskaŭ ŝajnis al mi, ke mia timo estis neracia. Mi stariĝis kaj trovis, ke mia piedo kun la malfirma kalkanumo ŝvelis ĉe la maleolo kaj doloris sub la kalkano; tial mi residiĝis, deprenis miajn ŝuojn kaj ĵetis ilin for.

”Mi vekis Uinan kaj ni malsupreniris en la arbaron, kiu nun estis verda kaj agrabla anstataŭ nigra kaj timiga. Ni trovis iom da frukto por forigi nian malsaton. Ni baldaŭ renkontis aliajn el la delikatumoj, kiuj ridis kaj dancis en la sunlumo, kvazaŭ ne ekzistus tia afero, kia la nokto. Kaj tiam denove mi pensis pri la viando, kiun mi vidis. Mi estis nun certa pri kio ĝi estis, kaj el mia koro mi kompatis tiun ĉi lastan rivereton de la grandioza fluego de la homaro. Evidente, iam en la pratempo de la homa degenero okazis ekmanĝo en la nutraĵo de la morlokoj. Eble ili vivis de ratoj kaj tiaj bestaĉoj. Eĉ nun la homo estas multe malpli elektema kaj ekskluziva pri sia nutraĵo ol li estis — multe malpli ol ia simio. Lia naŭzo kontraŭ homa karno tute ne estas profunda instinkto. Kaj tiuj bestaj homidoj do —! Mi penis rigardi la aferon laŭ scienca vidpunkto. Almenaŭ, ili estis malpli homaj kaj pli malproksimaj ol niaj kanibalaj prauloj de antaŭ tri aŭ kvar mil jaroj. Kaj malaperis la inteligento, kiu estus farinta tiajn cirkonstancojn turmentaj. Kial mi ĝenu min? Tiuj ĉi eloj estis nuraj grasigitaj brutoj, kiujn la formikaj morlokoj ĉasis — eble prizorgis ilian bredadon. Kaj jen Uina, kiu dancis ĉe mia flanko!

”Tiam mi provis savi min de la teruro, kiu superrampas min, rigardante ĝin kiel severan punon pro homa egoismo. La

homo estis kontenta vivi en komforto kaj feliĉo per la laboro de sia frathomo, uzis neceson kiel sian signalvorton kaj pretekston, kaj siatempe neceso retrafis lin. Mi eĉ provis primoki tiun ĉi mizeran kadukiĝintan aristokrataron. Sed tia pensmaniero estis neebla. Kiom ajn granda estu ilia intelekta malprogreso, la eloj restis tro similaj al la homa formo, ke ili ne meritu mian kompaton, kaj mi tial devis esti partoprenanto en ilia degenero kaj ilia timo.

”Mi havis je tiu tempo tre malklarajn ideojn pri tio, kion mi devus fari. Mia unua estis havigi ian sekuran rifuĝejon kaj fari al mi tiajn armilojn el metalo aŭ ŝtono, kiajn mi povus elpenssi. Tiu neceso estis urĝa. Due, mi esperis havigi ian rimedon por fari fajron, por ke mi havu ĉe mi armilon en la formo de torĉo, ĉar mi sciis, ke nenio estos pli efika kontraŭ la morlokoj. Tiam mi volis aranĝi ian rimedon por perforte malfermi la bronzajn pordojn sub la blanka sfinkso. Mi pensis pri ia ŝovilego. Mi konvinkiĝis, ke se mi povus eniri tiujn pordojn, kaj porti antaŭ mi brilegan lumon, mi trovus la tempo-maŝinon kaj savus min. Mi ne povis imagi la morlokojn sufiĉe fortaj por movi ĝin tre malproksimen. Mi jam decidis porti Uinan kun mi al nia epoko. Kaj meditante tiajn projektojn, mi daŭrigis nian migron al la konstruaĵo, kiun mia kaprico jam elektis kiel nian loĝejon.

Ĉapitro VIII

Kiam ĉirkaŭ tagmezo, ni alproksimiĝis la Palacon el verda porcelano, mi trovis ĝin forlasita kaj disfalanta en ruinojn. Nur ĉifonaj pecoj da vitro restis en ĝiaj fenestroj, kaj grandaj pecoj de la verda antaŭaĵo estis forfalintaj de la rustiĝinta metala skeleto. Ĝi staris tre alta sur herba monteto, kaj kiam mi rigardis norden antaŭ ol mi eniris ĝin, mi rimarkis kun surprizo grandan riverbuŝon, aŭ eĉ golfon, kie, mi opiniis, antaŭe devis esti Wandsworth kaj Battersea. Mi pensis tiam — kvankam mi neniam sekvis la penson — pri tio, kio eble okazis aŭ okazas al la vivaĵoj en la maro.

”La materialo de la Palaco post ekzameno ja pruviĝis esti porcelano, kaj trans la fasado mi vidis skribaĵon en iaj nekonataj signoj. Mi pensis, iom malsaĝe, ke Uina eble helpos al mi interpreti tion, sed mi nur lernis, ke la ideo de skribo neniam eniris ŝian menson. Mi opinias, ke ŝi ĉiam ŝajnis al mi pli homa ol ŝi estis, eble ĉar ŝia amo estis tiel homa.

”Malantaŭ la grandaj klapoj de la pordo — kiuj estis malfermitaj kaj rompitaĵoj — ni trovis, anstataŭ la kutima vestiblo, longan galerion lumigatan de multaj flankfenestroj. Je ekrigardo, ĝi memorigis min pri muzeo. La kahelita planko estis dense kovrita de polvo kaj miriga kolekto da diversaj objektoj havis la saman grizan kovraĵon. Tiam mi rimarkis, strangan kaj maldikan en la mezo de la ĉambro, ion kio klare estis la malsupra parto de giganta skeleto. Mi rekonis, pro

la oblikvaj piedoj, ke ĝi estas ia formortinta besto simila al la megaterio. La kranio kaj la supraj ostoj kuŝis flanke de ĝi en la dika polvo, kaj en unu loko, kie pluvo estis tragutinta truon en la tegmento, la skeleto mem estis velkigita. Pli fore en la galerio staris grandega skeleto de brontosauro. Mia supozo pri muzeo estis konfirmita. Irante flanken, mi trovis ion, kio ŝajnis esti dekliva bretaro, kaj, movinte la dikan polvamason, mi trovis la konatajn vitraĵojn de nia epoko. Sed ili certe estis hermetikaj, laŭ la atesto de la sufiĉe bona stato de partoj de la enhavo.

”Evidente ni staris inter la ruinoj de ia posttempa South Kensington! Tie ĉi, ŝajne, estis la paleontologia fako, kaj bona kolekto da restaĵoj ĝi antaŭe ja devis esti. Tamen, la neevitebla velkado kiu estis dum iom da tempo fortenita kaj, pro la malapero de la bakterioj kaj fungoj, perdis naŭdek naŭ procentojn de sia potenco, atakis denove la trezorojn, treege certe, eĉ se treege malrapide. Diversloke mi trovis signojn de la malgranduloj, en la formo de maloftaj restaĵoj rompitaĵoj aŭ ŝnure kunfiksitaĵoj per herberoj. Kaj kelkloke iuj — laŭ mia opinio la morlokoj — estis perforte forprenintaj la kestojn. Estis tre silente. La densa polvo senbruis niajn paŝojn. Uina, kiu estis rulinta ekinon sur la dekliva vitro de unu el la kestoj, baldaŭ venis, dum mi rigardis ĉirkaŭ min, kaj tre kviete prenis mian manon kaj staris ĉe mi.

”Kaj komence min tiel surprizis tiu ĉi antikva monumento de epoko intelekta, ke mi neniel pensis pri la ebloj kiujn ĝi prezentis. Eĉ mia pensado pri la tempo-maŝino iomete retiris sin de mia menso.

”Se oni konsideras ĝian grandecon, tiu ĉi Palaco el verda porcelano enhavis multe pli ol Galerion de paleontologio;

eble historiajn galeriojn; povas esti, eĉ libron! Al mi, almenaŭ en miaj tiamaj cirkonstancoj, tiuj estus ege pli interesaj ol tiu ĉi spektaklo de pratempa geologio en kaduka stato. Esplorante, mi trovis alian mallongan galerion transe de la unua. Tiu ĉi ŝajnis dediĉi sin al mineraloj, kaj la ekvido de bloko da sulfuro pensigis min pri pulvo. Sed mi ne povis trovi salpetron; efektive mi trovis neniajn azotatojn. Sendube ili fluidiĝis antaŭ longege. Tamen, la sulfuro restis en mia menso kaj iniciatis aron da pensoj. Rilate al la cetero de la enhavo de tiu galerio, kvankam ĝenerale ĝi estis la plej bone konservita el ĉiuj, kiujn mi vidis, ĝi ne tre interesis min. Mi tute ne estas specialisto pri mineralogio, kaj mi pluiris laŭ tre ruinigita koridoro paralele kun la unua ĉambrego, kiun mi eniris. Evidente tiu ĉi fako estis dediĉita al natura historio, sed ĉio jam antaŭ longe fariĝis nerezonebla. Kelkaj velkintaj kaj nigriĝintaj restaĵoj, kiuj iam estis konservitaj bestoj, elsekiĝintaj mumioj en konservujoj, kiuj iam enhavis alkoholon, la bruna polvo de malaperintaj plantoj; jen ĉio! Mi bedaŭris tion, ĉar mi estus ĝojinta elserĉi la patentitajn metodojn, per kiuj oni estis venkinta la vivantan naturon. Tiam ni venis al galerio absolute kolosa, sed kurioze maltaŭge lumigata. La planko havis etan deklivon komence de la fino, kien mi eniris. Diversloke blankaj globoj pendis de la plafono — multaj el ili fenditaj kaj frakasitaj — kio sugestis, ke originale la ejo estis artefarite lumigata. Tie ĉi mi estis pli en mia elemento, ĉar leviĝis ambaŭflanke la grandaj formoj de maŝinegoj, ĉiuj tre rustiĝintaj kaj multaj rompitaĵoj, sed kelkaj ankoraŭ sufiĉe kompletaj. Vi scias, ke mi havas pasion pri mekanismo, kaj mi emis resti inter tiuj ĉi maŝinoj, des pli ĉar plejparte ili havis la intereson de enigmoj, kaj mi povis fari nur la plej malcer-

tajn divenojn pri ilia celo. Mi supozis, ke se mi povus solvi iliajn enigmojn, mi akirus povojn, kiuj eble utilis kontraŭ la morlokoj.

”Subite Uina venis tre proksime al mia flanko. Tiel subite, ke ŝi surprizis min. Se ŝi ne estus farinta tion, mi kredeble tute ne rimarkus la deklivon de la galeria planko. La parto, kiun mi eniris, estis tute super la tero, kaj lumigis ĝin strangaj tre mallarĝaj fenestroj. Laŭlonge de la galerio, la tero leviĝis kontraŭ tiuj ĉi fenestroj, ĝis fine antaŭ ĉiu estis kavo simila al la subteretaĝa korteto de Londona domo, kaj nur strio de taglumo ĉe la supro. Mi pluiris malrapide, scivolante pri la maŝinoj, kaj tro atentis ilin por rimarki la iom-post-ioman malpliigoŝon de la lumo, ĝis la kreskanta timo de Uina altiris mian atenton. Tiam mi vidis, ke la galerio finiĝas en densa mallumo. Mi heditis, kaj tiam, rigardante ĉirkaŭ min, mi vidis, ke la polvo estas malpli abunda kaj ĝia supraĵo estas malebena. Pli malproksime, en la direkto de la mallumo, ĝi ŝajnis esti rompita de nombro da mallarĝaj piedsignetoj. Je tio revigliĝis mia sento pri la apudesto de la morlokoj. Mi sentis, ke mi malŝparas mian tempon per tiu ĉi akademia ekzameno de la maŝinaro. Mi ekmemoris ke estas jam malfrue en la posttagmezo kaj ke mi ankoraŭ havas nenian armilon por fari fajron. Kaj tiam, for en la malluma parto de la galerio, mi aŭdis kuriozan frapetadon kaj la samajn strangajn bruojn, kiujn mi aŭdis en la putto.

”Mi tenis la manon de Uina. Tiam, frapite de subita ideo, mi lasis ŝin kaj turniĝis al maŝino, de kiu elstaris man-stango ne malsimila al tia, kiaj troviĝas en fervoja signal-budo. Mi grimpis sur la maŝinon, tenis tiun stangon per miaj manoj, kaj per mia tuta forto flankenŝovis ĝin. Subite Uina, forlasi-te en la meza koridoro, komencis ploreti. Mi sufiĉe bone tak-

sis la forton de la stango, ĉar ĝi rompiĝis post unuminuta streĉado, kaj mi reiris al ŝi, kun sceptro en mia mano, kiu estis, miaopinie, pli ol sufiĉa por la kranio de kiu ajn morloko eventuale renkontota. Kaj mi tre sopiris mortigi unu-du morlokojn. Tre malhome, vi eble opinias, voli mortigi siajn posteulojn! Sed ial estis neeble senti ian humanecon por la estaĵoj. Malebligis mian tujan alkuron por mortigi la fiulojn, kiujn mi aŭdis, nur mia malinklino forlasi Uinan, kaj la kredo, ke se mi komencos satigi mian murdemon, mia tempo-maŝino eble suferos.

”Nu, kun la stango en unu mano kaj Uina ĉe la alia, mi eliris el tiu galerio kaj eniris alian eĉ pli grandan, kiu je ekvido memorigis min pri militista kapelo, ornamita per ĉifonaj flagoj. La brunajn kaj putrajn ĉifonojn, kiuj pendis de ĝiaj muroj, mi baldaŭ rekonis kiel velkajn restaĵojn de libroj. Ili antaŭ longe disfalis, kaj ĉiu signo de preso jam forlasis ilin. Sed kelkloke estis fleksitaj bindaĵoj kaj fenditaj metalaj agrafoj, kiuj tute bone rakontis sian historion. Se mi estus literaturulo, mi eble estus meditata pri la vaneco de ĉia ambicio. Sed, efektive tio, kio plej trafis min, estis la ega malŝparo de laboro, pri kiu atestis tiu ĉi mizera dezerto de putra papero. Je tiu tempo, mi konfesas, mi ĉefe pensis pri la filozofiaj traktatoj kaj miaj propraj dek sep referatoj pri fizika optiko.

”Tiam, suprenmarŝinte larĝan ŝtuparon, ni venis al io, kio iam devis esti galerio de teknika kemio. Kaj tie ĉi mi havis iom da espero pri utilaj eltrovoj. Krom ĉe unu fino, kie la tegmento jam disfalis, tiu ĉi galerio estis en bona stato. Mi iris entuziasme al ĉiu nerompita kesto. Kaj fine, en unu el la vere hermetikaj kestoj, mi trovis skatoleton da alumetoj. Tre avide mi provis ilin. Ili estis perfektaj. Ili eĉ ne estis malseketaj. Mi tur-

niĝis al Uina. 'Dancu', mi kriis al ŝi en ŝia propra lingvo. Ĉar nun mi havis efektivan armilon kontraŭ la naŭzaj estaĵoj, kiujn mi timis. Kaj tiel, en tiu forlasita muzeo, sur la dika, mola polvo-tapiŝo, je la ega ĝojo de Uina, mi solene faris specon de miksitaj danco, fajfante kiel eble plej gaje *La lando de l'lojaluloj*. Parte ĝi estis modesta *cancan*, parte paŝ-danco, parte jup-danco (tiom, kiom permesis mia basko), kaj parte originala. Ĉar mi estas nature inventema, kiel vi scias.

"Nu, mi ankoraŭ opinias, ke tre stranga estis la fakto, ke tiuj ĉi alumetoj evitis la detruemon de tempo dum nekalkuleblaj jaroj, kaj tio estis tre bonŝanca por mi. Tamen, iom strange, mi trovis multe pli neatendeblan substancon, kaj tio estis kamforo. Mi trovis ĝin en sigelita ujo, kiu, mi supozas, hazarde estis hermetike sigelita. Mi supozis unue, ke ĝi estas parafinvakso kaj rompita la vitron. Sed laodoro de kamforo estis nemiskomprenebla. Kontraŭ la universala velkiĝo tiu ĉi vaporigema substanco hazarde eltenis, eble dum multmilaj jarcentoj. Ĝi memorigis min pri sepia pentraĵo, kiun iam mi vidis, farita per la inko de fosilio, kiu pereis antaŭ milionoj da jaroj. Mi estis forĵetonta ĝin, sed mi memoris, ke ĝi estas flamagebla kaj brulas kun bona brila flamo — estas, fakte, bonega kandelo — kaj mi metis ĝin en mian poŝon. Mi trovis nian eksplodaĵon, nek ian rimedon por krevigi la bronzajn pordojn. Ĝis nun mia fera stango estis la plej utila objekto, kiun mi trovis. Tamen, mi forlasis tiun galerion tre kontenta.

"Mi ne povas rakonti al vi ĉion pri tiu longa posttagmezo. Estus al mi tre malfacile rememori miajn esplorojn en la ĝusta ordo. Mi memoras longan galerion de rustiĝintaj teniloj por armiloj, kaj kiel mi hezitis inter mia stango kaj hakilo aŭ glavo. Mi tamen ne povis porti ambaŭ, kaj mia fera stango

estis la plej promesplena kontraŭ la bronzaj pordoj. Estis multaj pafiloj, pistoloj kaj karabenoj. La plej multaj konsistis el amasoj da rusto, sed kelkaj estis el ĉi nova metalo kaj ankoraŭ en iom bona stato. Sed jam polviĝis ĉiom de la kartoĉoj kaj pulvo, kiuj eble iam estis tie. Unu angulo, kiun mi vidis, estis bruligita kaj frakasita; eble de ia eksplodo inter la specimenoj. En alia loko estis vasta amaso da idoloj — polineziaj, meksikaj, grekaj, fenicaj — el ĉiu lando de la mondo, mi kredas. Kaj tie ĉi, cedante al subita impulso, mi skribis mian nomon sur la nazon de sapŝtona monstro el Sud-Ameriko, kiu aparte ekkaptis mian atenton.

”Dum la vespero malfruiĝis, mia intereso velkis. Mi iris tra galerio post galerio, polvaj, silentaj, ofte ruinaĵoj; la specimenoj foje estis nuraj amasoj da rusto kaj lignito, foje pli freŝaj. En iu loko mi subite troviĝis apud modelo de stanminejo, kaj tiam, nur hazarde, mi trovis en hermetika kesto du dinamitajn kartoĉojn! Mi kriis ‘Bonege’, kaj frakasis la keston kun ĝojo. Tiam venis dubo. Mi hezitis. Tiam, elektinte flankan galerieton, mi faris mian provon. Mi neniam sentis tian ĉagrenon, kian mi spertis dum mi atendis kvin, dek, dek kvin minutojn eksplodon, kiu neniam okazis. Kompreneble, la kartoĉoj estis falsaj, kion mi devus esti diveninta pro ilia ekzisto. Mi ja kredas, ke se ili ne estus tiaj, mi estus tuj forkurinta por eksplodigi ĉiujn kune en neekziston — sfinkson, bronzajn pordojn, kaj (kiel pruvigis) miajn ŝancojn trovi la tempo-maŝinon.

”Kredeble estis post tio, kiam ni venis al nefermita korteto interne de la palaco. Ĝi havis herbaĵon kaj tri fruktarbojn. Ni do ripozis kaj refreŝigis nin. Ĉirkaŭ la sunsubiro mi komencis konsideri nian situacion. La nokto alrampis kaj mia

neatingebla kaŝejo estis ankoraŭ netrovita. Sed tio malmulte ĝenis min nun. Mi havis ĉe mi objekton, kiu estis eble la plej bona el ĉiuj defendiloj kontraŭ la morlokoj — mi havis miajn alumetojn! Plue, mi havis en mia poŝo la kamforon, se flamego estus necesa. Ŝajnis al mi, ke nia plej bona ago estus pasigi la nokton ekstere, protektitaj de fajro. En la mateno mi provos havigi la tempo-maŝinon. Helpe al tio, mi ĝis nun havis nur mian feran sceptron. Sed nun, pro mia kreskanta scio, mi konsideris tute alimaniere tiujn bronzajn pordojn. Ĝis tiam mi ne provis perforti ilin, plejparte pro la mistero ĉe la alia flanko. Ili neniam impresis min kiel tre fortaj, kaj mi esperis trovi mian feran stangon ne tute maltaŭga por la tasko.

Ĉapitro IX

Ni eliris el la palaco kiam la suno ankoraŭ estis parte super la horizonto. Mi intencis atingi la blankan sfinkson frue la postan matenon, kaj mi havis la intencon antaŭ noktigo tramarŝi la arbaron, kiu haltigis min je la antaŭa vojaĝo. Mia projekto estis iri kiel eble plej malproksimen tiun nokton, kaj tiam, farinte fajron, dormi sub la protekto de ties brilado. Sekve, dum mi iris, mi kolektis iujn branĉetojn aŭ sekajn herbojn, kiujn mi vidis, kaj baldaŭ miaj brakoj estis plenaj de tia diversaĵo. Ĉar mi estis tiom ŝarĝita, nia progreso estis pli malrapida ol mi atendis, kaj krome Uina estis laca. Kaj ankaŭ mi komencis suferi pro dormemo; tial estis plena nokto antaŭ ol ni atingis la arbaron. Sur la arbusthava monteto ĉe ties bordo, Uina estus haltinta pro timo pri la mallumo antaŭ ni; sed kurioza sento de alproksimiĝanta katastrofo, kio efektive devus servi kiel averto, plupelis min. Mi ne estis dorminta dum unu nokto kaj du tagoj, kaj mi estis febra kaj malpacienca. Mi sentis dormemon superregi min, kaj mi sentis ankaŭ, ke la morlokoj akompanas ĝin.

”Dum ni hezitis, inter la nigraj arbustoj malantaŭ ni, kaj malhelajn kontraŭ ties nigreco, mi vidis tri kaŭrantajn figurojn. Ĉirkaŭ ni estis arbetoj kaj longaj herboj, kaj mi ne sentis min sekura kontraŭ ilia insida alproksimiĝo. La arbaro, mi taksis, estis proksimume unu kilometron larĝa. Se ni povus trairi ĝin al la nuda monteto, tie, ŝajnis al mi, estos multe pli

nedanĝera ripozejo; mi pensis, ke per miaj alumetoj kaj mia kamforo mi povos sukcese lumigi mian vojon tra la arbaro. Tamen, estis evidente, ke se mi svingos alumetojn per miaj manoj, mi devos forlasi mian brulolignon; tial, iom malvolonte, mi demetis ĝin. Kaj tiam venis en mian menson la ideo, ke mi bruligu ĝin por surprizi niajn amikojn malantaŭe. Mi poste eltrovis la teruran malsaĝon de tiu ago, sed ĝi venis en mian menson kiel genia ideo por protekti nian forkuron.

”Mi ne scias, ĉu vi iam pensis, kia maloftaĵo devas esti flamo en la malesto de la homo kaj en modera klimato. La varmo de la suno neofte estas sufiĉe forta por bruligi, eĉ kiam ĝi estas fokusita de rosgutoj, kiel foje okazas en pli tropikaj lokoj. Fulmo povas krevigi kaj nigrigi, sed ĝi malofte rezultas en ampleksa fajro. Putra vegetaĵo foje povas bruleti pro la varmo de sia fermentado, sed tio malofte kaŭzas flamon. En tiu degenera mondo, plue, la arto de fajrofarado estis forgesita. La ruĝaj langoj, kiuj eklekis mian amason da ligno estis tute nova kaj stranga afero al Uina.

”Ŝi volis alkuri kaj ludi per ĝi. Mi kredas, ke ŝi estus ĵetininta sin en ĝin, se mi ne estus deteninta ŝin. Sed mi ekprenis ŝin kaj malgraŭ ŝia baraktado, mi kvazaŭ ĵetis min sentime en la arbaron antaŭ mi. Dum iom da tempo la brilo de mia fajro lumigis la vojeton. Rerigardante, baldaŭ mi povis vidi tra la amaso da trunkoj, ke de mia lignaĵo la brulego jam etendis sin al kelkaj apudaj arbustoj, kaj ke kurbita strio de fajro suprengrimpas la herbaĵon sur la monteto. Mi ridis pri tio kaj returnis min al la mallumaj arboj antaŭ mi. Estis tre nigre kaj Uina kroĉis sin al mi konvulsie, sed ankoraŭ estis — kiam miaj okuloj kutimiĝis al la mallumo — sufiĉe da lumo por ke mi evitu la trunkojn. Supre estis tute nigre, escepte de kie en diver-

saj lokoj truo de malproksima blua ĉielo brilis sur nin. Mi skrapis neniom da alumetoj, ĉar mi ne havis liberan manon. Sur mia maldekstra brako mi portis mian etulinon kaj en mia dekstra mano mi havis mian feran stangon.

”Dum iom da tempo mi aŭdis nenion krom la kraketantaj trunketoj sub miaj piedoj, la eta susuro de la vento supre, kaj mia spirado kaj la batado de la vejnoj en miaj oreloj. Tiam mi ŝajnis konstati frapetadon ĉirkaŭ mi. Firme mi iris plu. La frapetado fariĝis pli klara, kaj tiam mi ekaŭdis la samajn strangajn sonojn kaj voĉojn, kiujn mi aŭdis en la subtero. Evidente estas multaj morlokoj kaj ili ĉirkaŭas min. Efektive, post plia minuto mi sentis ektiron ĉe mia jako, tiam ion ĉe mia brako. Kaj Uina tremegis kaj fariĝis tute senmova.

”Estis la tempo por alumeto. Sed por havigi iun mi devos demeti ŝin. Tion mi faris, kaj dum mi palpserĉis en mia poŝo, komenciĝis en la mallumo luktado ĉe miaj genuoj. Ŝi estis tute silenta, kaj aŭdiĝis la sama kverado de la morlokoj. Plue, molaj manetoj pripalpis miajn jakon kaj dorson, tuŝante ĉe mian kolon. Tiam la alumeto skrapiĝis kaj ekbrulis. Mi tenis ĝin flamanta kaj vidis la blankajn dorsojn de la morlokoj, kiuj forkuris inter la arboj. Rapide mi prenis de mia poŝo pecon da kamforo kaj estis preta bruligi ĝin tuj kiam ekvelkos la flameto. Tiam mi rigardis Uinan. Ŝi kuŝis tenante miajn piedojn kaj tute senmove, kun la vizaĝo sur la tero. Kun subita timo mi kliniĝis al ŝi. Ŝi ŝajnis apenaŭ spiri. Mi bruligis la kamforon kaj ĵetis ĝin sur la teron, kaj dum ĝi rompiĝis kaj flamegis kaj forpelis la morlokojn kaj la ombrojn, mi surgeniĝis kaj levis ŝin. La arbaro malantaŭe ŝajnis plena de la moviĝo kaj murmurado de granda popolamaso.

”Ŝajne ŝi svenis. Zorge mi metis ŝin sur mian ŝultron kaj

leviĝis por daŭrigi la marŝadon, kaj tiam venis terura konstato. Prizorgante miajn alumetojn kaj Uinan, mi turnis min plurfoje, kaj nun tute ne sciis en kiu direkto troviĝas mia vojo. Neniel mi povis scii eĉ ĉu mi turnis min denove al la Palaco el verda porcelano. Mi trovis min en terura konsterniĝo. Mi rapide devis pripensi, kion fari. Mi decidis fari fajron kaj bivaki sur la loko kie ni estas. Mi metis Uinan, ankoraŭ senmovan, sur herbokovritan trunkon, kaj tre rapide, kiam mia unua peco da kamforo perdadis sian brilon, mi komencis kolekti trunketojn kaj foliojn. Diversloke, en la mallumo ĉirkaŭ mi, la okuloj de la morlokoj brilis kiel karbunkoloj.

”La kamforo flametis kaj estingiĝis. Mi bruligis alumeton, kaj samtempe du blankaj figuroj, kiuj alproksimigis al Uina, forrapidegis. Unu estis tiom blindigita de la lumo, ke li kuris rekte al mi, kaj mi sentis la grinciĝon de liaj ostoj sub mia pugnobato. Li ekkriis konsternite, iom ŝanceligis, kaj falis. Mi ĵetis plian pecon da kamforo kaj daŭrigis la faradon de mia fajro. Baldaŭ mi rimarkis, kiom seka estas parto de la foliaro super mi, ĉar falis neniom da pluvo de post mia alveno sur la tempo-maŝino antaŭ unu semajno. Pro tio, anstataŭ serĉi falintajn trunketojn inter la arboj, mi komencis salti kaj altiri branĉojn. Tre baldaŭ mi havis sufokan, fumantan fajron el verda ligno kaj sekaj branĉetoj, kaj povis ŝpare uzi mian kamforon. Tiam mi turniĝis tien kie kuŝas Uina ĉe mia fera sceptro. Mi laŭeble klopodis revivigi ŝin, sed ŝi kuŝis kiel mortinto. Mi eĉ ne povis konvinki min, ĉu aŭ ne ŝi spiras.

”Nun la fumo de la fajro bloviĝis al mi kaj ŝajne ĝi subite lacigis min. Plue, la vaporo de kamforo estis en la aero. Mia fajro ne bezonos renovigon dum unu-du horoj. Mi sentis min tre laca post mia streĉado, kaj mi sidiĝis. La arbaro, ankaŭ,

estis plena de dormeca murmurado, kiun mi ne komprenis. Mi ŝajne nur skuis la kapon kaj fermis miajn okulojn. Sed ĉie estis mallume, kaj la morlokoj havis siajn manojn sur mi. Forskuante iliajn manojn, mi rapide serĉis en mia poŝo la alume-tujon, kaj — ĝi estis malaperinta! Tiam ili denove tenis kaj atakis min. Post momento mi sciis, kio okazis. Mi estis dorminta kaj mia fajro estingiĝis, kaj kaptis mian animon la amareco de morto. La arbaro ŝajnis plena de laodoro de brulanta ligno. Ili tenis min ĉe la kolo, ĉe la hararo, ĉe la brakoj, kaj mi falis. Estis nedireble terure en la mallumo senti tiun amason da molaj estaĵoj sur mi. Mi sentis kvazaŭ mi estus en monstra araneaĵo. Mi estis venkita kaj refalis teren. Mi sentis dentetojn pinĉi mian kolon. Mi ruliĝis sur la tero, kaj samtempe mia mano tuŝis mian feran stangon. Tio refortigis min. Mi barakte leviĝis, skuegis for de mi la homajn ratojn, kaj, tenante la stangon tiel ke ĝi estu mallonga, mi ŝovis ĝin tien, kie mi opiniis esti iliaj vizaĝoj. Mi povis senti la molan cedon de karno kaj ostoj sub miaj batoj, kaj dum momento mi estis libera.

”Trafis min la stranga ekstazo, kiu ofte ŝajnas akompani bataladon. Mi sciis, ke kaj mi kaj Uina estas perditaj, sed mi intencis ke la morlokoj pagu por sia viando. Mi staris kun mia dorso ĉe arbo, svingante la feran stangon antaŭ mi. La tuta arbaro estis plena de iliaj moviĝado kaj krioj. Pasis minuto. Iliaj voĉoj ŝajnis leviĝi al pli granda ekscitiĝo kaj ili moviĝis pli rapide. Tamen, neniu venis al mi. Mi staris fikse rigardante la mallumon. Tiam subite venis espero. Supozu, ke la morlokoj timas? Kaj tuj poste okazis strangaĵo. La mallumo ŝajnis heliĝi. Tre malklare mi komencis vidi la morlokojn ĉirkaŭ mi — tri vunditajn ĉe miaj piedoj — kaj tiam mi konstatis, kun ne-

kredema surprizo. ke la aliaj kuradas en senfina fluo, ŝajne de malantaŭ mi, kaj for en la arbaron antaŭe. Kaj iliaj dorsoj ne plu aspektis blankaj sed helruĝaj. Starante tie surprizite, mi vidis etan ruĝan fajron trans truo de stelolumo inter la branĉoj, kaj tiam ĝi malaperis. Kaj je tio mi komprenis la odoron de brulanta ligno, la dormecan murmuradon, kiu nun fariĝis blovega muĝo, la ruĝan brilon, kaj la forkuron de la morlokoj.

”Elpaŝante de malantaŭ mia arbo, mi rerigardis kaj vidis tra la nigraj kolonoj de la plej proksimaj arboj, la flamojn de la brulanta arbaro. Mia unua fajro alkuras min! Je tio mi serĉis Uinan, sed ŝi estis for. La siblado kaj krakado malantaŭ mi, la eksploda bruoj kiam ĉiu arbo ekflamis, lasis malmulte da tempo por pensoj. Ankoraŭ tenante mian feran stangon, mi sekvis la vojon de la morlokoj. La flamoj minacegis min, unu fojon ili antaŭenrampis tiel rapide ĉe mia dekstra flanko dum mi kuris, ke mi devis ektorni min maldekstren. Sed fine mi eliris sur malgrandan liberan spacon, kaj samtempe iu morloko ŝancele alkuris kaj preterpasis min rekte en la fajron!

”Kaj nun mi vidis la plej strangan kaj teruran aferon, kredible, el ĉio, kion mi vidis en tiu estonta epoko. Tiu ĉi tuta spaco estis tiel brila kiel la tago, pro la reflekto de la fajro. En la mezo estis monteto aŭ tomo-supraĵo, sur kiu staris iom bruligita kratago. Preter tio estis alia parto de la brulanta arbaro, de kiu jam serpentumis flavaj langoj, kiuj tute ĉirkaŭis la spacon per palisado el fajro. Sur la monteto estis trideko da morlokoj, blindaj pro la lumo kaj varmo, kaj ŝanceliĝantaj en sia surprizego tien kaj reen, iuj kontraŭ la aliajn. Komence mi ne konstatis ilian blindecon kaj furioze batante ilin per mia stango, pro freneza timo, kiam ili alproksimiĝis, mi mortigis

unu kaj kripligis multajn aliajn. Sed kiam mi estis rigardinta la gestojn de iu el ili, kiu palpis sub la kratago kontraŭ la ruĝa ĉielo, kaj estis aŭdinta iliajn ĝemojn, mi certiĝis pri iliaj absolutaj senpovo kaj mizero en la brilego, kaj mi ne plu batis ilin.

”Tamen, foje iu kuris rekte al mi, kaŭzante tremigan teruron, kiu igis min rapide eviti lin. Iam la flamoj iom malkreskis kaj mi timis, ke la fibestoj baldaŭ povos vidi min. Mi eĉ pensis komenci la batalon kaj mortigi iujn el ili antaŭ ol tio okazos; sed la fajro denove ekbrulegis kaj mi ne movis mian manon. Mi marŝis sur la monteto inter ili kaj evitis ilin, serĉante ian signon de Uina. Sed Uina malaperis.

”Fine mi sidiĝis sur la montsupron kaj rigardis tiun ĉi strangan nekredetlan aron da blinduloj, kiuj palpe iris tien kaj reen, kaj aŭdigis nenaturajn sonojn inter si dum la ruĝa lumo de la fajro brilegis sur ilin. La serpentuma kolono de fumo transŝvebis la ĉielon kaj tra la malmultaj ŝirtruoj en tiu ruĝa kovraĵo brilis la steletoj malproksimaj, kvazaŭ ili apartenus al alia universo. Du aŭ tri morlokoj ŝanceliĝis rekte al mi, kaj tremante mi forŝovis ilin per pugnobatoj.

”Dum la plej granda parto de tiu nokto mi kredis ĝin inkubo. Mi mordis min kaj kriegis pro pasia deziro vekigi. Mi batis la teron per miaj manoj, kaj stariĝis, kaj residiĝis, kaj vagis tien kaj reen, kaj denove sidiĝis. Tiam mi foje frotis miajn okulojn kaj alvokis Dion, ke Li lasu min vekigi. Trifoje mi vidis morlokojn agonie klini la kapon kaj kuregi en la flamojn. Sed fine, super la malkreskanta ruĝo de la fajro, super la ŝvebantaj amasoj da nigra fumo, la blankiĝantaj kaj nigriĝantaj arbostumpoj, kaj la malpliĝantaj nombroj de tiuj ĉi neklaraj estaĵoj, — venis la blanka lumo de la tago.

”Denove mi serĉis signojn de Uina, sed trovis neniajn. Estis

evidente, ke ili lasis ŝian kompatindan korpeton en la arbaro. Mi ne povas klarigi al vi, kiel mi trankviliĝis, pro la penso, ke ŝi evitis la teruran sorton al kiu ŝi ŝajnis destinita. Pensante tion, mi preskaŭ decidis komenci buĉadon de la senpovaj abomenuloj ĉirkaŭ mi, sed mi bridis min. La monteto, mi jam diris, estis kvazaŭ insulo en la arbaro. De sur ĝia supro mi nun povis vidi tra fumnebuleto la Palacon el verda porcelano, kaj pro tio mi povis taksi la direkton de la blanka sfinkso. Kaj tiam mi forlasis la restaĵon de tiuj malbenitaj animoj, kiuj ankoraŭ iris tien kaj reen kaj ĝemis dum la tago pliheliĝis. Mi ligis iom da herbaĵo ĉirkaŭ miajn piedojn kaj lame marŝis trans fumantajn cindrojn kaj inter nigrajn trunketojn, kiuj ankoraŭ interne pulsas pro fajro, en la direkto al la kaŝejo de la tempo-maŝino. Mi marŝis malrapide, ĉar mi estis ne nur lama, sed ankaŭ preskaŭ ellacigita, kaj mi sentis grandegan mizeron pro la terura morto de eta Uina. Ĝi ŝajnis katastrofego. Nun, en tiu ĉi malnova bone konata ĉambro ĝi pli similas la malĝojon de sonĝo, ol efektivan perdon. Sed tiun matenon ĝi lasis min absolute sola denove — terure soleca. Mi komencis pensi pri tiu ĉi domo mia, pri tiu ĉi kameno, pri kelkaj el vi, kaj kun tiaj pensoj venis sopiro kiu estis doloro.

”Sed dum mi surmarŝis la fumantajn cindrojn sub la brila matena ĉielo, mi eltrovis ion. En mia pantalona poŝo ankoraŭ estis kelkaj apartaj alumetoj. Ŝajne la skatoleto tralasis ilin antaŭ sia perdiĝo.

Ĉapitro X

Proksimume je la oka aŭ naŭa matene mi atingis la saman benkon el flava metalo, de kiu mi ekrigardis la mondon je la vespero de mia alveno. Mi pripensis miajn rapidajn konkludojn je tiu vespero, kaj ne povis ne ridi amare pri mia certeco. Jen la sama bela vidaĵo, la sama abunda foliaro, la samaj belegaj palacoj kaj grandiozaj ruinoj, la sama arĝenta rivero, kiu fluas inter siaj floriĉaj bordoj. La gajaj roboj de la bela popolo moviĝis tien kaj reen inter la arboj. Kelkaj banis sin ĉe precize la sama loko, kie mi antaŭe savis Uinan, kaj tio ĉi donis al mi akran dolorpikon. Kaj kiel makuloj sur la pejzaĝo leviĝis la kupoloj super la vojoj al la subtera mondo. Mi nun komprenis, kion kovris la belaĵoj de la surteruloj. Tre agraba estis ilia tago, tiel agraba, kiel la tago de la brutoj en la kampoj. Kiel la brutoj ili konis neniam malamikojn, kaj provizis sin kontraŭ neniam bezonoj. Kaj ilia finiĝo estis la sama.

”Mi ĉagreniĝis pensante kiel mallonga estis la sonĝo pri la homa intelekto. Ĝi mortigis sin. Ĝi dediĉis sin al la atingo de komforto kaj facilo. Ĝi estis balancita socio, kun sekuro kaj daŭro kiel signalvortoj, kaj ĝi atingis siajn esperojn — por finfine alveni al tiu ĉi stato. Devas esti, ke iam la vivo kaj posedaĵoj atingis preskaŭan sekuron. La riĉulo estis certa pri siaj monhavo kaj komforto, la laboristo certa pri siaj vivo kaj laboro. Sendube, en tiu perfekta mondo estis nenia senlaborula

problemo, nenia nesolvita socia demando. Kaj granda kvieto sekvis.

”Estas natura leĝo, kiun ni ne rimarkas, ke intelekta vario estas la kompenso por ŝanĝiĝo, danĝero, kaj ĝeno. Besto en perfekta harmonio kun sia ĉirkaŭaĵo estas perfekta mekanismo. La naturo neniam postulas inteligenton ĝis kutimo kaj instinkto estas ne plu utilaj. Ne ekzistas inteligento, kie ne estas ŝanĝiĝo, aŭ la bezono ŝanĝiĝi. Posedas inteligenton nur tiuj bestoj, kiuj devas renkonti grandegan varion de bezonoj kaj danĝeroj.

”Laŭ mi, do, la surtera homo glitetadis al sia malforta beleco, kaj la subteruloj al nura mekanika industrio. Sed tiu perfekta stato malhavis unu aferon, kiu eĉ estas necesa por mekanika perfekteco — absolutan daŭron. Evidente, post longa periodo, la nutrado de la morlokoj, kiel ajn ĝi estis farata, misfunkciis. La neceso, kiu estis fortenita dum kelkmonatoj da jaroj, revenis, kaj ĝi komenciĝis subtere. La subteruloj estis en kontakto kun maŝinoj, kiuj, eĉ se perfektaj, ankoraŭ bezonas iom da pensado aparte de kutimiĝo, kaj tial ili retenis iom pli da iniciativo ol la superuloj. Kaj kiam mankis al ili alispeca viando, ili turnis sin al tio, kion ĝis tiam antikva kutimo malpermesis. Tio, do, estis mia opinio dum mia lasta vido al la mondo en la jaro okcent dumil sepcent unu. Povas esti, ke ĝi estas tiel malĝusta klarigo, kiel la homa menso povas inventi. Almenaŭ, tia la afero aspektis al mi, kaj tia mi diras ĝin al vi.

”Post la laciĝoj, ekscitiĝoj kaj teruraĵoj de la pasintaj tagoj, kaj malgraŭ mia malĝojo, tiu ĉi benko kaj la trankvila vidaĵo kaj la varma sunlumo estis tre agrablaj. Mi estis tre laca kaj dormema kaj baldaŭ mia teoriado ŝanĝiĝis en dormeton.

Konstatinte tion, mi sekvis mian propran averton, sternis min sur la herbaĵon, kaj ĝuis longan kaj refreŝigan dormon.

”Mi vekigis iomete antaŭ la sunsubiro. Mi nun sentis min sekura kontraŭ la danĝero, ke la morlokoj trovu min dormanta, kaj streĉinte miajn membrojn, mi malsupreniris al la blanka sfinkso. Mi havis en unu mano mian stangon kaj la alia mano ludis per la alumetoj en mia poŝo.

”Kaj nun okazis la plej neatendita afero. Alproksimiĝante la piedestalon de la sfinkso, mi trovis la bronzajn pordojn malfermitaj. Ili subglitis en fendetojn.

”Je tio mi ekhaltis antaŭ ili, kaj hezitis eniri.

”Interne estis malgranda fako, kaj sur podio en la angulo de tio staris la tempo-maŝino. Mi havis en mia poŝo la malgrandajn stangetojn. Jen, do, post miaj komplikitaj pretiĝoj por la sieĝo de la blanka sfinkso, okazas milda kapitulacio. Mi forĵetis mian feran stangon kaj mi preskaŭ malĝojis pro tio, ke mi ne devas uzi ĝin.

”Subita penso venis en mian menson, kiam mi kliniĝis al la enirejo. Unu fojon, almenaŭ, mi komprenis la pensmanieron de la morlokoj. Venkante fortan emon ridi, mi trapaŝis la bronzan kadron kaj aliris la tempo-maŝinon. Mi trovis kun surprizo, ke ĝi estas zorge oleita kaj purigita. Mi poste suspektis, ke la morlokoj eĉ parte malmuntis ĝin, kaj klopodis laŭ sia malforta maniero, kompreni ĝian celon.

”Dum mi staris tie kaj ekzamenis ĝin, ĝojante pro la nura tuŝo al la aparato, ekokazis tio, kion mi atendis. La bronzaj paneloj subite suprenglitis kaj sonore frapis la kadron. Mi estis en la mallumo — kaptita. Tion pensis la morlokoj. Pro tio mi gaje ridis.

”Mi povis jam aŭdi ilian murmuron ridadon dum ili venis

al mi. Tre trankvile mi provis flamigi la alumeton. Mi devos nur alfiksi la stangetojn kaj tiam foriris kiel fantomo. Sed mi forgesis unu afereton. La alumetoj estis el tiu abomeninda speco, kiu ekbrulas nur per skrapo sur la skatoleto.

”Vi povas imagi kiel malaperis mia trankvilo! La fiuletoj estis tute apud mi. Iu tuŝis min. Mi svingbatis ilin en la mallumo per la stangetoj, kaj komencis ŝovi min sur la selon de la maŝino. Tiam venis unu mano sur min, kaj poste alia. Mi devis tiam batalegi kontraŭ iliajn fingrojn por ne perdi miajn stangetojn, kaj samtempe mi devis palpserĉi la elstaraĵojn sur kiujn fiksiĝas la iletoj. Unufoje, efektive, ili preskaŭ sukcesis forpreni iun de mi. Dum ĝi glitis el mia mano, mi devis ŝovi en la mallumo per mia kapo — mi povis aŭdi sonori la kranion de la morloko — por rehavi ĝin. Tiu ĉi lasta luktado estis pli danĝera, mi opinias, ol la batalo en la arbaro.

”Sed fine la stangeto estis fiksita kaj mi tiris ĝin. La tenantaj manoj forglitis de mi. La mallumo baldaŭ falis de antaŭ miaj okuloj. Mi trovis min en la samaj griza lumo kaj tumulto, kiujn mi jam priparolis.

Ĉapitro XI

Mi jam diris al vi pri la naŭzo kaj konfuzo kiuj akompanas tempo-veturadon. Kaj tiun ĉi fojon mi ne sidis ĝuste sur la selo, sed flanke kaj laŭ nefirma maniero. Dum nekonata periodo mi tenegis la maŝinon dum ĝi skuiĝis kaj vibris, tute malatenta kiel mi iris, kaj kiam mi instigis min reirigardi la ciferplatojn, mi trovis kun mirego, kie mi alvenis. Unu plato registras tagojn, alia milojn da tagoj, alia milionojn da tagoj, kaj alia milojn da milionoj. Nu, anstataŭ antaŭenŝovi la funkciigilon, mi estis altirinta ĝin tiel, ke mi antaŭeniru, kaj kiam mi rigardis tiujn ĉi ciferplatojn mi trovis la miloindikilon rondiranta tiel rapide, kiel la sekundoindikilo de horloĝo — en la estonton.

”Dum mia pluiro, kurioza ŝanĝiĝo superrampis ĉion. La pulsanta grizo fariĝis pli malhela; tiam — kvankam mi ankoraŭ veturegis mirige rapide — la ekbrila sinsekvo de tago kaj nokto, kiu kutime indikis malrapidiĝon, revenis kaj fariĝis pli kaj pli rimarkebla. Tio komence tre mirigis min. La alternoj de nokto kaj tago fariĝis ĉiam pli malrapidaj, kiel ankaŭ la moviĝo de la suno trans la ĉielon, ĝis ili ŝajnis daŭri jarcentojn. Fine, konstanta krepusko superpendis la teron, krepusko rompita nur foje, kiam kometo transbrilegis la malhelan ĉielon. La strio de lumo kiu indikis la sunon, malaperis antaŭ longe; ĉar la suno ĉesis subiri, ĝi nur moviĝis supren kaj malsupren en la okcidento kaj fariĝis ĉiam pli larĝa kaj ruĝa. Ĉia

signo de la luno jam malaperis. La rondirado de la steloj fariĝis pli kaj pli malrapida kaj ili jam ŝanĝiĝis al rampantaj lumopunktoj. Fine, iom da tempo antaŭ mia halto, la suno, ruĝa kaj tre granda, staris senmove sur la horizonto, kiel vasta kupolo, kiu ardetis kun obtuza varmo, kaj foje suferis momentan estingiĝon. Unu fojon dum iom da tempo ĝi reardis pli brile, sed rapide ĝi refariĝis obtuze ruĝa. Mi rimarkis el tiu ĉi malrapidiĝo en ĝiaj leviĝo kaj subiro, ke la tasko de la tajda tirado estas finita. La tero staris kun unu flanko al la suno tiel same kiel en nia epoko la luno rigardas al la tero. Tre zorge, ĉar mi memoris mian antaŭan falegon, mi komencis inversigi mian direkton. Pli kaj pli malrapide moviĝis la rondirantaj indikiloj, ĝis la milo-indikilo ŝajnis senmova, kaj tio por la tagoj ne plu estis nura nebuleto sur sia skalo. Ankoraŭ pli malrapide, ĝis videbliĝis la neklara konturo de soleca marbordo.

”Mi haltis tre glate kaj restis sur la tempo-maŝino ĉirkaŭrigardante. La ĉielo ne plu estis blua. Nordoriente ĝi estis tute nigra, kaj el la mallumo brilis hele kaj konstante la palaj blankaj steloj. Supre ĝi estis ruĝa kaj senstela, kaj sudoriente ĝi pli heliĝis al arda skarlato, kie, tranĉite de la horizonto, kuŝis la korpego de la suno, ruĝa kaj senmova. La rokoj ĉirkaŭ mi havis krudan ruĝecan koloron, kaj la sola signo de vivo, kiun mi komence povis vidi, estis la intense verda vegetaĵo, kiu kovris ĉiun elstaraĵon sur ilia sudorienta flanko. Ĝi estis la sama riĉa verdo, kiun oni vidas sur arbara musko aŭ sur la likeno en kavernoj: plantoj, kiuj simile al tiuj ĉi, kreskas en ĉiama krepusko.

”La maŝino staris sur dekliva marbordo. La maro etendiĝis sudokcidenten kaj leviĝis al akra brila horizonto kontraŭ la

pala ĉielo. Estis neniam ondoj, ĉar la vento neniam eĉ blovetis. Nur oleeca movetado leviĝis kaj malleviĝis kiel kvieta spirado, kaj montris, ke la eterna maro ankoraŭ moviĝas kaj vivas. Kaj laŭ la bordo, kie kelkfoje frapis la akvo, estis dika krusto de salo — helruĝa sub la mortpala ĉielo. En mia kapo estis sento de premo, kaj mi rimarkis, ke mi spiras tre rapide. La sento memorigis min pri mia sola sperto de montgrimrado, kaj pro tio mi supozis la aeron pli maldensa ol ĝi estas nun.

”Malproksime sur la soleca deklivo mi aŭdis raŭkan krion kaj vidis ion similan al giganta blanka papilio flirti en la ĉielon kaj malaperi preter iuj malaltaj montetoj. La sono de ĝia voĉo estis tiel mizera, ke mi tremetis kaj sidis pli firme sur la maŝino. Ree ĉirkaŭrigardante, mi vidis, ke tute proksime moviĝas en mia direkto io, kion mi opiniis amaso da roko. Tiam mi vidis, ke ĝi vere estas monstra krabosimila estaĵo. Ĉu vi povas imagi krabon tiel grandan, kiel tiu tablo? Ĝiaj multaj kruroj moviĝis malrapide kaj malcerte, ĝiaj ungegoj svingiĝis, ĝiaj longaj atenoj similaj al la vipo de veturigisto flirtiĝis kaj palpis, kaj ĝiaj trunkhavaj okuloj brilis ĉe ambaŭ flankoj de ĝia metaleca antaŭaĵo. Ĝia dorso estis ondigita kaj ornamita per malbelaj tuberoj, kaj verda inkrustaĵo makulis ĝin diversloke. Mi povis vidi la multajn palpilojn de ĝia komplikita buŝo tremeti kaj palpi dum ĝia moviĝo.

”Fikse rigardante tiun ĉi malagrablan aperiaĵon, kiu rampis al mi, mi sentis tiklon ĉe mia vango, kvazaŭ muŝo ektuŝis min tie. Mi provis forpuŝi ĝin per mia mano, sed post momento ĝi revenis, kaj preskaŭ tuj venis alia ĉe mia orelo. Mi frapis ĝin kaj kaptis ian fadenon. Ĝi glitis rapide el mia mano. Kun terura naŭzo mi turniĝis kaj vidis, ke mi tenis la antenon de alia

monstra krabo kiu staras tuj malantaŭe. Ĝiaj insidaj okuloj tordiĝis sur la trunketoj, ĝia buŝo estis viglaĉa pro apetito, kaj ĝiaj malgraciaj ungegoj, ŝmiritaj de alga ŝlimo, estis falantaj sur min. Post momento mia mano estis sur la funkciigilo, kaj mi metis unu monaton inter mi kaj tiuj ĉi monstroj. Sed ankoraŭ mi estis sur la sama marbordo, kaj mi nun vidis ilin klare tuj kiam mi haltis. Ŝajne dekoj da ili rampas tien kaj reen en la malhela lumo, inter la foliigitaj tavoloj de intensa verde.

”Mi ne povas komprenigi al vi la senton de abomeninda soleco, kiu superpendis la mondon. La ruĝa orienta ĉielo, la norda nigro, la sala morta maro, la ŝtona bordo kovrita de tiuj ĉi malrapidaj fimonstroj, la sennuanca venenaspekta verde de la likenaj plantoj, la maldensa aero, kiu dolorigis la pulmojn; ĉio kunhelpis al teruriga efekto. Mi pluiris cent jarojn, kaj jen la sama ruĝa suno — iomete pli granda, iomete pli malhela — la sama mortanta maro, la sama frosta aero kaj la sama aro da teraj kraboj, kiuj rampas inter la verda musko kaj la ruĝaj rokoj. Kaj en la okcidenta ĉielo mi vidis kurban palan linion, similan al vasta novluno.

”Tiel mi veturis, intermite haltante, en miljaraj paŝegoj, allogite de la mistero de la tera sorto. Mi rigardis, kun stranga intereso, la sunon kreskantan pli granda kaj malhela en la okcidento, kaj la forpasantan vivon de la malnova tero. Finfine, pli ol tridek milionojn da jaroj post nun, la grandega ruĝvarma kupolo de la suno jam kovris preskaŭ dekonon de la malluma ĉielo. Tiam, plian fojon mi haltis, ĉar la rampanta arego da kraboj malaperis, kaj la ruĝa marbordo, escepte de la plumbece verdaj algoj kaj likenoj, aspektis senviva. Kaj nun ĝi estis blanke makulata. Akra malvarmo pikis min. Blankaj

neĝeroj faletis kirle kaj maldense. Nordoriente la brilo de neĝo kuŝis sub la stelolumo de la nigreta ĉielo, kaj mi povis vidi ondforman montetaron, helruĝe blankan. Laŭ la mara bordo troviĝis franĝoj de glacio, kun flosantaj amasoj pli malproksime sur la maro; sed la ĉefa etendaĵo de tiu sala oceano, tute sangeca pro la eterna subresto de la suno, estis ankoraŭ ne-glaciiĝinta.

”Mi ĉirkaŭrigardis, por trovi ĉu ankoraŭ restas iaj signoj de besta vivo. Ia nedifinebla antaŭtimo restigis min sur la selo de la maŝino. Sed mi vidis nenion moviĝi, aŭ surtere, aŭ en la ĉielo, aŭ en la maro. Nur la verda ŝlimo sur la rokoj atestis, ke vivo ankoraŭ ne tute malaperis. Malalta sablaĵo estis aperinta en la maro kaj la akvo estis refluinta de la bordo. Mi imagis vidi ian nigran objekton peze moviĝi sur tiu sablaĵo, sed ĝi fariĝis senmova dum mi rigardis ĝin, kaj mi supozis, ke miaj okuloj trompis min, kaj ke la nigra objekto estis nur roko. La steloj en la ĉielo estis treege brilaj kaj ŝajnis al mi tre malmulte ekflagri.

”Subite mi rimarkis, ke la ronda okcidenta konturo de la suno ŝanĝiĝis; ke konkavaĵo aperis en la kurbo. Mi vidis tion kreski pli granda. Dum eble unu minuto mi terurigite rigardis tiun nigrecon kiu superrampas la tagon, kaj tiam mi konstatis, ke komenciĝas eklipso, aŭ la luno, aŭ la planedo Merkurio transpasas la diskon, de la suno. Kompreneble, unue mi supozis, ke estas la luno, sed estas abunda atestaro por kredi al mi, ke vere tio, kion mi vidis, estis la transiro de interna planedo, kiu pasis tre proksime al la tero.

”Fariĝis ĉiam pli mallume; malvarma vento komencis freŝiĝante ekblovi de la oriento, kaj plimultiĝis la blankaj neĝeroj en la aero. De la mara rando venis plaŭdeto kaj flustreto.

Krom tiuj ĉi senvivaj sonoj, la mondo estis silenta. Silenta? Estus malfacile komprenigi al vi ĝian trankvilon. Ĉia homa bruoj, la blekado de ŝafoj, la krioj de birdoj, la zumeto de insektoj, la moviĝo kiu faras la fonon de nia vivo — ĉio ĉi finiĝis. Dum la mallumo plidensiĝis, la kirliĝantaj neĝeroj iĝis pli abundaj, dancante antaŭ miaj okuloj; kaj la malvarmo de la aero fariĝis pli intensa. Fine, unu post la alia, rapide, laŭvice, la blankaj suproj de la malproksimaj montetoj forpasis en la mallumon. La venteto, ŝanĝiĝis al ĝema vento. Mi vidis la nigran, mezan ombron de la eklipso fluganta al mi. Post momento estis videblaj nur la palaj steloj. Ĉio alia estis senradia mallumo. La ĉielo estis absolute nigra.

”Trafis min timego pri tiu ĉi ega mallumo. Senfortigis min la malvarmo, kiu penetris ĝis miaj ostoj, kaj la doloro, kiun mi sentis spirante. Mi tremis, kaj terura naŭzo atakis min. Tiam, simila al ardega ĉielarko, aperis la rando de la suno. Mi deiris de la maŝino por retrovi mian ekvilibron. Mi sentis min kapturiniĝema kaj nekapabla entrepreni la reveturon. Starante naŭzita kaj konfuzita, mi revidis la moviĝantan estaĵon sur la sablaĵo — estis nun nenia dubo ke ĝi moviĝas — kontraŭ la ruĝa akvo de la maro. Ĝi estis ronda, tiel granda, kiel piedpilko, aŭ eble pli granda, kaj preniloj etendiĝis de ĝi: ĝi ŝajnis nigra kontraŭ la ruliĝanta sangoruĝa akvo, kaj ĝi konvulsie saltetis tien kaj reen. Tiam mi sentis svenemon. Sed la timego kuŝi senpova en tiu malproksimega kaj terura krepusko helpis min elteni dum mi grimpis sur la selon.

Ĉapitro XII

Mi revenis, do. Devas esti, ke dum longa tempo mi estis senkonscia sur la maŝino. La ekbrila sinsekvo de la tagoj kaj noktoj rekomenciĝis, la suno fariĝis denove ora, la ĉielo blua. Mi spiris pli libere. La ŝanĝiĝantaj konturoj de la tero ondumadis. La indikiloj regrese rondiregis sur la skaloj. Fine mi revidis la malklaran ombrojn de domoj, la signojn de degenerinta homaro. Tiuj ankaŭ ŝanĝiĝis kaj pasis kaj aliaj venis. Baldaŭ, kiam la miliono-indikilo montris al nulo, mi malrapidigis min. Mi komencis rekoni nian propran trivialan arkitekturon, la milo-indikilo reiris al sia komenco, la nokto kaj tago alternis pli kaj pli malrapide. Tiam la malnovaj muroj de la laborejo ĉirkaŭis min. Tre glate, nun, mi haltigis la mekanismon. Mi vidis unu afereton, kiu ŝajnis stranga al mi. Mi kredas, ke mi diris al vi, ke kiam mi ekveturis, antaŭ ol mia rapido fariĝis tre granda, sinjorino Watchett marŝis trans la ĉambron, veturante, ŝajnis al mi, kiel raketo. Revenante, mi denove trapasis tiun minuton kiam ŝi marŝis trans la laborejon. Sed nun ĉiuj el ŝiaj agoj ŝajnis esti precize la inverso de la antaŭaj. La pordo ĉe la alia fino malfermiĝis, kaj ŝi glitiris kviete laŭlonge de la laborejo, kun la dorso antaŭe, kaj malaperis post la pordo tra kiu ŝi antaŭe eniris. Tuj antaŭ tio, mi momenton supozis vidi Hillyer, sed li fulmrapide preterpasis.

”Tiam mi haltigis la maŝinon, kaj denove vidis ĉirkaŭ mi la malnovan konatan laborejon, miajn ilojn, miajn aparatojn,

ĝuste kiel mi lasis ilin. Mi malsupreniris tre treme kaj sidiĝis sur mian benkon. Dum pluraj minutoj mi tremegis. Tiam mi pli trankviliĝis. Ĉirkaŭ mi denove estis mia malnova laborejo, precize kia ĝi antaŭe estis. Povus esti, ke mi dormis tie, kaj ke la tuta afero estis sonĝo.

”Tamen, ne precize! La maŝino ekiris de la sudorienta angulo de la laborejo. Ĝi revenis ĉe la nordokcidenta kontraŭ la muro, kie vi vidis ĝin. Tio reprezentas ĝuste la distancon inter mia malgranda herbejo kaj la piedestalo de la blanka sfinkso, en kiun la morlokoj portis la maŝinon.

”Dum iom da tempo mia menso stagnis. Baldaŭ mi stariĝis kaj venis laŭ la ĉi-tiea koridoro. Mi lamis, ĉar mia kalkano ankoraŭ doloris, kaj sentis min treege malpura. Mi vidis la *Pall Mall Gazette* sur la tablo apud la pordo. Mi trovis, ke la dato estas hodiaŭ, kaj rigardante la horloĝon, mi vidis, ke estas preskaŭ la oka. Mi aŭdis viajn voĉojn kaj la tintadon de teleroj. Mi hezitis — mi estis tre kaptuniĝema kaj malforta. Tiam mi ekflaris bonan sanigan viandon, kaj malfermis la pordon al vi. Vi scias la ceteron. Mi lavis min, manĝis, kaj nun diras al vi la rakonton.”

”Mi scias”, li diris post paŭzo, ”ke ĉio ĉi estos tute nekredebla al vi. Al mi la sola nekredebla afero estas, ke mi sidas ĉi tie hodiaŭ vespere en tiu ĉi malnova konata ĉambro rigardante viajn amikajn vizaĝojn kaj rakontante al vi tiujn ĉi strangajn aventurojn.”

Li rigardis la mediciniston. ”Ne. Mi ne povas atendi, ke vi kreu ĝin. Akceptu ĝin kiel mensogon — aŭ profetaĵon. Diru, ke mi sonĝis ĝin en la laborejo. Pensu, ke mi konjektadis pri la destino de nia raso ĝis mi elpensis tiujn ĉi fikciojn. Rigar-

du mian aserton pri ĝia vero kiel nuran artifikon por pligrandigi ĝian intereson. Kaj, kiel rakonto, kion vi pensas pri ĝi?"

Li prenis sian pipon, kaj laŭ sia malnova kutimo, komencis nerve frapeti ĝin sur la feraĵojn de la fajrujo. Estis momenta kvieto. Tiam seĝoj komencis knari kaj ŝuoj skrapa la tapiŝon. Mi fortunis miajn okulojn de sur la vizaĝo de la tempo-vojaĝanto kaj rigardis lian aŭdantaron. Ili estis en la malumo, kaj koloritaj makuletoj naĝis antaŭ ili. La medicinisto ŝajnis okupata rigardante nian gastiganton. La redaktoro fikse rigardis la finaĵon de sia cigaro — la sesa. La ĵurnalisto malerte serĉis sian poŝhorlokon. La aliaj, se mi ĝuste memoras, estis senmovaj.

La redaktoro stariĝis kun ĝemeto. "Domaĝe, ke vi ne estas verkisto!" li diris, metante sian manon sur la ŝultron de la tempo-vojaĝanto.

"Vi ne kredas ĝin?"

"Nu —"

"Mi atendis tion."

La tempo-vojaĝanto turniĝis al ni. "Kie estas la alumetoj?" li diris. Li bruligis iun, kaj parolis kun la pipo en la buŝo, blovetante. "Verdire ... mi apenaŭ mem kredas ĝin ... tamen ..."

Lia rigardo trafis kun muta demando la velkintajn blankajn florojn sur la malgranda tablo. Tiam li turnis la manon, kiu tenis lian pipon, kaj mi vidis, ke li rigardas iujn duonsaniĝintajn cikatrojn sur la fingro-artikoj.

La medicinisto stariĝis, venis al la lampo, kaj ekzamenis la florojn. "La gineceo estas stranga", li diris. La psikologo klinis sin antaŭen por vidi, kaj etendis la manon por specimeno.

"Diable, estas kvarono antaŭ la unua", diris la ĵurnalisto. "Kiel ni povos hejmeniri?"

”Estas multaj flakroj ĉe la stacio”, diris la psikologo.

”Estas kurioze”, diris la medicinisto; ”sed mi ja ne scias la familion de tiuj ĉi floroj. Ĉu mi povas havi ilin?”

La tempo-vojaĝanto hezitis. Tiam subite:

”Certe ne.”

”Kie vi vere havigis ilin?” diris la medicinisto.

La tempo-vojaĝanto metis sian manon al la kapo. Li parolis kiel iu, kiu provas teni aferon, kiu evitas lin. ”Ilin metis en mian poŝon Uina, kiam mi veturis en tempon.” Li rigardis ĉirkaŭ la ĉambro. ”Diablo! ĉio forglitas. Tiu ĉi ĉambro kaj vi kaj la atmosfero de ĉiu tago estas tro por mia memoro. Ĉu mi iam faris tempo-maŝinon aŭ modelon de tempo-maŝino? Aŭ ĉu tio estas nur sonĝo? Oni diras, ke la vivo estas sonĝo, kelkfoje mizera sonĝo — sed mi ne toleros plian, kiu ne taŭgos. Estas frenezaĵo. Kaj de kie venis la sonĝo? ... Mi devas rigardi tiun maŝinon. Se ĝi ja ekzistas!”

Rapide li ekprenis la lampon kaj portis ĝin flagranta ruĝa tra la pordo en la koridoron. Ni sekvis lin. Tie en la ekbrila lumo de la lampo tute certe estis la maŝino, dika, malhela, kaj malrekta; aĵo el latuno, ebono, eburo kaj kvarco, kiu tralasis la lumon. Solida al la tuŝo — ĉar mi etendis mian manon kaj palpis ĝian relon — kaj kun brunaj makuloj kaj ŝmiraĵoj sur la eburo, kaj pecoj de herbo kaj musko sur la subaj partoj, kaj kun unu relo kurbita.

La tempo-vojaĝanto metis la lampon sur la benkon kaj gli-tigis sian manon sur la difektita relo. ”Estas en ordo nun”, li diris. ”La rakonto, kiun mi diris al vi, estas vera. Mi bedaŭras, ke mi venigis vin tien ĉi en la malvarmon.” Li prenis la lampon, kaj, en absoluta silento, ni reiris al la fumsalono.

Li venis en la vestiblon kun ni kaj helpis al la redaktoro

surmeti lian surtuton. La medicinisto rigardis en lian vizaĝon, kaj iom heziteme diris, ke li suferas pro trolaboro, pro kio li ridegis. Mi memoras, kiel li staris ĉe la malfermita pordo kaj kriis bonan nokton.

Mi kunluis fiakron kun la redaktoro. Li opiniis la rakonton "spektakla mensogo." Miaflanke, mi ne povis fari konkludon. La rakonto estis tiel fantazia kaj nekredebla, la dirado tiel krediga kaj sobra. Mi kuŝis sendorma la plej grandan parton de la nokto kaj pripensis ĝin, Mi decidis iri la venontan tagon por revidi la tempo-vojaĝanton. Oni sciigis al mi, ke li estas en la laborejo, kaj ĉar mi estis bone konata en la domo, mi supreniris al li. La laborejo, tamen, estis senhoma. Minuton mi rigardis la tempo-maŝinon kaj etendis mian manon kaj tuŝis la funkciigilon. Je tio la dika, solidaspekta maso svingiĝis kiel branĉo skuita de la vento. Ĝia malfirmeco tre timigis min kaj mi havis kuriozan rememoron pri la infanaj tagoj, kiam oni malpermesis, ke mi tuŝu objektojn, kiuj ne koncernas min. Mi reiris tra la koridoro. La tempo-vojaĝanto renkontis min en la fumsalono. Li estis survoje de la domo. Li havis malgrandan fotografilon sur unu brako kaj dorsosakon sur la alia. Vidante min, li ridis, kaj prezentis al mi kubuton por mia manpremo. "Mi estas treege okupata", li diris, "pri tiu aĵo tie."

"Sed ĉu ne estas ia ruzaĵo", mi diris. "Ĉu efektive vi veturas trans tempon?"

"Efektive kaj vere." Kaj li rigardis malkaŝe en miajn okulojn. Li hezitis. Lia rigardo vagis ĉirkaŭ la ĉambron. "Mi bezonas nur duonhoron", li diris. "Mi scias, kial vi venis, kaj vi estas tre afabla. Estas kelkaj gazetoj tie. Se vi restos ĝis la tagmanĝo, mi plene pruvos al vi tiun ĉi tempo-veturadon kaj

ankaŭ prezentos specimenojn. Ĉu vi pardonos, ke mi nun forlasu vin?”

Mi konsentis, apenaŭ komprenante tiam la plenan signifon de liaj vortoj, kaj li skuetis la kapon kaj pluiris laŭ la koridoro. Mi aŭdis ekfermiĝi la laborejan pordon, sidiĝis sur seĝon, kaj prenis ĵurnalon. Kion li intencas fari antaŭ la tagmanĝo? Tiam subite ia reklamo memorigis al mi, ke mi promesis renkonti Richardson, la eldoniston, je la dua. Mi rigardis mian horloĝon kaj konstatis, ke mi apenaŭ povos plenumi tiun rendezvuon. Mi stariĝis kaj laŭiris la koridoron por informi la tempo-vojaĝanton.

”Kiam mi ektenis la anson de la pordo, mi aŭdis krion, strange tranĉitan ĉe la fino, kaj klaketon kaj bruon. Aerblovo ĉirkaŭkirligis min kiam mi malfermis la pordon, — kaj de interne venis la bruo de rompita vitro, kiu falas sur la plankon. La tempo-vojaĝanto ne estis tie. Dum momento mi pensis vidi fantomecan, malklaran figuron meze de kirliganta maso da nigraĵo kaj latuno — figuron tiel travideblan, ke la benko malantaŭe estis absolute klara; sed tiu ĉi fantomaĵo mapaleris dum mi frotis miajn okulojn. La tempo-maŝino estis for. Krom trankviliĝanta moviĝo de polvo, la alia fino de la laborejo estis malplena. Ŝajne ĵus enfalis unu el la vitroj de la superporda fenestreto.

Mi sentis neracian surprizegon. Mi sciis, ke okazis io stranga, kaj dum kelkaj momentoj ne povis distingi, kio estas la strangaĵo. Dum mi staris kaj rigardis, la pordo al la ĝardeno malfermiĝis, kaj la servisto aperis.

Ni rigardis unu la alian. Tiam ideoj ekvenis.

”Ĉu sinjoro — eliris tien?” mi diris.

”Ne, sinjoro. Neniu venis laŭ tiu ĉi vojo. Mi atendis trovi lin tie ĉi.”

Je tio mi komprenis. Riskante ĉagreni Richardson, mi restis tie, por atendi la tempo-vojaĝanton; por atendi la duan, eble pli strangan rakonton, kaj la specimenojn kaj fotografaĵojn, kiujn li kunportos. Sed mi nun komencas timi, ke mi devos atendi mian tutan vivon. La tempo-vojaĝanto malaperis antaŭ tri jaroj. Kaj, kiel ĉiu scias, li neniam revenis.

Epilogo

Oni ne povas ne esti scivolema. Ĉu li iam revenos? Povas esti, ke li flugegis en la estinton, kaj trafis en la manojn de la sangotrinkaj, vilaj sovaĝuloj de la epoko de nepolurita ŝtono; en la profundojn de la kretaeca maro; aŭ inter la groteskaj lacertojn, la reptilajn monstregojn de la ĵurasa epoko. Eble eĉ nun — se mi povas uzi la esprimon — li vagas sur ia kreta koralrifo plena de plesiosaŭroj, aŭ apud la solecaj salaj lagoj de la triasa epoko. Aŭ ĉu li iris antaŭen, en iun el la pli proksimaj epokoj, kie homoj ankoraŭ estas homoj, sed kie la demandoj de nia epoko estas responditaj kaj ĝiaj enuigaj problemoj estas solvitaj? En la virecon de la homaro: ĉar miaflanke, mi ne povas kredi, ke tiuj ĉi nunaj tagoj de mallerta eksperimentado, fragmenta teoriado, kaj komuna malpaco efektive estas la zenito de la homaro! Mi diras, miaflanke. Li, mi scias — ĉar ni diskutis la temon inter ni longe antaŭ la konstruo de la tempo-maŝino — pripensis nur malgaje la progreson de la homaro, kaj vidis en la pligrandiĝanta maso de civilizado nur malsaĝan amasiĝon, kiu neeviteble devos finfine refali sur siajn konstruintojn kaj detruiri ilin. Se tio okazos, ni devos, tamen, vivi kvazaŭ ĝi ne okazos. Sed al mi, la estonto ankoraŭ estas nigra kaj malplena — estas vasta nekonataĵo lumigata en kelkaj hazardaj lokoj de la memoro pri lia rakonto. Kaj mi havas ĉe mi, por konsoli min, du strangajn blankajn florojn — nun velkintajn kaj brunajn kaj platajn kaj rompe-

blajn — por atesti, ke eĉ kiam ne plu ekzistis menso kaj forto, dankemo kaj reciproka amemo ankoraŭ vivis en la homa koro.

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-077-5